



Ĉasisto de sonĝoj

Julian Modest

Titolo	Ĉasisto de songoj
Aŭtoro	Julian Modest
Provlegis	Johan Derks
Eldonjaro	2019
Eldonejo	Eldonejo Libera
ISBN	978-0-244-22384-7

JULIAN MODEST

ĈASISTO DE SONGŬOJ

Novelaro, originale verkita en Esperanto

2019

ANTAŬPAROLO

Al mi persone estas tre ĝojige ke, kiel eldonisto, mi povas la plej-plej unua legi la verkojn kiuj aperas ĉe mia eldonejo. Des pli tio estas la kazo kiam talenta kaj konata verkisto sendas sian novan manuskripton.

La unuajn librojn de mia amiko kaj jam multjara verkisto Julian Modest, kun la titoloj La Ora Pozidono kaj Maja Pluvo, mi legis kiel novbakita esperantisto kaj ili certe helpis min evoluigi mian lingvokonon kaj ampleksigi mian vortprovizon. Plie, ili konatigis min kun la esperanta literaturo. Depost tiam, mi ĉiam ĝojis malkovri novan novelon lian en la revuo Monato, aŭ novan libron en iu libroservo.

Ĉe Eldonejo Libera aperis jam tri krimromanoj, tiu ĉi novelaro estas la kvara frukto de nia kunlaboro. La rakontoj de tiu ĉi libro tre plaĉas al mi pro ilia diverseco, la flua kaj bela lingvaĵo, la originala enhavo kun la surprizaj, ne-klišaj finoj, ofte - prave - tre realismaj, kontraste al kutimaj fabelecaj rakontoj kun bona fino.

Pli-malpli tiujn ĉi-suprajn vortojn mi spontanee skribis al Julian post tralego de duono de la manuskripto, aldonante ke mi bedaŭris ne povi verki recenzon pri libro kiun mi mem eldonas, sed konsolante min ke la libro certe plaĉos ankaŭ al aliaj recenzantoj. Baldaŭ poste venis lia respondo kun la propono ke mi anstataŭe verku la antaŭparolon, propono kiun mi volonte kaj senhezite akceptis.

Jen do, en viaj manoj, la plej nova novelaro de Julian Modest, pri kiu mi tutkore esperas ke vi, leganto, ĝuos la legadon same multe kiel mi, eldonisto.

Lode Van de Velde

KIO ESTAS LA RAKONTO?

Eseo

Kial la infanoj ŝatas fabelojn? Kial ni bezonas rakonti historiojn, travivaĵojn, momentojn el nia ĉiutaga vivo?

La rakonto estas la plej malnova literatura ĝenro. Per la rakontoj ni ordigas nian vivon. La rakontoj estas fragmentoj el niaj travivaĵoj, kiujn ni lumigas per la lumo de niaj meditoj kaj emocioj. Ni ŝatas rakonti, ni ŝatas aŭskulti aŭ legi rakontojn pri ordinaraj kaj neordinaraj homoj. En la veraj rakontoj estas malmultaj rolantoj, tamen iliaj travivaĵoj ne estas ordinaraj.

Kiam ni rakontas, ni ludas per la lingvo, per la pensoj, per la emocioj, per la karakteroj de la rolantoj. En la rakontoj la bildoj, la lokoj de la agoj estas skizataj. Nur per kelkaj vortoj la verkistoj aludas la bildojn, kiuj provokas nian imagon.

En la rakontoj ne estas longaj dialogoj. La rolantoj koncize esprimas siajn pensojn, vidpunktojn, sed per la koncizaj frazoj ili mem karakterizas sin. La verkistoj de la rakontoj ne priskribas detale la rolantojn. La verkistoj montras nur kelkajn trajtojn de iliaj karakteroj kaj la legantoj bone ekkonas la rolantojn. Same, kiam oni renkontas nekonatan homon, oni povus konjekti kia li estas laŭ lia parolo, liaj gestoj, lia rigardo. Tiel la verkistoj de la rakontoj montras nur gestojn, detalojn de la vizaĝoj de la rolantoj, mencias kelkajn frazojn, kiuj prezentas la karakterojn de la rolantoj.

En la rakontoj la verkistoj ne priskribas la tutan vivon de la rolantoj, sed ili emfazas nur momentojn el ilia vivo, kiuj gravas pro ilia influo al la rakontoj.

La pejzaĝo en la rakontoj aldonas ne nur la atmosferon, sed ĝi estas fono al la karakteroj kaj agoj de la rolantoj. La pejzaĝo povas esti en kontrasto aŭ en sinkroneco al la travivaĵoj, aŭ al la anima stato de la rolantoj.

En la rakontoj plej gravas la vorto “sed”. Okazas io, sed la vorto “sed” direktas la legantojn al ĉefa celo de la rakontoj. Ofte ŝajnas al ni, ke iuj rakontoj ne havas finon. Tio ne estas

hazarde. La verkistoj instigas la legantojn mem diveni la finon de la rakonto. Ili estu kunverkantoj. Ili meditu, rezonu pri la enhavo kaj ili mem decidu kio okazos post la fino de la rakonto.

Pasos jaroj kaj jarcentoj, sed la homoj ĉiam ŝatos rakonti, aŭskulti aŭ verki rakontojn. La mondo de la rakontoj estas alloga kaj reva. Dank' al la rakontoj la vivo fariĝas pli interesa, pli mirinda, pli bela.

Julian Modest

Sofio, la 11-an de aprilo 2019

FIDELECO

La parko dormis sub la mola neĝa kovrilo. La aleoj silentis senhomaj. La arbobranĉoj neĝarĝentis kaj la glaciaj kristaletoj sur ili respogulis la matenan sunlumon. Aŭdiĝis nur ies grincantaj paŝoj sur la neĝkovrita pado. Onklino Neda kaj ŝia hundo Rad promenis. Ili paŝis malrapide unu apud la alia en ankoraŭ dormanta parko.

Ĉiun matenon dum la sama horo onklino Neda kaj Rad estis en la parko kaj ambaŭ trairis la vojjon de la centra parka pordo ĝis la plej malproksima aleo. De tempo al tempo Rad deflankiĝis de onklino Neda kaj kuris jen antaŭen, jen malantaŭen, kontrolis ion sur la pado, poste ĝi denove revenis kaj daŭrigis kviete akompani onklinon Nedan. Sesdekkvinjara, ŝi havis arĝentkoloran hararon, similan al la neĝo sur la branĉoj, diafanajn blujajn okulojn kaj karan rideton.

Ĉi-matene onklino Neda kaj Rad denove promenis en la parko kaj kiam ili ekiris al la parka pordo por reveni hejmen, onklino Neda eksentis fortan doloron en la brusto, kvazaŭ iu per tranĉilo pikis ŝin. Onklino Neda ŝanceliĝis, sed ne falis, nur sidiĝis sur la proksiman benkon neĝkovritan. Rad tuj eksentis, ke io malbona okazis al onklino Neda kaj ĝi maltrankvile komencis boji. Ĉe la enirejo de la parko estis la budo de la parkogardisto, kiu tra la fenestreto vidis, ke onklino Neda svenis. Li eliris el la budo, proksimiĝis al la benko, kie ŝi sidis kaj demandis:

-Sinjorino, ĉu vi malbone fartas?

-Jes – respondis onklino Neda. – Mia koro tre forte doloras.

-Tuj mi vokos Urĝan Helpon – diris la viro, elprenis el la poŝo sian poŝtelefonon kaj telefonis.

Onklino Neda sidis sur la benko, spirante peze. La doloro daŭris. Por momento ĝi iom malfortiĝis, sed poste tuj denove forte pikis ŝin. Rad staris senmova kaj rigardis ŝin,

kvazaŭ deziris demandi kio okazis kaj kial ŝia pala vizaĝo konvulsiiĝas.

La aŭto de Urĝa Helpo venis. La kuracisto proksimiĝis al onklino Neda, alrigardis ŝin kaj tuj komprenis kio okazis. Oni helpis ŝin eniri la aŭton, kiu rapide sirensone forveturis. Rad restis senmova ĉe la benko, kie sidis onklino Neda.

La parkogardisto eniris la budon kaj komencis trafoliumi la matenan ĵurnalon, sed post dudek minutoj li rigardis tra la fenestreto kaj vidis, ke Rad ankoraŭ staras ĉe la benko.

-Strange – diris la gardisto – la hundo ankoraŭ estas tie.

Venonttage matene, kiam la gardisto venis en la parkon, li denove vidis Radon, starantan ĉe la benko. La hundo estis tie kiel hieraŭ kaj certe la tutan nokton ĝi pasigis ĉe la benko.

La horoj pasis. En la parkon venis homoj promenadi, sed Rad estis tie, ĉe la benko.

-La hundo mortos ĉi tie pro malsato – diris al si mem la gardisto. - Mi kondukos ĝin hejmen kaj donos al ĝi manĝi.

Kiam la deĵoro de la gardisto finiĝis, li proksimiĝis al Rad, prenis ĝian rimenon kaj ekiris kun Rad hejmen. La gardisto loĝis proksime al la parko. Li ligis Radon al arbo en la korto de la domo kaj donis al ĝi akvon kaj manĝaĵon.

-De hodiaŭ vi estos mia gasto – diris la gardisto al Rad. – Kiam via dommastrino revenos de la malsanulejo, vi denove iros al ŝi.

Tamen granda estis la surprizo de la gardisto, kiam la sekvan matenon li vidis, ke Rad ne estas en la korto.

-Certe al la hundo ne plaĉis esti ĉi tie – diris la gardisto kaj ekiris al la parko.

Pli surprizita li estis, kiam vidis Radon en la parko, starantan ĉe la benko, sur kiu sidis onklino Neda.

-Ho, vi venis antaŭ mi – miris la gardisto.

Rad nur turnis kapon al li kaj poste alrigardis la ŝoseon, kien antaŭ du tagoj ekveturis la aŭto de Urĝa Helpo kun onklino Neda.

Posttagmeze la gardisto denove prenis Radon kaj ekiris hejmen, sed matene Rad denove estis en la parko.

-Klare – diris la gardisto – vi deziras esti ĉi tie kaj atendi vian dommastrinon.

Pasis semajno, sed Rad ĉiam estas en la parko ĉe la benko, ĉe kiu svenis onklino Neda.

LA LETERO

Vendrede posttagmeze. Agrabla tago je la fino de la somero, varmeta kun febla vento. La ĉielo bluas kiel trankvila diafana lago. La arboj sur la stratoj similas al grandegaj verdaj ombreloj. Estas bone sidi sur benko sub la arboj kaj rigardi la homojn, kiuj paŝas sur la stratoj. Homoj, aŭtoj, bicikloj. Tamen Dobrin ne havas tempon sidi sur iu benko kaj iom ĝui la someran posttagmezon. Li eĉ ne rimarkas la sunon, kiu nun sinkas al la horizonto, simila al grandega kupra monero, kiu lante ruliĝas sur la blua sennuba ĉielo.

Antaŭ ol reveni hejmen post la fino de la labortago, Dobrin devas iri en la vendejon, en la apotekon aĉetadi kaj poste rapidi hejmen por prepari la vespermanĝon, ĉar Mira, la filino, revenos je la sepa horo el la lernejo. Estas kelkaj taskoj, kiuj bezonas tempon, sed la tempo flugas kaj Dobrin kuras post ĝi.

En la kvartala vendejo estas tumulto. La homoj staras en longa vico antaŭ la kasejo. Dobrin plenigas la korbon per nutraĵproduktoj kaj same ekstaras en la vico. Pacience li atendas kaj meditas pri la farenadaĵoj, kiujn li plenumos hejme. Kiam li revenos, li tuj komencos prepari la vespermanĝon. Ĉi-vespere li decidis kuir spagetojn. Ja, Mira ŝatas spagetojn.

Jam de tri jaroj, post la forpaso de Zora, la edzino, Dobrin aĉetadas, kuiras, lavas la telerojn, purigas. Li estas kaj la patro kaj la patrino de Mira. Fojfoje li laciĝas, ne havas emon legi, spekti televidon, eĉ konversacii, sed al Mira li ne deziras montri, ke li estas laca. Dobrin konscias, ke same Mira ne fartas bone. Ja, por dekkvarjara knabino tute ne estas facile vivi sen patrino. Tial Dobrin ĉion faras, por ke Mira ne suferu kaj estu trankvila. Liaj sola espero kaj senco en la vivo estas Mira. Li laboras, agas kaj kiam li vidas la rideton de Mira, li kvazaŭ ekhavas flugilojn.

Mira lernas en la sepa klaso kaj Dobrin bone komprenas, ke nun ŝi bezonas lin. Nun li devas helpi ŝin, apogi

ŝin, kuraĝigi ŝin. Mira vidas, ke Dobrin faras ĉion eblan por ke ili pli bone vivu kaj ŝi provas helpi lin. De tempo al tempo Mira kuiras, lavas, sed Dobrin ĉiam diras, ke por ŝi plej gravas la lernado kaj ke ŝi estu bona lernantino.

Nesentible la vico antaŭ la kasejo malaperas. Dobrin pagas la nutraĵproduktojn, ekstaras iom flanke en la vendejo kaj komencas meti ilin en la sakon. Proksime al li ekstaras virino, verŝajne samaĝa al li, kun bruna krispa hararo, varmaj kolombkoloraj okuloj, vestita en ruĝa jupo kaj en blanka bluzo. Ŝajne la virino ekridetas al Dobrin, sed li ne alrigardas ŝin, klinas kapon al la sako, por ke ŝi ne opiniu, ke li estas iu needukita aŭ impertinenta ulo.

La virino tamen plu staras kaj rigardas lin. Verŝajne ŝi atendas, ke Dobrin alparolu ŝin. Li maltrankviliĝas. “Ĉu mi konas ŝin, ĉu ŝi konas min? – demandas li sin mem. – Ne! Tute certe! Neniam mi vidis ŝin. Tamen ŝi daŭre rigardas min kaj pro afableco, mi devas saluti ŝin.” Li volis ekparoli, tamen la virino ekparolas antaŭ li:

-Saluton sinjoro Vaklinov.

Dobrin ekgapas kaj per larĝe malfermitaj okuloj alrigardas ŝin. Ja, ŝi scias lian nomon! Nekredeble, sed de kie?

Tuj li deziras demandi ŝin de kie ŝi scias lian nomon, tamen la virino denove ekparolas:

-Mi ricevis vian leteron, sed pardonu min, mi ne sukcesis respondi al vi.

Tiuj ĉi vortoj stuporigas lin. Dobrin pretas diri, ke ŝi eraras, sed ja, ŝi scias lian nomon. Tamen neniam li skribis kaj sendis leteron al virino. Nur kiam li estis lernanto, fojfoje li skribis leterojn al la knabino, kiun tiam li amis.

-Mi dankas vin pri la afablaj vortoj – daŭrigas la virino. – Same mi opinias, ke estos bone, ke iam ni iru al teatro aŭ al koncerto, kiel vi proponis.

Dobrin komencas ŝviti kaj stulte gapi la virinon. Kion ŝi parolas: letero, afablaj vortoj, teatro, koncerto... Jam li estas tute ŝokita kaj nur tramurmuris:

-Ja, jes, jes...

-Ni daŭrigos korespondi kaj interkonsentos kiam ni renkontiĝos – diris la virino, kiu eble rimarkis lian embarason. – Ĝis revido, sinjoro Vaklinov – kaj ŝi denove kare ekridetas al li.

Dobrin estas kiel ŝtonigita, tute ne komprenas kio okazis. Kiu estas tiu ĉi virino? Ĉu estas songo aŭ miraklo? Ĝis nun li ne havis similan strangan travivaĵon.

Malrapide li ekiras, sed la penso pri la nekonata virino forte boras lian cerbon. Hejme Dobrin komencas kuiri la spagetojn. Mira revenas el la lernejo kaj kiam ŝi eniras la kuirejon, li rakontas al ŝi kio okazis en la vendejo. Mira atente aŭskultas lin, sed Dobrin rimarkas, ke ŝiaj vangoj iĝas pli kaj pli ruĝaj kaj ŝiaj okuloj, similaj al kaŝtanoj, ekbrilas ruzete.

-Ĉu hazarde vi scias ion pri tiu ĉi letero? – demandas Dobrin severe.

-Jes – konfesas Mira, staranta antaŭ li kiel rompebla senhelpa arbido, rigardanta la plankon.

-Ĉu? – ne kredas Dobrin.

-Paĉjo – ekparolas mallaŭte ŝi – jam tri jarojn ni vivas sen panjo. Vi mem zorgas pri ĉio, laboras, kuras. Vi ne devas esti sola. Mi skribis la leteron. Onklino Marta loĝas en la najbara loĝdomo. Ŝi ankaŭ estas sola. Tre bona virino ŝi estas, instruistino...

-Kiel vi skribis la leteron? – ne komprenis Dobrin.

-Mi skribis ĝin en Facebook je via nomo. Mi aperigis vian foton.

-En Facebook – tramurmuras Dobrin.

Li ne uzas Facebook kaj eĉ ne intencas uzi ĝin, tamen ĉio estas klara. Neniam li supozis, ke Mira serĉos al li edzinon.

LA LUPINO

Neĝis. En la truo la lupetoj plorĝemis malsataj. Kelkajn tagojn jam ili manĝis nenion. La lupino lekis ilin kaj poste malrapide ĝi ekstaris kaj eliris. Ekstere blindigis ĝin la arĝenta lumo de la luno. Sibilis vento, kvazaŭ ie tre malproksime, malantaŭ arbaroj kaj montetoj, ĝia fratino vokis ĝin por helpo. Dum tiu ĉi vintro estis danĝere serĉi nutraĵon, sed la turmenta plorĝemo de la lupetoj boris truon en la brusto de la lupino. Ĝi turnis sin, movis sian pezan voston, revenis en la truon kaj proksimiĝis al la lupetoj. Iliaj okuloj fajretis en la mallumo. La lupetoj tuj saltis, supozantaj, ke la patrino portas ion por manĝi kaj denove pli forte ili plorĝemis. La lupino tuŝis ilin per sia malseka buŝego por trankviligi ilin kaj klarigi, ke en tiu blanka vintra dezerto ĝi ne povas serĉi nutraĵon, ĉar se ĝi farus eĉ du paŝojn sur la neĝon, la teruregaj viroj, kiuj havas mane la fajron kaj la tondrojn ekscios de kie ĝi venis kaj kie troviĝas la truo, en kiu estas ĝiaj idoj. Tamen la lupetoj ne komprenis tion, ili suferis pro la dolora malsato. Ja, la lupino povis ĉion elteni: la malsaton, la froston, la timon, kiu ofte ŝtonigis ĝin kiel terura kaj nekonata forto, sed ĝi ne povis elteni tiun ĉi doloran plorĝemon. Por la lupetoj, la lupino pretis dum horoj vagi sur la neĝo, batali kun hundoj kaj kun la terurigaj viroj, trovi nutraĵon kaj satigi du lanugmolajn pilketojn.

La lupino ankoraŭ memoris la momenton, kiam ĝi iĝis patrino. Tre forte la lupino deziris esti patrino. Tiam dum tuta semajno la luparo vagis tra arbaroj, kampoj, herbejoj. Finfine la luparo eniris grandan densan arbaron. Estis multaj kuraĝaj lupoj. Nokte ili staris sur iu monteto, levis kapojn kaj provoke hurlis al la granda flava lunokulo. La lupoj deziris montri al la teruregaj viroj, ke nenio timigos ilin. Tiam, dum tiuj noktoj, la lupino eksentis, ke io okazas al ĝi.

Per siaj akraj verdaj pupiloj la lupoj tiel rigardis ĝin, kvazaŭ en la lupaj korpoj brulis fajro. Tamen la rigardoj de la lupoj ne estis kruelaj. En iliaj okuloj videblis ia brilo, io simila

al soifo aŭ al preteco fari ĉion por la lupino, sed la lupino estis ruza. Ĝi ŝajnis, ke ne komprenas la deziron de la lupoj. La sama fajro bruligis ĝian korpon. La lupino alloge movis sian voston, ĝiaj verdaj okuloj estis kiel dolĉa veneno. La lupino rigardis aŭ tiun, aŭ alian lupon kaj iliaj koroj plenplenis pro deziro kaj dolĉa doloro.

La lupino sentis, ke en sia vivo komenciĝas io nova kaj grava. Ĝi delonge sciis, ke tio nepre okazos. Senpacience kaj treme la lupino atendis tiun ĉi momenton. Nun la tuta memo de la lupino kiel rapidega rivero tiris ĝin al tiu ĉi grava momento. La lupino ankoraŭ ne sciis kiam kaj kie ĝi okazos. La lupino flaris la lupan odoron kaj la fortaj lupaj korpoj, streĉitaj kiel kordoj, allogis ĝin. Nun la lupoj aspektis pli belaj, pli rapidaj kaj pli fortaj. La lupino agis tiel kiel neniam antaŭe. Ĝi kuris antaŭen kaj la lupoj sekvis ĝin. De tempo al tempo la lupino turnis kapon kaj rigardis ilin. En ĝia ruza rigardo ludis enigmaj allogaj fajreroj.

De tempo al tempo la lupino nevole levis voston kaj la luparo malantaŭ ĝi freneziĝis. La aero iĝis arda, la hurlo – pli forta, pli insista kaj malpacienca. Tamen ĉio estis nur por momento. La lupino streĉis krurojn kaj daŭrigis kuri. Ĝi kuris kvazaŭ dezirante lastan fojon ĝui la senliman bluecon de la ĉielo, la vastecon de la kampoj, la arbarojn, kie ĝi naskiĝis kaj kreskis. Nun la lupino deziris denove trapasi tiun ĉi miraklan kaj belegan mondon de torentoj, arbustoj, herboj, ĉar ĝi ne sciis kio atendas ĝin poste kaj ĉu ĝi estos libera kaj senzorga kiel nun.

La lupoj malantaŭ ĝi ne havis paciencon. La freneza fajro turmentis ilin. Ili atendis kiam la lupino haltos laca. La junaj lupoj estis pli senbridaj. Ili antaŭsentis la decidan momenton. En iliaj brustoj tempestis, kvazaŭ tie estis rajdanto, kiu pene bridis galopantan kiel vento ĉevalon.

Sur herbejo, en densa arbaro, lumigita nur de la arĝenta luna torento, la lupino haltis kaj rigardis la lupojn. Du el ili, junaj kaj fortaj, provis proksimiĝi al ĝi, sed ĝiaj akraj dentoj

ekbrilis kiel ponardoj kaj haltigis ilin. En tiu ĉi momento ĉiuj lupoj saltis unu kontraŭ alia kiel frenezaj kaj komenciĝis kruela batalo. Ululoj, hurloj, muĝadoj vekis la dormantan arbaron. Nur la frida luno estis la sola muta atestanto de la batalo. Grincis dentoj, disŝiriĝis feloj, varmaj sangaj gutoj surŝprucis la herbon kaj la foliojn. La lupino neniam ĝis nun vidis tian kruelan sangavidan batalon. En ĝia koro brulis fajro. La lupino konsciis, ke la batalo estas pri ĝi. La plej forta lupo, la venkinto obsedos ĝin. Nun la lupino atendis por vidi kiu lupo batalos ĝis la morto kaj venkos. Unu post la alia la lupoj rezignis kaj forkuris malproksimen por leki siajn vundojn. Ja, la forto decidis kiu restu. Iuj lupoj elprovis siajn korpojn, dentojn kaj kiam ili vidis, ke ne estas sufiĉe fortaj, ili digne forlasis la batalejon.

Restis nur du lupoj – maljuna, kun kuprokolora felo, kaj juna – grizkolora kiel granita roko. En ĝiaj pupiloj flamis ardaĵoj soifaj fajreroj. La maljuna lupo gvidis la luparon tutan jaron. Nun du lupoj ekstaris unu kontraŭ la alia. Ili akraj dentoj brilis kaj ili muĝis kiel impetaj akvofaloj. En ilia muĝado estis preteco venki, estis pasio, strebo al supereco, potenco, kruelo, malamo kaj malico. Ĉiu el la du nepre deziris gajni la lupinon, kiu nun staris ĉe arbo kaj trankvile observis ilin. Ambaŭ lupoj ŝtelrigardis unu la alian. Ili estis lacaj, sed streĉis la korpojn kiel ŝtalajn glavojn. Ili estis pretaj salti unu kontraŭ la alia kiel tempestoj.

La lupino senmove rigardis ilin kaj ĝi atendis la venkinton. La juna lupo estis pli forta, ĝia sango bolis kiel gejsero, sed la maljuna lupo estis pli ruza kaj pli lerta. Ĝi havis pli da sperto ol la juna. La maljuna povis atendi la oportunan momenton, ĝi povis embuski la junan kaj subite salti kaj enigi siajn akrajn kiel sabrojn dentojn kaj ungojn en la korpon de la malamiko. La maljuna spertis antaŭvidi de kiu flanko ĝi estos atakata kaj eviti la danĝeron.

La lupoj rigardis unu la alian. Ili similis al du streĉitaj pafarkoj. Ili okuloj radiis venenon. Ili estis pretaj salti. La

lupino vidis, ke subite la lupoj eksaltis kaj enplektis siajn korpojn. Terura muĝado tranĉis la silenton. La lupaj korpoj turniĝis kiel du pilkoj. Por sekundo ili malproksimiĝis unu de alia kaj poste tuj ili denove enigis dentojn kaj ungojn. Fluis varma sango. La maljuna lupo stumblis, falis. La juna saltis kaj ekmordis ĝian traĥeon.

La lupino malstreĉiĝis. La maljuna lupo kuŝis en sanga marĉeto. Ĝi ne deziris alrigardi la lupinon. La maljuna lupo kvazaŭ hontis. Lastfoje ĝi alrigardis la lunon, kiu similis al grandega vitreca okulo. La luno estis atestanto de ĝia lasta kruela batalo. Antaŭ la nebuleca rigardo de la maljuna lupo pasis ĝia tuta vivo: de la tago, kiam ĝi komencis vagi sola tra la granda arbaro, kiam ĝi sukcese ĉasis, kiam estis ĝiaj unuaj amaj momentoj, momentoj de jubilo kaj venkoj ĝis nun, kiam ĝi falis venkita ĉi tie.

La juna lupo, peze spiranta, ekstaris antaŭ la lupino. En ĝia rigardo estis pasio, soifo, forto, preteco subiĝi al la volo de la lupino. La lupino alrigardis ĝin per sindonemo, varmeco, dankemo kaj malrapide eniris la densan arbaron. La juna lupo postsekvis ĝin.

Kiam la lupino eksentis, ke en ĝia interno vekigis nova vivo, ĝi komencis esti pli singardema kaj pli atente observis la mondon. La lupino estis kuraĝa, sed nun ĝi ne entreprenis ion, kio minacos ĝian vivon. La lupino longe serĉis kaŝitan lokon por naski siajn idojn kaj finfine ĝi trovis tiun ĉi truon.

La lupino naskis. Laca, ŝvita, elĉerpita la lupino aŭdis la plorĝemojn de siaj idoj. Mirakla lumo lumigis ĝin kaj dolĉa doloro trakuris tra ĝia korpo. En tiu ĉi momento ŝajnis al ĝi, ke ĝi faris la plej gravan agon en sia vivo. Ja, pro tio ĝi vivis ĝis nun. La lupino estis ĝoja, tamen ĝi sentis, ke tiu ĉi ĝojo ne daŭros longe, ĉar por la lupetoj necesis nutraĵo. Nun ili ludis ĉe ĝia varma korpo, tamen baldaŭ ili estos malsataj.

Jam tutan semajnon neĝis. Ĉio estis blanka. La glacia vento malice sible ridis. Pro la neĝo la lupino estis en kaptilo kaj ne povis eliri el la truo. Ja, la vento portos fore ĝian lupan odoron. Tamen la plorĝemoj de la lupetoj malĝojigis ĝin. Iom post iom la lupino kuraĝiĝis. Ĝi nepre devis eliri kaj serĉi nutraĵon por la lupetoj. Por la idoj ĝi pretis vagi de mateno ĝis vespero.

La lupino averte ekmuĝis al la lupetoj. Ili silentiĝis en la truo. La lupino alrigardis ilin kaj eliris. Ekstere ĝi ĉirkaŭrigardis, levis buŝegon kaj komencis flari. Nun ĝi devis iri malrapide kaj singardeme. La lupino certis, ke trovos iun nutraĵon. Ĉiam ĝi sukcesis trovi ion. Ĝi eksentis fortojn. Ja, en la malhela truo atendas ĝin du malfortaj lupetoj. Ĝi devas nutri ilin kaj zorgi pri ili.

La lupino ŝovis sin tra arbustoj, pasis preter arboj. Ĝi paŝis silente kiel ombro. La lupino flaris, ĉirkaŭrigardis kaj estis preta forkuri kiel sago, se estos ia danĝero. Finfine ĝi ekflaris tion, kion ĝi serĉis – odoron de ŝafoj. La ŝafoj ne estis proksime, sed la odoro montris kie ili troviĝas. La sango de la lupino ekbolis. Ĝia rigardo iĝis pli akra. Jam nenio malhelpos ĝin. Ja, ĝia korpo estis forta, ŝtala, ĝiaj dentoj – akraj kiel pikiloj. La lupino ekkuris. Nun eĉ la terurega viro kun la fajro kaj la tondro ne timigos ĝin, nek la hundoj en la ŝafejo. Ŝajnis al ĝi, ke la hundoj estas malfortaj kaj malgrandaj.

La lupino devis nur transsalti la barilon de la ŝafejo kaj silente eniri enen, kie atendis ĝin festeno. Jen, restis ankoraŭ kelkaj metroj, sed la hundoj eksentis ĝin kaj komencis freneze boji. Ja, ili ne kuraĝis aperi antaŭ la lupino. Tamen io okazis. La hundoj ekkuris kontraŭ ĝi. La lupino haltis. Ĝi decidis batali kun ili. Ja, ili ne scias, ke pro la lupetoj la lupino pretas disŝiri ĉion, kio aperos antaŭ ĝi. Ĝia vivo ne valoras, la lupetoj devas vivi.

De ie aperis viro kun fajro kaj tondro. La lupino, obsedita de venĝo, ekiris al li. La hundoj bojis terure. La viro levis ion, similan al branĉo kaj ĝi ektondris. La lupino falis.

Verŝajne ĝi devis tuj forkuri, devis savi sin. Se ĝi ne revenos, la lupetoj pereos.

La lupino eksentis pezan triston. Aŭdiĝis dua tondro. Sub la korpo de la lupino iĝis varma sanga marĉeto. La lupino rigardis la ĉielon kaj rememoris la maljunan lupon, kiu kuŝis senmova. La lupino rememoris la junan lupon, kiu similis al griza granita roko. Nun dum sekundoj la tuta vivo de la lupino pasis antaŭ ĝi. Laste ĝi vidis la senkulpajn okulojn de la du lupetoj.

LA LIBRO-SAVANTO

Antaŭtagmeze mi venis en la francan urbon Limozino. Atendis min miaj geamikoj Isabelo kaj Piero, kies domo estas je ĉirkaŭ dek kilometroj de la urbo en pitoreska ĉirkaŭaĵo. Dum ni trinkis kafon en la vasta ĉambro sur la unua etaĝo de la domo, mi rigardis ilian grandan libroŝrankon kun sennombraj libroj kaj sur la plej supra breto mi vidis foton de viro, mezaĝa kun barbo, kiu sidas ĉe aŭtovojo kaj ĉe li estas lia granda vojaĝosako. Tiu ĉi foto vekis mian atenton kaj mi demandis Isabelon kiu estas tiu ĉi viro. Ŝi komencis rakonti tre interesan historion:

“Antaŭ kelkaj jaroj Piero kaj mi veturis aŭte de la najbara urbo Brivo al Limozino kaj sur la ŝoseo ni rimarkis tiun ĉi viron. Ni opiniis, ke li petveturas, ni haltigis la aŭton kaj demandis lin al kiu direkto li veturos? Li respondis, ke li veturas sendirekte. Tio mirigis nin. La viro estis ĉirkaŭ kvardekkvinjara kun nigra krispa hararo kaj profundaj malhelaj okuloj. De lia rigardo gvatis tristo kaj malespero. Ni proponis al li veturigi lin al iu urbo. Unue li rezignis, dirante, ke li ne deziras ĝeni nin, sed poste li akceptis nian proponon kaj eniris la aŭton.

Dum ni veturis, mi estis tre scivola ekscii kiu li estas, de kie li venas kaj kial li veturas sendirekte. Mi ne eltenis kaj demandis lin. Li komencis malrapide kaj pene paroli. Videblis, ke li sentis bezonon paroli kun iu. Li diris, ke lia edzino subite mortis. Ili ne havis infanojn. Ŝia forpaso frakasis lin. Li deprimiĝis kaj senesperigis. Eĉ li provis mortigi sin. Post la morto de la edzino ĉio en la domo memorigis lin pri ŝi – la mebloj, la aĵoj, la vestoj... Li ne povis dormi, ne povis manĝi kaj subite li decidis ekiri, forlasi la domon, sed kien – li mem ne sciis. Dum pli ol unu monato li vagis sola sur la aŭtovojoj kaj ŝoseoj.

Mi kaj Piero invitis lin veni hejmen, loĝi ĉe ni kaj ni provis helpi lin. Dum unu jaro li loĝis ĉi tie, en nia domo. Sur

la dua etaĝo estas la ĉambro, en kiu li dormis. Li estis kun ni kaj li ne sentis sin sola. Mi proponis al li verki libron, en kiu li priskribu siajn vivon, amon, suferojn, la vagadon tra la landaj vojoj... Mi certis, ke tiel li venkos la ĉagrenon. Kaj li vere komencis verki libron.

Post kelkaj monatoj li diris: “Isabelo, Piero, mi kore dankas vin. Mi finverkis la libron kaj mi foriros. Mi serĉos eldoniston. Li prenis sian grandan vojaĝosakon kaj foriris.

Post duonjaro ni ricevis la libron. Jen ĝi – kaj Isabelo montris al mi la libron, kies titolo estis “Mia vojo”. – Ni neniam forgesos lin – diris ŝi.

Mi denove alrigardis la foton de la nigraokula viro kun la granda vojaĝosako. Sur la foto li estis sidanta ĉe ŝoseo kaj ŝajnis al mi, ke kvazaŭ mi vidis lin, Isabelon kaj Pieron, veturantajn kune kiel malnovaj veraj geamikoj.

DANCANTA ANĜELO

Dana dancis jam de la infanaĝo. Aŭdante muzikon, ŝi tuj ekstaris, faris kelkajn paŝojn kaj komencis danci, kvazaŭ iu ekstertera fantazia forto gvidis ŝin. Ŝia maldika korpo fleksiĝis kiel flamo, ŝiaj teneraj kruroj ne tuŝis la teron, ŝiaj brakoj tremis kiel flugiloj, ŝia longa hararo similis al ondoj, ŝiaj grandaj okuloj radiis miraklan fajron. Mirinda sorĉa forto estis en la dancado de Dana! Kiam iu vidis ŝin danci, li aŭ ŝi estis ravita kaj senmove gapis ŝin. Dana dancis kaj ŝajne leĝera vento lulis ŝiajn belegajn krurojn, ŝiajn blankajn femurojn, ŝian tutan korpon, kiu kvazaŭ ne havis karnon. Ŝi estis kiel miraĝo. La muziko flugigis ŝin tenere kiel aŭtunan folion, falantan de arbo. La dancoj de Dana estis ventegaj kaj pasiaj kiel feino aŭ facilmovaj kaj leĝeraj kiel sopiro. Ĉiu ŝia paŝo, ĉiu ŝia movo estis melodio kaj poezio kiel lirlo.

Tre juna Dana forlasis la naskan domon kaj ekiris serĉi sian feliĉon. Unue ŝi estis en cirko “Areno”, kie ŝi dancis dum la paŭzoj inter la cirkaj programeroj.

En la cirko hindo dresis serpentojn, li ludis flute kaj el skatolo eliris serpentoj, kiuj dancis laŭ la fluta melodio. Kune kun la serpentoj dancis Dana kaj oni ne povis diri kio pli impresis la publikon: ĉu la serpentoj aŭ Dana. La korpo de Dana fleksiĝis kiel kano kaj la flamoj en ŝiaj okuloj allogis la spektantojn.

La cirko kaj Dana veturis tra la tuta lando. Ili estis en urboj kaj vilaĝoj. La vivo de Dana similis al senfina ĝoja danco. Ŝi dancis tage kaj nokte. Oni diris, ke ŝiaj mirindaj dancoj sorĉis ne nur la homojn, sed same la bestojn. Kiam ŝi dancis, la tigroj en la kaĝoj, kvietiĝis kiel hejmaj katoj. La simioj dancis kun ŝi kaj ili imitis ŝiajn movojn.

Ĉiuj en la cirko, de ĝia posedanto, sinjoro Piero, ĝis la laboristoj sur la maneĝo, amis Danan. Ŝi estis ne nur la plej juna en la cirko, sed la plej gaja kaj ĉiuj diris, ke Dana feliĉigas

ilin. Dank' al ŝi kaj al ŝiaj dancoj la publiko ĉiam plenigis la cirkon. Neniama antaŭe la cirkaj spektakloj estis tiel sukcesaj.

Post du jaroj Dana forlasis la cirkon. Neniu komprenis kio igis ŝin foriri. Povas esti, ke la maro allogis ŝin, ĉar tiam la cirko rondvojaĝis tra la maraj urboj. Certe la senlima blua maro, la varma ora sablo, la susuro de la ondoj igis Danan resti ĉe la maro, aŭ eble ŝi renkontis iun, kiu sorĉis ŝian koron kaj Dana enamiĝis. Iun nokton Dana silente iris el la minibuso, kie ŝi dormis kaj malaperis.

Post iom da tempo oni vidis ŝin en iu montara vilaĝo, kie ŝi dancis sur arda braĝo. En iuj montaraj vilaĝoj en la lando estas tia rito. Junulinoj dancas nudpiede sur braĝo. La fremdlandanoj, kiuj spektis tiujn ĉi dancojn, opinias, ke tio estas ia trompo aŭ ĵonglado. Dana tamen dancis sur la braĝo kaj ĉiuj rigardis ŝin trance. Ja, ŝi similis al idolpastrino, kiu plenumas dian riton. Vestita en longa blanka robo, kun la nigra hararo, kiu falas sur ŝiajn ŝultrojn kiel ondoj kaj rigardo, direktita al la steloj, Dana similis al flamanta kometo sur la nokta ĉielo. Sub ŝiaj nudaj blankaj piedoj fajris la fajro de la revoj, sopiroj, amo kaj sorĉado.

Foje dum la dancado sur la braĝo vidis ŝin Roko kaj Miko, junuloj, kiuj laboris en la hotelo de sinjoro Alozo, la plej riĉa persono en urbo Burgo.

-Nia ĉefo baldaŭ havos naskiĝtagan feston kaj tiu ĉi dancistino devas danci dum la festo. Por la ĉefo ŝi estos granda donaco kaj agrabla surprizo.

Kiam la danco finiĝis, ili kaptis Danan kaj enigis ŝin en nigran aŭton. Ŝi ne povis kontraŭstari. Ja, ŝi estis maldika kaj tenera. Oni veturigis ŝin en hotelon "Maraj Lirloj" kaj fermis ŝin en ĉambro. Dana sidiĝis sur la liton sen kompreni kial ili venigis ŝin ĉi tien kaj kio okazos al ŝi. Sola, konsternita, Dana ekploris. Ja, ŝi ĉiam dancis, ridis, sed nun ŝi amare ploris, ĉar ŝi estis kiel najtingalo en kaŝo. Por ŝi tio estis terura.

La pordo – ŝlosita, sola en la ĉambro, Dana sufokiĝis, malgraŭ ke la ĉambro estis vasta, lukse meblita kun televidilo,

fridujo, grandega lito. En la banejo la bankuvo similis al baseno. Dana staris antaŭ la spegulo kaj ne kredis, ke vidas sin kun la longa nigra hararo, kun la vizaĝo, kiu brilis kiel kupro kaj kun la profundaj okuloj. Dana rigardis sin kaj miris. Ŝi nun ŝi malofte rigardis sin en spegulo kaj ŝi ne kredis, ke ŝia rigardo estas tiel forta. Ŝi similis al nimfo. Pro la enuo, Dana provis danci, sed ne eblis danci en kaĝo. Ŝia koro estis premita kiel la koro de timigita pasero, ŝiaj brakoj kvazaŭ forhakitaj kaj ŝiaj kruroj najlitaj en la plankon. Dana eĉ ne povis movi sin. Ŝi sentis sin paralizita. Pli forte ŝi ekploris kaj ŝiaj varmaj larmoj fluis kiel riveretoj.

Dum la tuta nokto Dana ne dormis, malgraŭ ke la lito estis komforta, mola kaj odoris je floroj.

La sekvan tagon venis ambaŭ fortaj junuloj. Ili kondukis ŝin al la restoracio de la hotelo, kiu estis plenplena je homoj, ĉefe gejunuloj, elegante, mode vestitaj, kiuj manĝis, trinkis kaj amuziĝis. En la centro de la restoracio estis podio, lumigita de forta lumo. Tie unu post la alia ekstaris gekantistoj, kiuj kantis. Junulino kun longa ruĝa robo, sen manikoj, anoncis:

-Por vi, kara sinjoro Alozo, okaze de via naskiĝtaga festo, estos granda surprizo. Dancos vera nimfo.

Oni puŝis Danan al la podio kaj ŝi ekstaris sub la lumĵetiloj. Maldika, timigita ŝi estis kiel sovaĝa besteto. En la blanka robo kun la nigra hararo kaj nudpieda, Dana vere similis al nimfo. Nenion ŝi vidis, ĉar la forta lumo blindigis ŝin. Dana tute ne sciis, kiu estas sinjoro Alozo, kie ĝuste li sidas en la restoracio kaj kial ĉiuj estimas kaj subiĝas al li.

Subite eksonis muziko kaj Dana instinkte komencis danci. Ŝi forgesis kie ŝi estas, ke estas homoj ĉirkaŭ ŝi. Ŝi dancis kiel sorĉigita. En la restoracio regis profunda silento. Dana dancis kvazaŭ ŝi estis sola en malluma arbaro, sur herbejo, sub la luno kaj steloj. Ŝajnis al ŝi, ke ĉirkaŭ ŝi estas arboj kaj malantaŭ ili gvatas ŝin bestoj. En la malluma

restoracio flametis nur cigaredoj kiel pupiloj de rabaj bestoj. La muziko lulis Danan kiel la ondoj de trankvila aŭtuna maro.

Dana ne povis diri kiom da tempo ŝi dancis, sed kiam la muziko ĉesis, en la restoracio ektondris aplaŭdoj. Oni kriis “brave” kaj deziris, ke ŝi daŭrigu danci. Dana staris kiel ŝtonigita kaj ne kredis, ke la aplaŭdoj estas por ŝi. La lampoj en la restoracio eklumis kiel torento. Iu sinjoro, vestita en eleganta moda kostumo, fumanta dikan cigaron, proksimiĝis al Dana kaj diris:

-Dankon. Via dancado kortuŝis min. De hodiaŭ vi laboros por mi. Vi dancos ĉi tie. Vi havos salajron, ĉambron en la hotelo kaj ĉion, kion vi deziras.

Tiu ĉi estis sinjoro Alozo, la posedanto de la hotelo kaj la restoracio. Li ordonis al kelnero tuj alporti vespermanĝon al Dana.

-De hodiaŭ tiu ĉi Arbara Nimfo dancos ĉi tie – anoncis altoĉe sinjoro Alozo.

Dana komencis ĉiun vesperon danci en la restoracio kaj pli kaj pli da homoj venis spekti ŝian dancadon. La restoracio ĉiam estis plenplena. En la urbo aperis afiŝoj, kiuj informis, ke en la restoracio de hotelo “Maraj Lirloj” ĉiun vesperon dancas Dana – la Arbara Nimfo.

Dana dancis senlace kaj ŝia dancado ebriigis la spektantojn kiel centjara vino. Estis personoj, kiuj plurfoje venis spekti la dancadon. Ja, la dancado estis kiel drogo, kiel freŝiga malvarma akvo el pura montara fonto. Ne eblis klarigi kia estis la forto de la dancado, kiu allogis la homojn. Eĉ tiuj, kiuj neniam spektis baletan, venis spekti la dancadon de Dana. Ilin ravis ŝiaj molaj flugantaj movoj, ŝiaj flamantaj okuloj, ŝia varma kara rideto.

Sinjoro Alozo ĉiun vesperon estis en la restoracio kaj spektis la dancadon. De kiam Dana dancis ĉi tie, li forgesis ĉion: la okupojn, la familion kaj nur sidis kaj rigardis Danan. Ŝi dancis kaj de tempo al tempo alrigardis lin kaj ŝi kvazaŭ

bruligis lian koron. La rigardo de sinjoro Alozo nun estis kvieta, sed antaŭe ĝi similis al la rigardo de kruela lupo. Sinjoro Alozo ĉesis interesiĝi pri negocoj, pri mono. Li plu ne persekutis siajn konkurencantojn. Li eĉ forgesis siajn aliajn hotelojn, kiujn li havis. Liaj amikoj kaj kunuloj unu post alia forlasis lin. Iuj el ili nur de tempo al tempo rememoris lian naskiĝtagan feston, kiam en la restoracio abundis drinkaĵoj, manĝaĵoj kaj unuan fojon dancis Dana.

Iun vesperon tamen la spektaklo en la restoracio ne komenciĝis. La publiko grumblis. Dana, la dancistino, forestis. Oni serĉis ŝin, sed nenie trovis ŝin. Sinjoro Alozo estis kolerega. Li sidis ĉe la tablo kaj nervoze fumis. Li ordonis al Riko kaj Miko tuj iri serĉi ŝin.

-Dum duonhora vi trovu ŝin! – severe diris sinjoro Alozo.

Roko kaj Miko ekkuris eksteren.

-Ni trovos ŝin kaj mi batos ŝin – diris Roko.

-Nur tion ne faru – avertis lin Miko, - ĉar poste sinjoro Alozo mortpafos vin. Ja, li ne povus vivi sen la Arbara Feino.

Ambaŭ serĉis Danan en la tuta urbo. Ili demandis ĉiun, kiun ili renkontis. Finfine iu diris, ke Dana estis en la danctrinkejo “Diabla Okulo”. Roko kaj Miko tuj alkuris tien. En “Dabla Okulo” estis tumulto. Gejunuloj dancis kaj en iu angulo Roko kaj Miko vidis Danan, kiu dancis kun kelkaj gejunuloj. Ambaŭ tuj kaptis ŝin, ili ĵetis Danan en aŭton kaj forveturis. Post dudek minutoj ili staris antaŭ sinjoro Alozo, kiu severe alrigardis Danan kiel policano, rigardanta krimulon kaj diris:

-Vi ne povas forkuri de mi!

-Mi ne estas via propraĵo! – diris Dana.

-Ni vidos! – eksiblis Alozo.

-Per mono vi ne povas aĉeti min! – rigardis lin Dana kaj en ŝiaj okuloj brilis sparkoj.

-Ni vidos! – ripetis Alozo. - Dancu! – ordonis li.

Dana ekiris al la podio. Eksonis muziko. Kelkajn sekundojn ŝi staris senmova kaj poste ŝi ekdancis. Estis nova danco. Dana streĉis sian korpon kiel pafarkon. Ŝi ekdancis kiel ventego, saltis kiel sovaĝa ĉevalo, ŝia hararo flirtis kiel kanoj, lulitaj de ŝtormo, ŝiaj okuloj fajris.

Sinjoro Alozo sidis ĉe la tablo, rigardis ŝin, sed subite li malbone fartis. Lia koro doloris, li ŝvitis, peze spiris, feraj fingroj premis lian gorĝon, li sufokiĝis, svenis, antaŭ liaj okuloj aperis densaj nigraj nuboj. Kvazaŭ peza sako estis sur lia dorso. Sinjoro Alozo komencis terure kribri al Dana:

-For, for de la restoracio! Vi vere estas malbenita sorĉistino! Forpelu ŝin! Mi plu ne povas rigardi ŝin!

Roko kaj Miko saltis, kaptis Danan kaj puŝis ŝin eksteren.

De tiam neniu plu vidis Danan. Kien ŝi iris, kion ŝi faras, neniu scias. Ĉu ŝi ankoraŭ dancas aŭ ne, estas enigmo.

LA MANTELO

Li renkontis ŝin dum literatura vespero. Poetoj legis siajn poemojn. Kiam ŝi ekstaris antaŭ la publiko, li ekremis kaj emociiĝis. Ŝi legis klare kaj malrapide. Ŝiaj okuloj estis helbrunaj kiel lakta ĉokolado. Ŝia hararo, nigra kaj densa, falis libere sur ŝiajn ŝultrojn. Iu hartufo tuŝis ŝian frunton kaj de tempo al tempo ŝi levis ĝin per siaj maldikaj delikataj fingroj. Dum la legado ŝi iom ridetis kaj tiu ĉi rideto, en la angulo de ŝiaj rozkoloraj lipoj, igis ŝin pli alloga. Ŝiaj brovoj, similaj al etaj nigraj komoj, iom moviĝis.

Modeste vestita, ŝi surhavis brunan jupon el pli dika ŝtofo, botetojn same brunajn, ĝis la genuoj, kaj blankan puloveron kun alta kolumo. Li aŭskultis ŝian melodian voĉon, la vortojn, kiujn ŝi prononcis, sed li kvazaŭ ne perceptis ilin. La ekstremo, kiun li eksentis, kiam ŝi komencis legi, nun obsedis lian tutan korpon kiel varma ondo kaj li sentis sin iom ebria. La lasta vorto el ŝia poemo silentiĝis kaj la subitaj aplaŭdoj de la ĉeestantoj kvazaŭ vekis lin.

Kiam la poemlegado finiĝis, li proksimiĝis al ŝi kaj demandis de kie li povas aĉeti ŝian poemaron. Ŝi ekridetis kaj li denove eksentis la saman tremon en sia brusto. Nun, staranta antaŭ ŝi, li rimarkis, ke ŝi estas ĉirkaŭ tridek kvinjara, do dudek jarojn pli juna ol li. Ŝi klarigis, ke la poemaro ne estas aĉetebla en la librovendejoj, sed se li donus al ŝi sian hejman adreson, ŝi sendos ĝin poŝte al li. Ŝi aldonis, ke ŝiaj poemoj estas legeblaj en interreto.

Vespere, kiam li revenis hejmen, li kvazaŭ ankoraŭ vidis antaŭ si ŝiajn ĉokoladkolorajn okulojn kaj sentis ŝian sunan rideton. Tuj li funkciigis la komputilon kaj komencis legi ŝiajn poemojn en interreto. Ĝis la noktomezo li legis.

Post kelkaj tagoj li ricevis poŝte ŝian poemaron. Interrete ili komencis korespondi. Li eksciis, ke ŝi studis ĵurnalistikon, sed ŝi ne trovis konvenan laboron. Ŝi ne estas edziniĝinta kaj loĝas kun sia patrino. Li same skribis al ŝi pri si

mem. Li, loĝanta sola, estis konsultanto en firmao, kiu okupiĝas pri konstruado de pontoj. Antaŭ unu jaro kaj duono lia edzino mortis.

Post la literatura vespero lia vivo ŝanĝiĝis. Ĉiutage, post la fino de la laboro, li rapidis reveni hejmen kaj funkciigi la komputilon por konversacii kun ŝi. La horoj pasis nerimarkeble. Pri multaj temoj ili konversaciis. Nokte, kiam li enlitiĝis en la silenta kaj malluma ĉambro, simila al kaverno, li demandis sin: ĉu mi enamiĝis? Li ne deziris kredi, ke je tiu ĉi aĝo li ekamis ŝin je la profundo de sia animo. Dum la tagoj li kvazaŭ flugis feliĉa, vespere li rapidis hejmen por aŭdi ŝian voĉon kaj vidi ŝian vizaĝon sur la komputilekrano.

Ili komencis renkontiĝi, spektis teatraĵojn, operojn. Kiel gimnazio li estis enamiĝinta, sed ne kuraĝis konfesi siajn sentojn al ŝi. Ŝi daŭre ne havis laboron kaj tio turmentis ŝin. Li konjektis, ke ŝi kaj ŝia patrino ne havas sufiĉe da mono, li deziris helpi, sed ne proponis al ŝi monon por ne ofendi ŝin.

Estis januaro, ŝi surhavis maldikan jakon. Lia edzino, antaŭ la morto, aĉetis por si mem belan modan mantelon malhelbluan kaj li decidis donaci ĝin al ŝi. Ja, ŝi similis al lia edzino, malalta kaj maldika. Li donacis al ŝi la mantelon kaj diris, ke la edzino eĉ tagon ne surhavis ĝin, ĉar malsaniĝis.

Pasis semajno, sed ŝi daŭre surhavis sian maldikan jakon.

-Kial vi ne surhavas la mantelon, kiun mi donacis al vi? – demandis foje li.

-Ĉu la mantelo? – kaj ŝi alrigardis lin. – Mi donis ĝin al iu virino, kiu pli bezonas ĝin ol mi – ŝi eksilentis kaj poste mallaŭte aldonis: - Pardonu min, sed mi ne povas anstataŭigi vian edzinon.

Nenion li respondis. Vespere, laca kaj ĉagrenita, li revenis hejmen. Li memriproĉis sin. Ĉu mi estas tiel naiva? Kiel mi imagis, ke ŝi, junulino, ekamos min? Aŭ eble ŝi pravas. Ĉu mi subkonscie serĉas virinon, kiu anstataŭos mian forpasintan edzinon? Li kvazaŭ vagis en labirinto, el kiu li ne

povis eliri. Plu li ne funkciigis la komputilon por paroli kun ŝi kaj vidi ŝian vizaĝon sur la komputilekrano.

LA PENTRAĴOJ DE RUSLAN

Estis sunaj septembraj tagoj. La ĉielo bluis kiel infana okulo, febla vento karesis la vizaĝojn, la parko dormetis en silento. Ĉiutage, post la fino de la labortempo, Ljuben ŝatis piediri hejmen, ĝuante la trankvilajn septembrajn posttagmezojn. Ankaŭ nun li ekiris sur la vastan bulvardon kun la tilioj kaj poste dekstren li eniris la parkon, kie la arboj similis al sveltaj inoj kun buntaj manteloj de flavaj, ruĝaj, brunaj folioj. La aŭtunaj floroj en la bedoj iom moviĝis pro la vento kaj kvazaŭ klinis sin por saluti lin.

Ĉe la eta lago en la parko, dum la sunaj septembraj tagoj, kolektiĝis pentristoj, kiuj prezentis siajn bildojn. La loko ĉi tie similis al granda neordinara ekspozicio. Ljuben ŝatis trarigardi la pentraĵojn, konversacii kun la pentristoj, kiujn li bone konis kaj fojfoje li aĉetis iun pentraĵon. Jam li havis sufiĉe da bildoj kaj revis iam establi artgalerion, kie estos pentraĵoj de diversaj pentristoj.

Nun li malrapide pasis preter la ordigitaj bildoj, atente trarigardis ilin, esperante vidi interesan kaj neordinaran pentraĵon, sed la bildoj ne vekis lian atenton. Ja, Ljuben bone konis la stilon kaj pentroarton de multaj el la pentristoj, kiuj ekspoziciis bildojn ĉi tie.

Li daŭrigis malrapide iri, sed subite haltis. Sur unu el la benkoj estis ordigitaj kelkaj akvarelaj pejzaĝoj. Ljuben alrigardis ilin kaj surpriziĝis. La pentraĵoj estis neordinaraj. La pentristo, kiu pentris ilin, havis ege originalan stilon. Li kvazaŭ perceptis nekonatan miraklan mondon kaj talente pentris ĝin. La koloroj estis mirindaj. Ljuben rigardis la bildojn. Ili ravis lin per ia naiveco, sincereco kaj ili radiis lumon kaj ĝojon. Sentebliis forta pentrista inspiro kaj jubilo.

Ljuben ĉirkaŭrigardis por vidi la pentriston, sed proksime al la bildoj estis neniu. Ĉe la najbara benko staris oĉjo Petko, maljuna konata pentristo, kiun Ljuben bone konis.

-Oĉjo Petko, kiu pentris tiujn ĉi pentraĵojn? – demandis Ljuben.

La maljunulo ekridetis kaj montris al la lago.

-Jen, li estas tie – diris oĉjo Petko.

Ljuben rigardis al la direkto, kiun montris la maljuna pentristo, sed tie li vidis nur kelkajn knabojn, kuj pilkludas.

-Kie? – demandis Ljuben.

-Tie – denove diris oĉjo Petko – la blondhara bubo, kiu nur kuras al la pilko.

-Ĉu li pentris la pejzaĝojn? – ne kredis Ljuben.

-Jes – respondis la maljunulo. – Lia nomo estas Ruslan kaj de tempo al tempo li venas ĉi tien.

Kaj oĉjo Petko vokis la knabon:

-Ruslan, venu ĉi tien. Tiu ĉi sinjoro deziras paroli kun vi.

Sendezire la knabo proksimiĝis al ili. Li estis ĉirkaŭ dekjara kun densa blonda hararo, helbluaj okuloj kiel du vitraj globetoj kaj ruĝaj vangoj pro la kurado, similaj al maturaj pomoj.

-Ruslan, ĉu vi pentris tiujn ĉi pejzaĝojn? – demandis Ljuben.

-Jes – respondis la knabo.

-Do, vi ŝatas pentri – diris Ljuben.

-Jes.

-Kaj kial vi alportis ĉi tien la pentraĵojn?

Tiu ĉi demando iom embarasis la knabon. Li alrigardis malsupren al siaj elfrotitaj ŝuoj kaj liaj longaj palpebroj kaŝis lian rigardon. Kelkajn sekundojn li silentis kaj poste mallaŭte li ekparolis:

-Mi bezonas monon...

-Kial – miris Ljuben.

-Mi deziras havi poŝtelefonon. Ja, ĉiuj infanoj havas poŝtelefonon...

-Ĉu viaj gepatroj ne povas aĉeti al vi poŝtelefonon? – demandis Ljuben.

-Mia patrino ne laboras. Oni maldungis ŝin. Mi ne havas patron, mi ne scias kiu li estas.

Ljuben alrigardis la knabon, poste denove - la pentraĵojn, kiuj staris sur la benko kaj malrapide diris:

-Bone. Mi aĉetos du viajn pejzaĝojn, tamen promesu, ke vi daŭrigos pentri.

La okuloj de la knabo ekbrilis.

-Vi havos poŝtelefonon, sed diru al mi pri kio alia vi revas? – demandis Ljuben.

La knabo eĉ ne hezitis kaj tuj respondis:

-Kiam mi estos plenaĝa, mi faros ekspozicion en la urba artgalerio kaj mia patro, kiun mi ne konas, venos, trarigardos miajn pentraĵojn kaj vidos, ke mi fariĝis pentristo.

-Iam vi certe faros grandan ekspozicion kaj via patro certe venos vidi ĝin – diris Ljuben. – Nun mi prenos tiujn ĉi du pentraĵojn.

Ljuben proksimiĝis al la benko, prenis du pentraĵojn kaj donis al Ruslan kelkajn monbiletojn.

-Mi certas, ke vi fariĝos fama pentristo – diris Ljuben.

ĈASISTO DE SONGĜOJ

Neniam mi forgesos la ĉasiston de songĝoj. Li estis alta, maldika kun blanka hararo longa ĝis la ŝultroj, krispa kiel maraj ondoj. La ĉasisto de songĝoj venis en nian urbeton ĉiujare la 26-an de julio. Mi bone memoras la daton, ĉar la 26-an de julio aperis la lernolibro de doktoro Esperanto. Ĉiujare la 26-an de julio en nia urbetto, sur la ĉefa placo, proksime al preĝejo, estas granda bazaro.

Tiam la ĉasisto de songĝoj venis kun du valizoj, ekstaris sur la placo, malfemis la valizojn kaj li komencis vendi okulvitrojn kontraŭ la suno. Estis preskaŭ dudek diversspecaj okulvitroj – por viroj, virinoj, infanoj. Tutan tagon li staris sur la placo sub la varmega julia suno. Ĉe li, sur la eta tablo, estis spegulo. La ĉasisto de songĝoj bone sciis, ke la homoj ŝatas rigardi sin en speguloj kaj tial li tre zorgis pri tiu ĉi sia spegulo. Kutime multaj homoj venis aĉeti okulvitrojn kaj por la ĉasisto de songĝoj tio estis la plej granda feliĉo. Tiam al virinoj kaj junulinoj li diris mirindajn vortojn per kiuj li emfazis ilian belecon. Li komparis ilin al feinoj kaj nimfoj, admiris iliajn serenajn okulojn kaj silkajn hararojn. Pro ĝojo la virinoj kaj la junulinoj floris kiel rozoj, ili aĉetis okulvitrojn kaj foriris kvazaŭ flugantaj.

Vespere, kiam la bazartago finiĝis, kiam la homoj disiĝis, la urba placo silentiĝis kaj sur ĝi nur la vento pelis la rubaĵojn, malpurajn plastajn glasojn kaj paperojn, la ĉasisto de songĝoj remetis la grandan spegulon kaj la okulvitrojn en la valizojn kaj ekiris. Li malrapide paŝis sur la placon kaj lia alta maldika figuro ĵetis longan ombron. Li venis en la restoracion-hotelon de mia patro. Kiam li eniris, mia paĉjo tuj diris:

-Bonan venon, ĉasisto de songĝoj. Mi ĝojas, ke vi denove estas ĉi tie. Mi opiniis, ke ĉi-jare vi ne venos.

-Kial ne? – respondis la ĉasisto de songĝoj kaj liaj blankaj dentoj brilis kiel fazeolaj semoj. – Povas okazi, ke iam bazartago ne estos, sed mi ĉiam venos.

La ĉasisto de songoj sidis ĉe iu tablo kaj paĉjo alportis la plej bonan ruĝan vinon kaj la plej bongustan fromaĝon. Paĉjo sciis, ke li ŝatas vinon kaj fromaĝon. La ĉasisto de songoj iom malstreĉis la nodon de sia ĉerizkolora kravato kaj komencis malrapide kaj trankvile manĝi kaj trinki. Ĉiam li surhavis grizkoloran kostumon, jam malmodan, blankan ĉemizon kaj ĉerizkoloran kravaton. Paĉjo sidis ĉe li kaj demandis:

-Bonvolu rakonti kie vi estis kaj kiajn songojn vi kolektis.

La ĉasisto de songoj rigardis kare paĉjon, ridetis enigme, trinkis iom el la vino kaj komencis rakonti. Ni, la infanoj, sciis, ke li vagas tra la tuta lando, vendas okulvitrojn, tranoktas en diversaj hoteloj kaj songas neordinarajn songojn. Li diris, ke li songas la songojn de la homoj, kiuj antaŭ li dormis en la hotelaj litoj, en kiuj poste li dormis. Tial ni nomis lin ĉasisto de songoj. Neniam ni demandis kio estas lia vera nomo.

-Rakontu – petis paĉjo senpacience.

Kaj la ĉasisto de songoj komencis rakonti malrapide, trankvile. Lia voĉo estis iom mola, simila al roĝa susuro.

-Mi venas nun el urbo Provadia. Tie mi tranoktis en hotelo "Tagiĝo". Mi dormis en lito, en kiu verŝajne antaŭe dormis junulino kaj mi songis interesan songon. Estis belulino kun ora hararo. Ŝi kuris sur kajo post forveturanta vagonaro. Ŝi kuris, kuris, sed la vagonaro foriris kaj ŝi restis sur la kajo. Subite mi vidis, ke sur la ŝultroj de la belulino aperis flugiloj, grandaj, blankaj kiel veloj. Ŝi etendis la flugilojn kaj ekflugis al la ĉielo. Ŝi flugis alten, alten. Malsupre la vagonaro iĝis tre malgranda kiel infana ludilo. La orharara belulino flugis, flugis kaj malaperis en blankan nubon, similan al lantuo.

En alia urbo, Tarnovo, mi songis, ke junulo, verŝajne tridekjara, kiu estis eksterlande, revenis hejmen. Li eniris la domon, salutis sian patrinon, malaltan, magran virinon, sed ŝi silentis kaj ne salutis lin. La patrino kaj la filo staris senmovaj

unu kontraŭ la alia. Subite la patrino ekparolis: “Kiel vi agis tiel, filo mia? Kial vi ŝtelis la monon de via amiko?” Nur tion diris la patrino al sia filo.

En urbo Vidin mi sonĝis grandan ŝnuritan ŝtuparon. Dekjara knabo sentime iris sur tiun ĉi ŝtuparon al la ĉielo. Li iris kaj ridis kaj lia rido tintis kiel forta sonorilo.

La ĉasisto de sonĝoj rakontis la sonĝojn, ni gapante aŭskultis lin kaj nerimarkeble iĝis noktomezo. Li kvazaŭ havis nevideblajn antenojn per kiuj li perceptis siajn neordinarajn sonĝojn aŭ li elprenis ilin el profunda mirinda lago. Ni aŭskultis, sed jam estis tre malfrue, ni komencis oscedi.

La ĉasisto de sonĝoj ĉesis rakonti, li ekstaris de la tablo, prenis siajn grandajn valizojn kaj ekiris al la dua etaĝo, kie estis la dormoĉambroj de la hotelo. Li diris:

-Amikoj, bonan nokton, mi scivolas kian sonĝon mi sonĝos ĉi nokte.

Ni rigardis lin kaj ŝajnis al ni, ke en liaj grandaj valizoj ne estas okulvitroj, sed sennombraj miraklaj sonĝoj.

Mi ne scias, ĉu tiam, kiam mi estis infano, mi kredis je liaj miraklaj sonĝoj, sed la ĉasisto de sonĝoj malfermis antaŭ ni pordon de mirinda mondo kaj iĝis nin revii. Ja, en la vivo nepre devas esti iu, kiu montros al ni la vojon al la revoj.

LA TREZORO

Pri la mirakla trezoro rakontis la avo de Bojan. Antaŭ multaj jaroj sur la insulo “Sankta Nikolao” estis kaŝita la granda trezoro de iama taĉmentestro Angel.

-Ĝi estas kaŝita – diris la avo - tie, sub la monaĥejo. Mi scias kie ĝuste ĝi estas, sed bedaŭrinde mi ne povas preni ĝin. Ja nun la insulo estas armea teritorio. Oni zorge gardas ĝin kaj civila persono ne povas iri tien.

La avo ofte prenis el malnova kesto flaviĝintan paperon, sur kiu estis desegnita mapo. Li rigardis ĝin per siaj miopaj okuloj kaj balancis sian blankharan kapon.

-Jen – montris li la mapon kaj lia voĉo tremis pro emocio. – Tio ĉi estas la insulo.

La desegnaĵo sur la papero jam tute malklaris, sed la avo strabis al ĝi kaj kvazaŭ parkere sciis kion signifas ĉiuj streketo, kruceto, cirklo kaj punkto sur la mapo.

-Tio estas la maro – klarigis li. – Tio estas la bordo kaj tiu ĉi cirklo - la insulo. Ĉi tie estas montrita la monaĥejo kaj oriente de ĝi troviĝas puto. Jen, tiu ĉi eta cirklo. En la puto ne estas akvo, delonge ĝi sekiĝis aŭ en ĝi neniam estis akvo. Kiu deziras trovi la trezoron, devas eniri la puton. Tie estas tunelo kaj tra ĝi oni iros al la loko, kie estas la trezoro, sub la altaro de la monaĥeja preĝejo. Tie estas ŝtonplato kaj sur ĝi - ĉizita kruco. Sub la ŝtonplato estas la trezoro. Bone mi scias, sed ne eblas iri al la insulo. Nun soldatoj gardas ĝin kaj eĉ birdo ne povas traflugi tie.

Bojan bone memoris la rakonton de la avo kaj kiam la avo mortis, Bojan prenis la mapon kaj kaŝis ĝin.

La jaroj pasis. Bojan senĉese meditis pri la trezoro, songis ĝin, imagis, ke kaŝe li iras al la insulo, descendas en la puton, ekiras en la tunelon, trovas la ŝtonplaton kun la ĉizita kruco, prenas la trezoron kaj poste silente kaj nerimarkeble revenas hejmen.

Iun tagon tamen oni anoncis, ke la armeo ne plu okupos la insulon. Oni forveturigis de tie la armeajn teknikaĵojn kaj aparataron.

Post unu jaro la monaĥejo sur la insulo estis renovigita, oni konstruis hotelon, modernan restoracion kaj ĉiutage ŝipeto veturigis turistojn al la insulo.

“Jen alvenis la momento, ke mi iru por la trezoro – diris al si mem Bojan.”

Li havis fiŝkaptistan boaton kaj de tempo al tempo li kutimis fiŝkaptadi.

Iun nokton Bojan atente preparis sin por ekiri al la insulo kaj realigi sian celon. Li prenis ĉion necesan: la mapon, ŝnuron, poŝlanternon, ilojn, iris al la marbordo, kie estis la boato, puŝis ĝin en la maron kaj ekremis.

Pasis noktomezo, kiam Bojan venis al la insulo, ligis la boaton ĉe la eta kajo kaj silente ekpaŝis al monaĥejo. Oriente de la monaĥejo li vidis la puton. Regis mallumo kaj silento. Neniu videblis kaj nenio aŭdeblis. Nur de la maro alflugis la monotona plaŭdo de la ondoj.

Bojan ligis la ŝnuron, descendis en la puton, vidis la tunelon, ekiris en ĝin, trovis la lokon, kie estis la ŝtonplato kun ĉizita sur ĝi kruco. Iom malfacile li levis la ŝtonplaton kaj sub ĝi vidis keston, li malfermis ĝin kaj stuporiĝis. La kesto estis plenplena je oraj moneroj. Pro miro Bojan eĉ sonon ne povis prononci. Tiom da ormoneroj li neniam vidis en la vivo. Obsedis lin senlima ĝojo. Jam li sciis kiel li agos. Li aĉetos grandan luksan domon, modernan aŭton, vilaon kaj de nun lia vivo estos feliĉa kaj senzorga.

Bojan metis la ormonerojn en la grandan sakon, kiun li portis kaj ekiris reen. Li kvazaŭ havis flugilojn kaj ne iris, sed flugis. Tamen la tunelo, en kiun li iris, gvidis lin al alia tunelo, poste al tria kaj Bojan perdis la veran direkton. Li revenis, poste denove ekiris antaŭen, sed denove ne trovis la tunelon, laŭ kiu li alvenis. Dum horoj li iris, revenis kaj denove iris, sed vane. Li ne povis eliri el la tuneloj. Elĉerpita li falis kaj

konsciis, ke plu neniam li sukcesos eliri el la tuneloj, el tiu ĉi diabla labirinto.

Matene la familianoj de Bojan vidis, ke li ne estas hejme kaj ne sciis kien li iris. Ili atendis lin tri tagojn kaj anoncis en la policejo, ke li malaperis. La polico serĉis lin, sed vane. Oni nenie trovis lin.

Nur lia fiŝkaptista boato restis ligita ĉe la kajo de la insulo “Sankta Nikolao”.

NEORDINARA PROPONO

Filip malfermis okulojn. En la unua momento ŝajnis al li, ke ĉio ĉirkaŭ li estas blanka. “Kie mi estas? – demandis sin Filip. – Ĉu mi songas?” Sed li ne songis, li kuŝis en lito, kovrita per blanka littuko. Preskaŭ tutan minuton li restis senmova en la lito. Poste al li proksimiĝis maljuna viro. Filip aŭdis la bruon de liaj pantofloj sur la marmora planko. La viro kliniĝis super Filip kaj ekridetis. Li estis ĉirkaŭ sepdekjara kun densa blanka hararo, grizaj lipharoj kaj nigraj okuloj, kiuj brilis.

-Finfine vi vekigis – ekparolis la viro mallaŭte kaj Filip eksentis en lia voĉo varmecon kaj zorgemon, sed lia prononco estis stranga. – Kiel vi fartas? – demandis la nekonata viro, rigardante Filip per siaj grandaj okuloj.

Filip provis ion respondi, sed ne havis fortojn kaj nur palpebrumis.

-Vi vekigis, vi vekigis – ripetis la viro.

Kelkajn minutojn ili rigardis unu la alian kaj poste Filip pene ekflustris:

-Kie mi estas?

-En hospitalo – respondis la viro.

-Ĉu en hospitalo? Kio okazis?

-Ĉu vi ne memoras? Vi havis akcidenton kaj oni alportis vin ĉi tien antaŭ semajno, sed dank’ al Dio vi vekigis. La danĝero pasis.

-En kiu hospitalo mi estas? – demandis Filip.

-En la urba hospitalo, en Tesaloniko.

-En Tesaloniko – ripetis Filip kaj komencis malrapide rememori kio okazis.

Kun siaj amikoj Anton kaj Miro, Filip vojaĝis aŭte al Greklando. Anton havis vendejon en Sofio kaj devis aĉeti varojn de Ateno. Filip kaj Miro akompanis lin. Reveninte de Ateno, ili vizitis kelkajn grekajn urbojn. Estis agrabla veturado,

sed proksime al Tesaloniko ilia aŭto koliziis kun alia aŭto. Anton kaj Miro feliĉe ne vundiĝis, sed Filip perdis la konscion.

-Jam tutan semajnon vi estas en la hospitalo – klarigis la maljunulo.

-Kie estas miaj amikoj?

-Ili bone fartas, venis vidi vin, sed ne povis plu resti en Greklando. Ilia mono elĉerpiĝis kaj ili forveturis al Bulgario, petis min, ke mi zorgu pri vi.

-Dankon.

-Ne danku al mi, sed al Dio, kiu savis vin.

Post du tagoj Filip komencis ekstari kaj faris kelkajn paŝojn en la ĉambro. Oĉjo Kostas, tiel nomiĝis la maljunulo, daŭre zorgis pri li, donis al Filip akvon, helpis lin, apogis lin, kiam Filip paŝis en la ĉambro.

-Oĉjo Kostas – demandis foje Filip – vi sufiĉe bone parolas la bulgaran lingvon, sed via prononco estas iom stranga. Kie vi lernis ĝin?

-Mi lernis la lingvon de mia avino, sed kiam ŝi mortis, mi forgesis ĝin. Mia patrino evitis paroli bulgare, sed nun kun vi mi komencis rememori la lingvon.

-Kaj kial vi estas en la hospitalo? – demandis Filip.

-Mi havas malnovan malsanon. Mia stomako doloras kaj de tempo al tempo oni kuracas min ĉi tie.

Ĉiutage la kuracistoj vizitis la malsanulojn kaj Filip demandis ilin kiam oni ellasos lin el la hospitalo. La kuracistoj respondis, ke li devas resti ankoraŭ kelkajn tagojn, por ke ili estu certaj, ke li bone resaniĝis.

Ekstere la arboj verdiĝis. La ĉielo diafane bluis kaj la suna lumo estis kiel akvofalo. Filip deziris pli baldaŭ forlasi la hospitalon kaj reveni en Bulgarion. Ĉiutage liaj amikoj telefonis al li kaj ili ĝojis, ke Filip jam bone fartas.

Posttagmeze Filip kaj oĉjo Kostas kutimis promenadi en la parko de la hospitalo. Ili sidis sur benko kaj konversaciis. Filip rakontis pri si, pri Sofio. Li estis inĝeniero, fakulo pri

komputiloj kaj diris al la maljunulo, ke jam ege mankas al li la konatoj kaj la parencoj en Sofio.

Foje, kiam ili sidis sur benko sub olivarbo, oĉjo Kostas alrigardis Filipon kaj malrapide ekparolis:

-Filip, mi deziras diri ion al vi.

-Diru, oĉjo Kostas – ekridetis Filip.

-Temas pri mia filino. Mi havas nur unu tridekjaran filinon. Ŝia nomo estas Irini. Mia edzino forpasis antaŭ kvin jaroj. Irini loĝas kaj laboras en Ateno, sed ŝi ne estas edziniĝinta kaj tio maltrankviligas min. Ŝi devas jam edziniĝi, havi infanojn. Mi estas maljuna kaj mi deziras vidi nepojn. Mi ne scias kiom da tempo mi ankoraŭ vivos. Do, mi deziras konatigi vin kun Irini kaj vi edziĝu al ŝi.

Filip alrigardis lin konsternite.

-Ĉu vi parolas serioze, oĉjo Kostas?

-Jes. Mia filino estas bela. Vi vidus ŝin. Post kelkaj tagoj ŝi venos en la hospitalon.

-Sed ni ne konas unu la alian. Povas esti, ke mi ne plaĉos al Irini – diris Filip.

-Vi plaĉos al ŝi. Mi parolis telefone kun ŝi kaj mi diris, ke vi estas tre bona junulo, edukita, inteligenta.

-Sed oĉjo Kostas...

-Ne maltrankviliĝu. Vi kaj Irini vivos tre bone. Nenio mankos al via familio. Mi havas olivan arbaron, oranĝajn ĝardenojn. Ĉi tie, en Tesaloniko, mi havas grandan domon kaj en Ateno – luksan apartamenton. Mi havas monon. Iu devas heredi mian havaĵon, sed bedaŭrinde Irini ankoraŭ ne edziniĝas. Mi ne deziras, ke ŝi vivu sola. Ŝi nepre devas trovi bonan edzon. Tial mi decidis paroli kun vi. Vi estas bona junulo. Vi estas bulgaro. En mi kaj en Irini same estas bulgara sango. Vi ambaŭ havos infanojn kaj tiel vi daŭrigos nian genton. Diru “jes”. Vi plaĉos al Irini. Ŝi similas al mi. Al ŝi plaĉas viroj kiel vi. Vi estas svelta, alta kun bluaj okuloj kaj hela hararo. Irini estas kiel mi. Ŝi havas nigrajn okulojn kaj nigran hararon.

-Oĉjo Kostas, vi ĉion pripensis, sed mi ne ŝatas loĝi en Greklando.

-Vi ne estas edziĝinta, ĉu?

-Ne – respondis Filip.

-Do, ne estas problemo. La homo loĝas tie, kie ĝi bone fartas. Ĉi tie vi havos ĉion. Vi kaj Irini povus loĝi aŭ en Tesaloniko, aŭ en Ateno. Mi ne ĝenos vian familian vivon. Vi kaj Irini estos feliĉaj, vi havos infanojn kaj vi bone interkompreniĝos.

Oĉjo Kostas eksilentis.

“Esti patro – estas respondeco – meditis Filip. – La patroj zorgas pri la bono de siaj infanoj. Oĉjo Kostas maltrankviliĝis, ĉar Irini ankoraŭ ne edziniĝis. Li deziras nepojn. Li laboris, havas domojn, ĝardenojn kaj nature li deziras, ke iu daŭrigu lian laboron, iu zorgu pri tio, kion li akiris en la vivo.”

Post du tagoj Irini venis en la hospitalon por viziti sian patron. Oĉjo Kostas konatigis ŝin kun Filip. Vere ŝi estis bela, havis sveltan korpon, ŝia hararo estis longa, peĉkolora kaj ŝiaj okuloj brilis kiel la okuloj de oĉjo Kostas, sed la plej bela estis ŝia rideto, kara kaj bonanima. Irini estis ĉirkaŭ tridekjara, ĝuste en tiu ĉi aĝo, kiam la virinoj estas kiel maturaj fruktoj kun dolĉa suko.

Irini ne sciis bulgaran lingvon kaj Filip kaj ŝi konversaciis angle. Ŝi demandis al Filip kiel li fartas kaj ĉu ŝi povus helpi lin per io. Ŝi proponis al li, ke post la eliro el la hospitalo, li restu kelkajn tagojn en la domo de ŝia patro en Tesaloniko. Irini diris, ke oĉjo Kostas rakontis al ŝi pri Filip kaj oĉjo Kostas ekamis Filipon kiel filon.

Oĉjo Kostas sidis apud ili, aŭskultis ilin, malgraŭ ke li ne komprenis la anglan, sed lia vizaĝo esprimis senliman feliĉon.

La sekvan tagon alvenis Anton, la amiko de Filip, kaj Filip preparis sin por reveni en Sofion. Li adiaŭis oĉjon Kostas. La maljunulo donis al li papereton.

-Jen – diris li – estas mia adreso kaj telefonnumero. Pripensu kaj kiam vi decidis, venu. Ni faros grandan edziĝfeston.

-Koran dankon, oĉjo Kostas. Dankon pro ĉio, pro la helpo kaj la zorgoj, sed mi ne deziras mensogi al vi, nek al Irini. Sincere mi diras al vi, ke mi ne povas akcepti vian proponon. Mi ne povas forlasi miajn parencojn kaj veni loĝi ĉi tie. Vi scias, ke ĉiu arbo kreskas tie, kie oni plantis ĝin – diris Filip.

-Jes, vi pravas. Estu sana kaj ne forgesu min. Mi deziras al vi bonan vojaĝon al Bulgario – diris la maljunulo.

Filip manpremis lin, alrigardis lin kaj denove rimarkis en liaj okuloj la karecon, kiun li vidis, kiam oĉjo Kostas alparolis lin unuan fojon en la hospitala ĉambro.

SINJORO DUKOV KAJ LA PUPO

Ĉio komenciĝis en julia posttagmezo. Sinjoro Dukov rapidis hejmen. Li ŝvitis, lia kapo doloris kaj li planis reveninte hejmen, tuj senvestiĝi kaj eniri la banejon, kie la friska akvo freŝigos lin.

Li iris sur la strato, sed io igis lin halti kaj alrigardi la vitrinon de la vendejo, preter kiu li pasis. Estis malgranda vitrino de antikvaĵvendejo. Ordinare en la vitrinoj de aliaj antikvaĵvendejoj estis sennombraj aĵoj: malnovaj libroj, vazoj, pentraĵoj, muzikinstrumentoj, kandeligoj, sed en tiu ĉi vitrino staris nur unu infana pupo kaj verŝajne ĝi vekis la atenton de sinjoro Dukov. Li haltis por pli bone pririgardi la pupon. Ĝis nun li neniam interesiĝis pri pupoj. Li havis nek infanojn, nek nepojn.

Kiam li estis knabo, li ludis per ludiloj por knaboj: ligna pafilo, infana kamioneto, infana pafarko. Pli ĝuste li havis iajn ludilojn, sed malofte li ludis per ili. Lia patro, serioza, severa viro, ne permesis al li ludi. La patro instruis lin legi jam en la frua infaneco, aĉetis por li librojn, kiujn sinjoro Dukov devis diligente legi kaj poste rakonti al la patro la enhavon de la libroj. Tiel lia infaneco pasis en librelegado kaj li ne memoris ĉu li havis ŝatatan ludilon aŭ ne.

Nun sinjoro Dukov atente rigardis la pupon, kiu estis alta ĉirkaŭ kvindek centimetrojn kun blonda hararo, mola kiel silko, helverdaj okuloj kaj kun longa blua robo, kies ŝtofo iom brilis. La glata vizaĝo de la pupo eligis karecon kaj al sinjoro Dukov ŝajnis, ke la pupo ridetas. Ĝiaj teneraj lipoj estis iom malfermitaj kaj videblis la dentoj kiel etaj perloj. Sur la dekstra brako de la pupo estis etikedo kun surskribo “Sonja”, verŝajne ĝia nomo.

Kelkajn minutojn sinjoro Dukov staris senmova antaŭ la vitrino kaj ne povis klarigi al si mem kial tiel atente li observas tiun ĉi pupon. Li eĉ ironie nomis sin gapulo. Finfine li turnis sin por ekiri, sed tuj denove haltis. Ŝajne la pupo

okulsignis al li. Sinjoro Dukov ekridetis. “Eble mi suferis sunfrapon aŭ mi fartas malbone – meditis li.” Tamen li alrigardis la pupon. Ne. Ne eblis. La pupo estis senmova. Li ekiris kaj la pupo denove okulsignis. Nun sinjoro Dukov tre bone vidis, ke ĝi okulsignis per sia dekstra okulo kaj tio tute ne estis dubinda. Sinjoro Dukov meditis. Plej verŝajne en la pupo estas iu meĥanismo per kiu de tempo al tempo ĝi okulsignas. Tio tiklis lian scivolon kaj li decidis eniri la vendejon kaj pli detale trarigardi la pupon. Li malfermis la pordon kaj enpaŝis en obskuran ejon, kie sur la bretoj videblis diversaj bagatelaĵoj. Kvazaŭ neniŭ estis ene, sed subite de iu angulo aperis malalta oldulo, kiu afable salutis lin:

-Bonan tagon, sinjoro. Kion vi bonvolos?

Dukov ne povis tuj diri kion li deziras kaj nur demandis:

-Ĉu eblas, ke mi vidu la pupon, kiu estas en la vitrino?

-Kompreneble – respondis la oldulo kaj facilmove proksimiĝis al la vitrino por preni la pupon.

-Tiu ĉi pupo – diris li – estas unika. Oni faris ĝin en Germanio, en la kvardekaj jaroj de la pasinta jarcento dum la milito. Ĝi prononcas “panjo”n kaj havas la nomon “Sonja” – kaj la oldulo montris la etiketon sur ĝia brako. Poste li iom klinis la pupon kaj ĝi sible prononcis “panjo”n.

-Ĉu la pupo okulsignas? – demandis Dukov.

La oldulo alrigardis lin embarasite.

-Kion vi diras – ne komprenis li.

-Ĉu ĝi okulsignas? – ripetis Dukov.

-Ne. Tute ne – respondis la vendisto. – Tio estas pupo, ne homo kaj ĝi ne povas okulsigni.

-Kiam mi estis ekstere, antaŭ la vitrino, mi tre bone vidis, ke ĝi okulsignas – diris Dukov.

La oldulo rigardis lin mirigite kaj verŝajne opiniis, ke Dukov estas mensmalsana. En la grizaj okuletoj de la oldulo aperis timo. Por montri al la vendisto, ke li estas tute normala, Dukov demandis lin kial nur la pupo estas en la vitrino.

-Mi devas rapide vendi ĝin – respondis la oldulo. – Mi promesis al konata familio nepre vendi ĝin kaj tial nur ĝi estas en la vitrino.

-Kiom ĝi kostas? – demandis Dukov.

La oldulo diris la prezon kaj Dukov nevole fajfis.

-Ĉu, tre multekosta?

-Ja, mi diris al vi, ke ĝi estas unika. Delonge jam ne estas tiaj pupoj. Verŝajne en la tuta mondo estas nur tri aŭ kvar similaj...

-Dankon. Vi tre afablis. Ĝis revido – diris Dukov kaj rapide eliris el la vendejo.

Li revenis hejmen kaj kiel li planis, tuj eniris la banejon kaj bone freŝigis sin. Poste li sidis en la ĉambro kaj trafoliumis la ĵurnalon, kiun li alportis. Kiam la suno komencis subiri, Dukov eliris el la domo por iom promenadi. En la proksima parko li sidis sur benko sub la ombro de malnova akacio.

Dukov loĝis sola. Li ne havis familion. Kiam li estis juna li ne edziĝis. Poste li bedaŭris, sed iom post iom alkutimiĝis al la soleco. Lia tagordo estis preciza kaj neniu maltrankviligis lin. Dum li estis en la parko, li forgesis la pupon. Vespere li revenis hejmen, spektis iom la televiziajn novaĵojn kaj poste ekdormis. Kutime li rapide ekdormis. Tamen ĉi-nokte li sonĝis la pupon, kiu denove okulsignis al li. Dukov vekigis kaj ĝis la mateno li ne povis ekdormi denove.

Tutan tagon li meditis pri la pupo, ne povis ion alian fari kaj tute ne eblis liberiĝi de ĝi. Tri noktojn li sonĝis ĝin. La kvaran tagon li iris en la vendejon kaj aĉetis la pupon. La oldulo kun la grizaj okuletoj estis senlime feliĉa kaj ne ĉesis paroli dum li pakis la pupon.

-Sinjoro, vi aĉetis unikan pupon. La mono, kiun vi donis, ne estis vana. Via nepino ege, ege ĝojos.

Dukov prenis la pupon kaj rapidis hejmen por ke lin ne renkontu iu konato, kiu priridos lin. Hejme Dukov metis la pupon sur la komodon ĉe la televidilo kaj provis forgesi ĝin, sed de tiu ĉi momento lia vivo ŝanĝiĝis.

Kiam li estis hejme, la pupo ridetis kaj okulsignis al li, sed ofte li forestis kaj kiam li revenis la pupo rigardis lin malafable kaj kolere. En la unuaj tagoj Dukov opiniis, ke tiel ŝajnas al li, sed poste konvinkiĝis, ke li ne eraras. Li eĉ sentis, ke la pupo parolas al li. Ĝi parolis senvoĉe kaj sen vortoj, sed li komprenis ĉion. La pupo rakontis, ke ĝin posedis multaj knabinoj kaj ĝi loĝis en diversaj familioj, iuj el ili tre riĉaj. La homoj estis bonaj kaj malbonaj. La plej interesa estis la historio pri iu familio, en kiu la patro de la knabino mortis. La viro, al kiu edziniĝis la patrino, ne amis la knabinon kaj fojfoje vangofrapis ŝin. La pupo decidis doni al li bonan lecionon. Foje, kiam la patro vangofrapis la knabinon, la pupo alrigardis lin kaj lia dekstra brako ekpendis senmova. Tutan semajnon li povis teni nek la kuleron, nek la forkon kaj li ne komprenis kia estas la kialo, sed plu li ne vangofrapis la knabinon.

Dukov demandis sin ĉu la pupo havas riĉan fantazion aŭ ĉu li mem subkonscie elpensas tiujn ĉi historiojn. De tago al tago li iĝis pli embarasita kaj pli embarasita, kaj ne sciis ĉu li songas, deliras aŭ ĉu ĉio estas reala.

Foje li decidis veturi al la maro por unusemajna ripozo. Kiam li preparis sin por la veturado, la pupo rigardis lin kolere. Li ŝajnigis, ke li ne rimarkas ĝin.

Kiam post semajno li revenis, la pupo ne estis hejme. Dukov ne komprenis kiel ĝi malaperis. Li serĉis ĝin en la tuta loĝejo, sub la skribotablo, sub la lito, sed nenie trovis ĝin. De tiu ĉi tago li ĉagreniĝis. Ja, li perdis sian plej karan amikon.

LA VIOLONISTO

Aŭtuno. Friska ora aŭtuno. Antaŭ la fenestro la folioj de la olda kaŝtanarbo falas kiel larmoj. En la ĉambro estas silento. Slava staras ĉe la fenestro kaj nombras la falantajn foliojn de la kaŝtanarbo. Nur antaŭ kelkaj tagoj tiuj ĉi folioj estis oraj, ruĝaj, brunaj. Nun la nudaj nigraj arbobranĉoj similas al brakoj, etenditaj pete al la ĉielo. La arbo estas trista kaj soleca kiel ŝi. Jam multajn jarojn Slava loĝas sola. La homoj, kiujn ŝi amis forpasis unu post la alia. Ili, kiel la arbofolioj, forflugis ien, pelitaj de frosta vento. Restis nur Elka, la filino de Slava, sed ŝi loĝas malproksime, trans maroj kaj oceanoj.

De kelkaj tagoj tamen ĉio ŝanĝiĝis. Elka revenis. Ŝi kvazaŭ alflugis de malproksime kiel aŭtuna folio. Hodiaŭ Slava atendas ŝin veni en la domon.

Jen, subite ekkrakas ŝlosilo kaj en la ĉambrom eniras Elka. Kiom bela ŝi estas. Ne gravas, ke ŝia filino jam plenaĝas. Elka ridetas kiel ĉiam, ŝiaj olivonigraj okuloj brilas kaj ŝia hararo ankoraŭ estas densa, malgraŭ ke ie-tie videblas blankaj haroj kiel arĝentaj fadenoj.

Elka diras:

-Panjo, mi aĉetis biletojn por simfonia koncerto. Mi scias, ke vi tre ŝatas la muzikon, sed delonge vi ne estis ĉe koncerto.

-Vi scias, ke mi malfacile paŝas, miaj piedoj doloras, kiel mi iros al la koncerto? – rimarkas Slava.

-Ne zorgu pri tio. Ni iros per taksio. Mi estos ĉe vi. Mi deziras donaci al vi tiun ĉi etan ĝojon.

-Bone – diras Slava kaj feliĉo lumigas ŝian vizaĝon.

Simfonia koncerto. Post tiom da jaroj ŝi spektos kaj aŭskultos simfonian koncerton. La ĝojo levas Slavan supren, lulas ŝin kiel mara ondo. Jes, ŝi denove aŭskultos la ŝatatan muzikon kaj denove dronos en mirinda harmonio, en la raveco de la simfonioj. Slava sentas profundan plezuron, kiu varmigas ŝian koron. Ŝia emocio kreskas. Kion ŝi surhavu, kian robon,

kiajn ŝuojn? Ŝiaj roboj jam delonge estas malmodaj, la ŝuoj – malnovaj, tamen, kiu rigardus ŝin? Ja, Slava estas maldika, malalta virino kun pala vazaĝo kaj kun okuloj kiel blueca nebulo.

La koncerta halo plenplenas kaj zumas kiel abelujo. Ĉiuj atendas la komencon, sed la plej malpacienca estas Slava. Ŝi tremas, peze spiras kaj sentas varmon kvazaŭ ŝi estas en forno.

La bruo en la halo silentiĝas. Sur la scenejon venas la orkestrestro. Li iom klinas sin antaŭ la publiko, poste li turnas sin al la muzikantoj kaj la muziko ekflugas kiel suda vento. En la okuloj de Slava aperas larmoj. La simfonioj sekvas unu post la alia.

Juna violonisto komencas ludi. La violono eligas tenerajn tonojn kiel karesan maran lirlon. Slava rigardas la violoniston kaj ŝajnas al ŝi, ke ŝi konas lin, sed de kie kaj de kiam? Ne eblas. Li estas tre juna. Kie kaj kiam Slava vidis lin? Li estas tre talenta.

Subite kvazaŭ nevidebla kurteno malfermiĝas antaŭ ŝiaj okuloj. Delonge, antaŭ jaroj, Slava estis vendistino en muzikvendejo, kiu troviĝis sur la ĉefstrato de la urbo. Multaj homoj venis en la vendejon por aĉeti muzikdiskojn, sed antaŭ ol aĉeti diskon la aĉetantoj deziris aŭskulti ĝin.

En la vendejon ofte venis kvin-sesjara knabo. Li staris en la angulo kaj dum horo aŭskultis la muzikon de la diskoj. Foje Slava demandis lin:

-Kio estas via nomo?

-Vasko – respondis la knabo.

-Kial vi venas en la vendejon kaj ne ludas kun la infanoj?

-Mi deziras aŭskulti la muzikon – respondis li kaj klinis sian krispharan kapon.

-Bone, diru al via patrino veni ĉi tien. Mi deziras paroli kun ŝi.

Tiam Vasko alrigardis Slavan per siaj grandaj okuloj.

La sekvan tagon la patrino de Vasko venis en la vendejon.

-Sinjorino, - komencis Slava – via filo tre ŝatas muzikon. Li nepre devas okupiĝi pri muziko.

La patrino de Vasko surpriziĝis.

-Mi tute ne supozis, ke li ŝatas muzikon. Mi kaj mia edzo ne estas muzikŝatantoj. Mi estas kudristino kaj mia edzo – ŝoforo.

-Via filo nepre devas lerni muzikon – diris Slava.

Post jaroj Slava eksciis, ke Vasko jam lernas en muziklernejo. Nun li staras sur la scenejo antaŭ ŝi en la plenplena halo kaj violonludas. Slava mallaŭte ekflustris: “Vasko, verŝajne ankaŭ mi helpis, ke vi fariĝu fama violonisto.”

LA INCENDIO

Oĉjo Milko loĝis je la rando de la vilaĝo sur la malgranda strato “Siringo”. Ĉirkaŭ sepdekjara li estis alta, vigla kun bluaj okuloj kiel montaj lagoj. De matene ĝis vespere li laboris en la korto de la domo: falĉis la herbon, ĉirkaŭtranĉis la branĉojn de la fruktarboj, akvumis la legomojn. Ĉe la domo de oĉjo Milko estis la domo de lia frato Dinko, sed li kaj lia edzino forpasis antaŭ kvin jaroj kaj nun en la domo loĝis neniu; tial kaj la domo, kaj la korto similis al dezerto.

Iun dimanĉon matene oĉjo Milko rimarkis viron en la korto de la frata domo. Kiu li estas – demandis sin oĉjo Milko kaj tuj iris vidi kiu estas la viro, kiu vagas en la najbara korto. Oĉjo Milko eniris la korton. La nekonata viro staris sur la ŝtuparo antaŭ la domo kaj kiam oĉjo Milko proksimiĝis, li konstatis, ke la viro estas lia nevo, la filo de lia frato.

-Eftim, ĉu estas vi? – ekĝojis oĉjo Milko. – Mi ne bone vidis vin kaj mi opiniis, ke ŝtelisto eniris la korton.

-Estas mi, oĉjo, - diris Eftim.

-Kiel vi fartas? Delonge vi ne venis ĉi tien. Pasis kvin jaroj post la morto de viaj gepatroj.

-Jes. Mi decidis konstrui ĉi tie vilaon kaj mi venis trarigardi la domon kaj la korton.

Eftim estis kvardekjara, alta, forta, bluokula kiel oĉjo Milko. Nun li surhavis ĝinzon kaj verdan sportan jakon.

-Tre bone, kara nevo. Tio estas via gepatra domo kaj vi devas zorgi pri ĝi – diris oĉjo Milko.

La onklo kaj la nevo iom babilis kaj Eftim foriris. Ĝoja estis oĉjo Milko, ke Eftim konstruos ĉi tie vilaon. “Mi havos najbaron, mian nevon – diris oĉjo Milko. - Li venos ĉi tien kun sia familio kaj ofte ni estos kune. “

Oĉjo Milko fieris pri sia nevo. Eftim loĝis en la ĉefurbo, estis fama, riĉa, direktoro de granda uzino. Oni ofte intervjuis lin en la televido. Li parolis pri importo kaj eksporto de gravaj varoj.

Post monato Eftim komencis konstrui la vilaon. Unue li ruinigis la malnovan gepatran domon kaj entreprenis grandan laboron. Estis raŭpobuldozoj, kamionoj, kiuj alportis la konstrumaterialojn, multaj laboristoj...

La konstruado daŭris du jarojn. Iun tagon Eftim venis al oĉjo Milko kaj diris:

-Oĉjo, mi devas preni parton el via korto, ĉar tia estas la konstruplano de la vilao.

Tio tute ne plaĉis al oĉjo Milko, sed li konsentis. Ja, Eftim estas lia nevo kaj oĉjo Milko ne deziris kvereli kun li. Tiel Eftim plivastigis sian korton. Finfine la vilao estis preta. Belega vilao – trietaĝa kun garaĝo, kun kiosko kaj granda baseno en la korto, kun florigardeno kaj fruktaj arboj. Tiam luksan vilaon ĝis nun oĉjo Milko ne vidis. Tamen Eftim prenis spacon ne nur el la korto de oĉjo Milko, sed same el la strato “Siringo” kaj tio jam serioze maltrankviligis oĉjon Milko.

-Kion vi faras, Eftim? – diris oĉjo Milko. – Kial vi vastigas vian korton per spaco el la strato?

-Laŭ malnova plano de la vilaĝo ĝis tie – kaj Eftim montris la straton – estis la parcelo de mia patro kaj nun mi restarigas ĝin. Krom tio mia vilao estas la lasta sur la strato.

-Tamen la strato gvidas al la arbaro – klarigis oĉjo Milko.

-Ne gravas - respondis Eftim. – Se oni iros al la arbaro, oni iru per la alia strato, kiu estas malantaŭ la domoj.

Oĉjo Milko nur silente rigardis Eftim kaj diris al si mem: “Avida kaj nesatigebla estas la homa naturo. Se eblas, oni konkeros la tutan mondon.”

Eftim faris grandan feran barilon kaj baris la duonstraton.

Ĉi-jare la somero estis senpluva. Du monatojn, julion kaj aŭguston ne pluvis. Ĉio sekiĝis. Oni vane akvumis la ĝardenojn, sed la legomoj forvelkis. Iun nokton bruoj kaj krioj vekis oĉjon Milko. Li saltis de la lito kaj rigardis tra la fenestro.

La arbaro, kiu estis je cent metroj de la vilao de Eftim brulis. La najbaroj, kiuj unuaj vidis la incendion, provis estingi la fajron, sed ne sukcesis. Iu telefonis al fajrobrigado kaj postnelonge venis la fajrobrigadaj aŭtoj, sed ili ne povis iri al la arbaro, ĉar la barilo de Eftim baris la straton. La fajrobrigadaj aŭtoj devis ĉirkaŭiri kaj perdis tempon. Tamen la fajro ne atendis. La flamoj kiel grandegaj langoj rapide proksimiĝis. Ili atingis la barilon de Eftim, eniris la korton kaj la seka herbo tuj bruliĝis. La fajro bruligis la vilaon. Bone, ke neniu estis en ĝi. La fajrobrigadistoj ne sukcesis estingi la fajron. Nenio restis el la vilao, nur kelkaj muroj. Oĉjo Eftim rigardis la fajron kaj silente flustris: “Eftim, Eftim, mi diris al vi ne baru la straton, sed vi ne deziris aŭdi mian konsilon.”

ENVIO

Magdalena estis energia, lerta kaj kapablis solvi ĉiujn malfacilajn problemojn. Ŝi ne havis edzon, mem zorgis pri sia filo kaj helpis siajn gepatrojn, kiuj jam estis maljunaj. En la fabriko por infanaj ludiloj, kie Magdalena laboris, ĉiuj estimis ŝin. Ja, ŝi estis sperta laboristino, agis rapide kaj helpis la virinojn, kun kiuj ŝi laboris. Onklino Kina, la plej aĝa virino en la fabriko, ofte diris al Magdalena:

-Magdalena, tre bela vi estas, bela, sperta kaj lerta, ĉiam vi kare ridetas, kial vi ne edziniĝos denove? Ja, vi devas havi edzon, kiu helpas vin.

-Tio certe okazos, onjo Kina – respondis Magdalena – sed pro la laboro mi ne havas tempon serĉi edzon.

Tamen iun tagon la fabriko por infanaj ludiloj ĉesis funkcii kaj Magdalena ne plu laboris. Ŝiaj gepatroj serioze maltrankviliĝis.

-Magdalena – diris ŝia patrino. – Kiel ni vivos nun? Vi ne plu laboras, niaj pensioj estas malaltaj kaj ni ne povas helpi vin.

-Panjo, ne maltrankviliĝu. Mi ĉiam sukcesis solvi la problemojn kaj same nun mi sukcesos. Se oni deziras labori, oni nepre trovos laboron.

Kaj Magdalena rapide solvis la problemon. En la loĝkvartalo estis malgranda nutraĵvendejo, Magdalena luis ĝin kaj ŝi mem iĝis vendistino en la vendejo, kie oni povis aĉeti panon, fromaĝon, kolbasojn, konservaĵojn... La homojn, kiuj venis en la vendejon, ŝi renkontis afable, ridete, ŝi estis kara kaj multaj ŝatis aĉetadi en ŝia vendejo.

Tiu ĉi vintro estis frosta. Falis granda neĝo, la stratoj glaciigis. La norda vento hurlis kiel malsata lupu. En la loĝkvartalo estis kelkaj senhejmuloj, kiuj provis ie trovi azilon dum la frostaj tagoj. Ili vagis sur la stratoj, eniris en kafejojn, drinkejojn. Ofte ili staris sur la trotuaroj kaj almozpetis. Fojfoje iu el ili eniris la vendejon de Magdalena kaj elprenis el sia

ĉifona vesto kelkajn monerojn por aĉeti panon. Tio ĉagrenigis Magdalenan. Ofte ŝi donis panon al iu senhejmulo sen preni de li monon. La homoj miris kaj demandis ŝin kial ŝi donas panon senpage, sed Magdalena kutimis respondi:

-Ja, mi ne iĝos pli malriĉa.

Foje Magdalena decidis helpi la senhejmulojn kaj sur la vitrino de la vendejo ŝi metis grandan surskribon:

“Por la senhejmuloj la pano estas senpaga.”

Multaj eksciis pri tiu ĉi surskribo kaj en la vendejon de Magdalena komencis veni senhejmuloj el aliaj loĝkvartaloj de la urbo. Tamen ankaŭ la aĉetantoj en la vendejo de Magdalena plimultiĝis, kvazaŭ la surskribo havis miraklan forton.

Tion rimarkis la posedantoj de la najbaraj vendejoj, kiuj komencis envii al Magdalena.

Iun matenon malbona novaĵo disvastiĝis en la loĝkvartalo: “Dum la nokto oni bruligis la vendejon de Magdalena. “

Tio profunde ĉagrenigis la gepatrojn de Magdalena. Ŝia patrino ekploris:

-Magdalena, kion vi faros nun! Oni bruligis ne la vendejon, sed vin mem!

Tamen Magdalena alrigardis la patrinojn kaj nur diris:

-Panjo, ne ploru. Mi helpis al multaj homoj kaj certe estos iu, kiu helpos min. Dio estas bona.

LA PLEJ BELA REMEMORO

La loĝkvartalo estis malgranda. Kelkaj stratoj, domoj kun kortoj kaj en la kortoj floroj kaj fruktarboj, kiuj vintre havis blankajn ĉapelojn el mola neĝo. De matene ĝis vespere sur la stratoj videblis infanoj. Ili ludis, kuris, kriis.

Fojfoje Mila rememoris sian infanecon, la forpasintajn malproksimajn senzorgajn tagojn. De tiam pasis multaj jaroj. Nun la loĝkvartalo estas silenta, kvazaŭ senhoma. La tiamaj infanoj, jam plenkreskuloj, geedziĝis kaj malaperis ie kiel la hirundoj aŭtune. Mila tamen ne povas forgesi la tiamajn infanludojn. Vespere la infanoj kutimis kolektiĝi antaŭ la domo de Mila kaj rakontis unu al alia nekredablajn historiojn, timigajn, sed pli ofte gajajn kaj ridindajn.

Foje Zahari, la knabo, kiu loĝis en najbara domo, proponis, ke ĉiu infano rakontu kio plej ĝojigis lin aŭ ŝin. Zahari estis pli aĝa ol Mila kaj ne similis al aliaj knaboj. Li ne tre ŝatis la ludojn, pli multe legis librojn, rakontis kion li legis kaj la infanoj aŭskultis lin atente kaj silente.

Mila jam ne memoris kion rakontis la aliaj infanoj, sed kiam Zahari demandis ŝin kio plej ĝojigis ŝin, Mila tuj komencis rakonti, ke dum iu Kristnaska festo, kiam ŝi estis lernantino en dua klaso, ŝi malsaniĝis, devis resti hejme kaj ne povis ludi kun la infanoj. Ŝi tristis, sed matene, antaŭ la Kristnasko, kiam ŝi vekigis kaj rigardis tra la fenestro, ŝi vidis, ke la abio en la korto de la domo estis ornamita per Kristnaskaj ornamaĵoj. Multaj koloraj lampetoj lumis sur la verdaj branĉoj. Tio ege surprizis kaj ĝojigis Milan. La abio similis al brilanta stelo kaj la tuta korto, neĝkovrita, estis kiel mirakla fabelo. Poste Mila eksciis, ke ŝia patro nokte kaŝe ornamis la abion.

Tiun ĉi infanan rememoron Mila neniam forgesis. Eĉ nun ŝi ofte rigardis la korton kun la abio, kiu jam estas pli alta, pli granda kaj pli verda.

Delonge la gefiloj de Mila loĝis malproksime de ŝi, en granda urbo. Zahari, la najbaro, finstudis en la ĉefurbo, fariĝis

inĝeniero kaj ne tre ofte venis ĉi tien, kie loĝas lia fratino. Ja, rapide pasis la jaroj, meditis Mila. Jen, baldaŭ denove estos Kristnasko kaj denove Mila sentos la saman emocion kiel iam, kiam ŝi estis infano. Nun ŝi rapidis aĉeti donacojn por la genepoj, pretigi la Kristnaskajn manĝaĵojn, ĉar venos al ŝi la gefiloj, la genepoj kaj Mila devis ĝojigi ilin.

Dum Kristnaska vespero la domo de Mila plenplenis je homoj. Eĥis infanaj ridoj, ĝojo brilis en la okuloj. Estis belega festo.

Matene Mila frue vekigis por pretigi la matenmanĝon. Ŝi kuiris kafon, teon, faris platkukon kaj nevole ŝi ekrigardis tra la fenestro. Miraklo! En la korto la abio estis denove ornamita. Kristnaskaj ornamaĵoj brilis sur ĝiaj branĉoj. Denove la sama ĝojo kiel antaŭ multaj jaroj, obsedis Milan. Kelkajn minutojn ŝi staris senmova kaj nur ekflustris: “Zahari”. Ja, tion faris Zahari. Li certe venis festi Kristnaskon kun la familio de sia fratino kaj decidis surprizi kaj ĝojigi Milan.

Antaŭtagmeze ĉe la pordo iu sonoris. Mila malfermis kaj vidis Zahari, lian ridantan vizaĝon kaj arĝentkoloran hararon, kiu iam, antaŭ jaroj, estis nigra.

-Agrablajn Kristnaskajn Festojn – salutis li.

-Agrablajn Kristnaskajn Festojn – respondis Mila kaj invitis lin hejmen.

LA NOVA LERNEJO

La ŝoseo similis al arĝenta rubando, rekta kaj glata. Je ĝiaj du flankoj estis verdaj kampoj kaj ie-tie videblis florantaj arboj kiel fianĉinoj en blankaj roboj. La printempo kiel nevidebla mirakla birdo etendis vastajn flugilojn kaj la naturo vekigis por nova vivo.

En la suna aprila mateno Kalojan ŝoforis malrapide al urbo Burgo. Granda ŝildo informis, ke post dek kilometroj oni riparas la ŝoseon kaj la aŭtoj devas deflankiĝi laŭ alia vojo. Kalojan direktis la aŭton laŭ la indikita vojo kaj alia ŝildo signis la nomon de la vilaĝo al kiu li proksimiĝis: Ora Valo. Neniam Kalojan estis en tiu ĉi vilaĝo. Li decidis halti, trarigardi ĝin kaj trinki kafon.

Kalojan parkis la aŭton sur la granda vilaĝa placo, kie staris la konstruaĵoj de la vilaĝdomo, de la biblioteko kaj de la lernejo. La vilaĝdomo kaj la biblioteko estis malnovaj, sed la lernejo - tute nova, bela kun grandaj fenestroj. Kalojan ĉirkaŭrigardis. Ne videblis homoj, nur en la eta parko, antaŭ la lernejo, sidis maljunulo. Kalojan proksimiĝis al li.

-Bonan matenon – salutis li.

-Bonan matenon – respondis la maljunulo.

-Ĉu ĉi tie estas kafejo?

-Jes – diris la viro kaj montris al la vilaĝdomo. – Tie, malantaŭ la vilaĝdomo, sed ankoraŭ estas frue kaj la kafejo estas fermita.

-Dankon – diris Kalojan – mi iom atendas, ke oni malfermu ĝin – kaj li sidis sur la benkon ĉe la maljunulo.

-Videblas, ke la vilaĝo estas granda – ekparolis Kalojan – belan nomon ĝi havas – Ora Valo.

-Jes – diris la viro – ĉi tie estis ora minejo, tial la nomo de la vilaĝo estas Ora Valo.

-Eble antaŭ nelonge oni konstruis tiun ĉi lernejon – supozis Kalojan.

-Jes – respondis la viro.

-Sendube la vilaĝo estas riĉa por konstrui belan lernejon.

-La lernejo estas donaco – klarigis la maljunulo.

-Ĉu donaco? – ne kredis Kalojan. – Mirinde! Kiu faris tian grandan donacon?

-La nomo de la donacinto estas Zlatan Draginov. Lia patro estis la plej riĉa homo en la vilaĝo. Li posedis la oran minejon, havis grandegan bienon, muelejon, fabrikon pri heliantoleo, vinfabrikon. Kiam li mortis, Zlatan Draginov, la filo, heredis ĉion kaj nenion donis al sia frato. Lia frato, Filip, restis sen havaĵo kaj forlasis la vilaĝon. Zlatan Draginov, kiel sia patro, iĝis la plej riĉa en Ora Valo. Tamen la sorto punis lin pro liaj avideco kaj krueleco. Zlatan blindiĝis. Post jaroj certe la konscio komencis turmenti lin. Kaj li diris al si mem: mi estas riĉa, sed mi ne vidas miajn bienon, muelejon, fabrikojn, monon, nek la sunon, nek la ĉielon. Kaj li decidis doni monon por la konstruado de la lernejo. En la vilaĝo estis malnova lernejo, sed malgranda. La infanoj tamen estas multaj, necesis nova granda lernejo. Oni detruis la malnovan lernejon kaj sur ĝia loko konstruis la novan lernejon per la mono de Zlatan Draginov.

-Vere bela lernejo – diris Kalojan.

-Jes.

-Verŝajne oni jam malfermis la kafejon. Ĝis reveno – diris Kalojan.

-Ĝis reveno – respondis la viro.

Kalojan ekstaris de la benko, alrigardis la maljunulon kaj restis surprizita. Nun li vidis, ke la maljunulo estas blinda.

LA PONTO DE LA AMO

Iuj vilaĝoj estas alte en la montaro. Ili kaŝas sin en densaj arbaroj aŭ sub krutaj rokoj kaj iliaj domoj similas al grego da blankaj ŝafoj. Tiujn ĉi vilaĝojn vidas nur la agloj, kiuj malrapide kaj majeste rondflugas super ili. Tie, alte en la montaro, estas vilaĝo Steleto. Pli ĝuste estas du vilaĝoj – Alta Steleto kaj Malalta Steleto. Ili situas je du bordoj de rivero Furioza Jana, montara rivero, rapidega, brua, tondra, kiu saltas de ŝtono al ŝtono kaj ĝia minaca muĝado similas al hurlo de kolera drako, kiu kaŝas sin en la densa arbaro.

Jam de multaj jaroj inter Alta Steleto kaj Malalta Steleto estas kruela malamo. Neniu scias kaj neniu memoras kiam komenciĝis tiu ĉi malamo. La loĝantoj de du vilaĝoj ne kuraĝas trapasi la riveron, ĉar se iu trapasus ĝin kaj irus en la alian vilaĝon, li aŭ ŝi estos malbenita aŭ mortigita. La junuloj el Alta Steleto ne edzinigas junulinojn el Malalta Steleto kaj inverse. La loĝantoj el la du vilaĝoj nur kolere rigardas unu la alian de la kontraŭaj bordoj. La rivero estas sanga limo kaj ĉiuj staras malproksime de ĝi.

Tamen foje okazis miraklo. Pirin, junulo forta kaj kuraĝa el vilaĝo Malalta Steleto ekamis Rilan, belegan junulinon el Alta Steleto. Rila estis svelta junulino kun okuloj kiel prunoj kaj hararo nigra kiel ebano. Kiam Rila rigardis la junulon, fajro ekflamis en lia animo kaj nenio eblis estingi ĝin.

Pirin estis alta, korpulenta kun brakoj fortaj kiel ŝtalo. Arbohakisto, li spertis forhaki eĉ la plej dikan arbon. Lia sunbrunigita vizaĝo similis al ĵus bakita pano kaj liaj okuloj bluis kiel montaj lagoj. La amo inter Rila kaj Pirin estis tiel forta, ke nenio timigis ilin, nek la minacoj, nek la malbenoj de la homoj.

Iun nokton Pirin kaŝe trapasis la riveron por preni Rilan, tamen okazis io terura. Pirin kaj Rila dronis en la rivero. Neniu komprenis kiel tio okazis. Ĉu ili falis en la kirlantan riveron aŭ ĉu iu sekvis ilin kaj dronigis ilin? Tutan semajnon

neniu sciis, ke Pirin kaj Rila mortis. Ili malaperis senspure. Tamen iu knabo, paŝtisto, vidis iliajn kadavrojn ĉe arbusto, en loko, kie la rivero ne tiel rapide fluas. Oni entombigis ilin. Pirin en vilaĝo Malalta Steleto kaj Rila – en Alta Steleto.

La ĉagreno pro ili estis granda. La plej forte tristis Zamfir, la patro de Rila. Ŝi estis lia sola infano kaj post ŝia morto Zamfir forvelkis. Li eksimilis al ombro. Antaŭe li estis forta kiel jarcenta kverko. Dum nur kelkaj tagoj lia hararo iĝis blanka kiel la neĝo sur la pinto Dia Roko, lia vizaĝo - griza kiel cindro, la lumo en liaj okuloj malaperis.

Zamfir estis konstruisto. Multajn domojn li konstruis en vilaĝo Alta Steleto, sed post la morto de Rila li ĉesis labori. Tutan tagon li sidis sur ŝtono antaŭ sia domo, kiu estis supre, ĉe la pinarbaro, li rigardis la riveron kaj silentis. Ĉu li meditis pri io aŭ ĉu li rememoris Rilan, kiam ŝi estis eta infano? Tiam li portis ŝin surŝultre kaj kun ŝi lude kuris tra la herbejo kiel rapida cervo.

Iun someran tagon Zamfir diris:

-Tio plu ne devas esti! Mi konstruos ponton super Furioza Jana.

Kaj li komencis konstrui la ponton. Antaŭe neniu eĉ pensis pri ponto super la rivero. La vilaĝanoj el Alta Steleto diris, ke Zamfir freneziĝis pro la tristo. Aliaj miris pri lia decido, iuj priridis lin. Tamen Zamfir konstruadis la ponton kaj silentis. Li mem portis ŝtonojn, lignon, faris subtenilojn. De mateno ĝis sunsubiro li laboris, sed nokte iu detruis la konstruaĵon, faritan dum la tago. Tamen Zamfir ne ĉesis labori. Obstina li estis kaj li sukcesis. Super Furioza Jana ekestis ponto, ŝtona, blanka kiel forta, etendita brako al alia bordo. Sur ŝtono ĉe la ponto Zamfir ĉizis la vortojn: “Tiun ĉi ponton mi konstruis je la rememoro de Rila kaj Pirin kaj mi nomis ĝin “La Ponto de la Amo”.

Dum longa tempo neniu pasis laŭ la ponto. Ĝi staris super la rivero kaj la loĝantoj el la du vilaĝoj nur silente rigardis ĝin. Unue la infanoj el la vilaĝoj ludis ĉe la ponto,

poste ili komencis pasi sur ĝi. La minacoj de la gepatroj ne timigis ilin. La infanoj plenkreskis, komencis geedziĝi, fondis familiojn kaj Malalta kaj Alta Steletoj fariĝis unu vilaĝo.

RENKONTIĜO

Trajan staris en la kafejo, proksime ĉe la pordo, kaj atendis. Preter li pasis viroj, virinoj. Li streĉe rigardis kaj meditis: "Ĉi tie mi estas kiel besteto en kaĝo. Ĉiuj rigardas nur min." Liaj polmoj ŝvitis kvazaŭ ili estis en forno, lia buŝo sekiĝis. Unu el la kelnerinoj, verŝajne samaĝa kiel li, kelkfoje rapide kuris preter li kiel facilmovi sciuro, kaj alloge ŝi rigardis lin, sed nun Trajan ne havis humoron amindumi. Tamen ŝi estis bela, kun okuloj, similaj al steletoj, tritikkolora hararo kaj korpo kiel fleksebla kano.

Trajan venis en la kafejon, ĉar ĉi tie li devis renkontiĝi kun viro, tre grava por li. Trajan ne konis tiun viron, sed li opiniis, ke se li vidus lin, li tuj rekonos lin. "Kial nun li deziras renkontiĝi kun mi?" – demandis sin Trajan.

Multajn jarojn Trajan pensis pri tiu ĉi viro. Ĝis nun li sciis, ke lia patro estas Anton, sed Trajan supozis, ke Anton ne estas lia vera patro. Trajan ne povis klarigi kial li supozis tion. Ĉu la konatoj kaj la parencoj de Trajan sciis, ke Anton ne estas lia patro? Jes, ili certe sciis, sed neniu diris al Trajan. Anton rilatis al Trajan tre kare, li tre penis montri, ke li estas la vera patro de Trajan. Verŝajne ĝuste tio estis suspektinda kaj tial Trajan supozis, ke Anton ne estas lia patro.

Malgraŭ la klopodoj, Trajan ne povis ekscii la veron. La patrino zorge kaŝis tion. Tamen Trajan certis, ke pli-malpli frue ĉio estos klara.

Nun, en la kafejo, Trajan ne povis ĝuste difini kion li sentas, ĉu scivolon, ĉu maltrankvilon, ĉu fortan deziron ekstari vid-al-vide kun sia vera patro, aŭ eble li sentis timon. Verŝajne Trajan senreviĝos kiam li vidos la patron. Ja delonge li revis vidi sian veran patron. Trajan imagis, ke la patro estas alta kun nigra krispa hararo kiel Trajan mem kaj kun nigraj okuloj. Trajan certis, ke la patro ne estas flegmulo kiel Anton. Lia vera patro nepre estas impeta, forta, ĉiam ridetanta, tre okupata pro multe da laboro. Trajan opiniis, ke lia vera patro estas

lokomotivestro. Kial li imagis tion? Aŭ eble la patro estas kuracisto kiel la patrino de Trajan. Povas estis, ke la patro kaj la patrino studis medicinon kaj tiel ili konatiĝis kaj geedziĝis. Tamen kio okazis poste? Kial la patro malaperis? Kie li estis preskaŭ dek ok jarojn?

Aantaŭ du tagoj neatendita telefonalkvoko renversis ĉion. Nekonata virino telefonis al Trajan kaj diris: “Saluton Trajan, ĉu vi deziras vidi vian veran patron?” Certe ŝi bone konis Trajan. Li demandis kiu ŝi estas kaj la virino respondis: “Mi estas via onklino, fratino de via patro.” Tio forte surprizis Trajanon. Li ne supozis, ke li havas onklinon, fratinnon de lia patro. Tuj Trajan respondis, ke li nepre deziras vidi sian patron kaj la virino klarigis kiam kaj kie okazos la renkontiĝo.

Jen, nun Trajan staras en la kafejo, atendas kaj li sentas, ke iu de ie atente observas lin. Trajan turnas sin dekstren, maldekstren, rigardas la homojn en la kafejo, sed ili estas multaj. Ili sidas ĉe la tabloj duope aŭ triope, ili trinkas kafon aŭ bieron, sed kie estas lia patro? Ĉe neniu tablo videblas sola viro. Aŭ eble post nelonge en la kafejon eniros alta, forta viro kun nigra hararo kaj salutos lin, sed jam duonhoron simila viro ne eniris la kafejon. Eble la patro ne venos. Io okazis kaj li ne venos. Aŭ povas esti, ke en la lasta momento li rezignis veni, meditas maltrankvile Trajan. Tamen Trajan ne deziras senesperigi.

Kiam li ekiris al la kafejo, li diris al la patrino, ke li rendezuos kun knabino. Kaj kiam li revenos hejmen, li devos denove mensogi kaj diri al la patrino, ke la knabino ne venis al la rendezuo.

La simpatia juna kelnerino, kiu similas al sciuro, proksimiĝis al Trajan, ekridetis kaj diris al li:

-La viro kaj la virino, kiuj sidas ĉe la tablo en la angulo, petas, ke vi iru al ili.

Trajan tuj rigardis la tablon en la angulo de la kafejo. Antaŭe li vidis la viron kaj la virinnon, kiuj sidis tie, sed Trajan ne supozis, ke ili atendas lin. Li proksimiĝis al ili kaj diris:

-Mi estas Trajan.

La virino respondis:

-Mi estas via onklino Maria kaj tiu ĉi estas via patro Simeon.

La onklino, maldika, malgrasa havis palan, sulkan vizaĝon. Ŝi ridetis, sed iom triste kaj amare. Trajan turnis sin al la patro. Li estis tre malalta, kalva kun grizkoloraj okuloj, kiuj similis al malpuraj vitretoj. Trajan sidiĝis ĉe la tablo.

-Kion vi trinkos? – demandis la onklino

-Oranĝan sukcon – respondis Trajan.

La onklino vokis la kelnerinon. La patro silentis, rigardanta la tablon. Trajan ne sciis kion diri, kion demandi. Finfine li ekkuraĝis kaj mallaŭte li demandis:

-Kie vi estis tiom da jaroj, paĉjo?

La vorto “paĉjo” elbuŝiĝis kiel ŝtoneto, falanta el roko. Simeon alrigardis Trajanon mire. Verŝajne li ne kredis, ke li aŭdis tiun ĉi vorton. Por momento lumo ekbrilis en lia okuloj, sed ĝi rapide estingiĝis kaj liaj okuloj denove eksimilis al malpuraj vitretoj. Tre mallaŭte Simeon ekparolis:

-Mi estis en malliberejo...

Trajan konsterniĝis. Li ne kredis, ke li aŭdis la vorton “malliberejo”.

-Jes – kapjesis Simeon. – Dek ok jarojn mi estis en malliberejo...

-Kial? – balbutis Trajan.

-Mi murdis homon... pro ĵaluzo...

Trajan rigardis lin per larĝe malfermitaj okuloj. La kelnerino alportis la oranĝan sukcon, ŝi milde ekridetis al Trajan. Li ne prenis la glason por trinki. Li nur rigardis senmove la patron, kies vizaĝo estis osteca kun stranga griza koloro, simila al kreto aŭ al polvo. Simeon surhavis malnovan, malmodan jakon, iom grandan por li. La kolumo de lia verda ĉemizo ne estis butonumita kaj lia adampomo moviĝis kiel kunligita pasero.

-Mi ne deziris, ke la homoj diru al vi, ke mi estis en malliberejo – diris Simeon. – Vi jam plenkreskis.

Trajan silentis. En la kafejo estis varme, li ŝvitis kaj ne povis difini kion ĝuste li sentas: ĉu kompaton al la patro, ĉu doloron aŭ eble nenion. Antaŭ Trajan sidis nekonata viro. Trajan eĉ ne deziris demandi kiun li murdis.

La patro kaj la filo silentis. Nenion ili povis diri unu al alia. Simeon ne kuraĝis paroli. Eble tie en la malliberejo, meditis Trajan, li pasigis sennombrajn silentajn horojn. Tie li malalkutimiĝis paroli aŭ li parolis nur kun si mem. Estis senfinaj monologoj.

Trajan ne povis diri kiom da minutoj ili sidis senmovaj kaj silentaj.

Simeon vokis la kelnerinon, pagis kaj ekstaris.

-Ĝis revido – diris li.

-Ĝis revido – tramurmuris Trajan.

-Via onklino telefonos al vi kaj de tempo al tempo ni renkontiĝos – proponis Simeon.

-Bone – diris Trajan.

Ekstere jam vesperiĝis. Je la fino de oktobro la tagoj ankoraŭ varmis kaj la homoj ne rapidis reveni hejmen. Trajan iris kaj meditis: “Finfine mi eksciis la sekreton, kiun multajn jarojn oni kaŝis de mi. Ĝi estis kiel ŝlosita skatolo kaj mi ne povis malfermi ĝin. Nur tion mi ne supozis, ke mia vera patro estis en malliberejo.”

Trajan imagis ĉion, sed ne tion. Ja, la imago estas kiel ondoj, sur kiuj naĝas infanaj paperaj boatoj. La imago pentras nerealajn bildojn, kiuj danĝere erarigas nin.

Trajan revenis hejmen. Kiam lia patrino, Anton kaj li komencis vespermanĝi, la patrino demandis Trajanon:

-Kia estis la renkontiĝo?

Trajan ekstremis. Ĉu hazarde la patrino ne eksciis, ke li renkontiĝis kun la patro. Trajan malrapide respondis:

-Ŝi ne venis...

-Mi konjektis tion – diris la patrino. – Kiam vi revenis, mi vidis, ke vi estas malĝoja. Ne ĉagreniĝu. Vi konatiĝos kun alia knabino. Tiaj estas la virinoj.

LA BLANKA KOŜMARO

En la hospitala ĉambro ĉio estis blanka: la muroj, la plafono, la lito, la littukoj, la kuseno, la lampo... La blanka koloro turmentis Marian. Ŝajne ŝi kuŝis sub peza blanka lavango kaj ne povis spiri. Maria fermis okulojn, sed daŭre ŝi vidis blankajn montojn, blankajn riverojn, nubojn, virojn en blankaj kostumoj kaj virinojn en blankaj roboj. Neniam antaŭe Maria opiniis, ke la blanka koloro estas tiel turmenta. Laŭ ŝi la nigra koloro estis inkuba: la koloro de la morto, de la malsanoj, de la tristo, de la senespero, de la suferoj... Tial Maria ne kutimis aĉeti nigrakolorajn vestojn. Ŝi ne ŝatis la mallumon kaj la obskuron.

Nun ŝi kuŝis senmova en la hospitala lito kaj provis mediti pri io bona kaj bela. Oni operaciis ŝin kaj ŝi jam rapide resaniĝas. Post du tagoj ŝi forlasos la hospitalon. Tamen Maria deziris tuj ekstari de la lito, ekiri eksteren, kie la printempo jubilis per sia varma spiro, per la buntaj floroj, per la arboj, kies folioj jam estis verdaj kaj la tuta naturo ĝojis.

Baldaŭ estos la deka horo matene kaj Maria atendis la flegistinon Veselan, kiu portos al ŝi la kuracilon. Maria senpaciencie atendis Veselan, kiu estis juna, bela, kara, ĉiam afabla kaj milde ridetanta. Vesela ege ŝatis sian profesion kaj ŝi bonege zorgis pri la malsanuloj, kvazaŭ ŝi naskiĝis por esti flegistino kaj eble kiam ŝi estis infano, ŝi revis pri tiu ĉi profesio.

La pordo malfermiĝis, en la ĉambron eniris Vesela. Ŝi portis la kuracilon kaj kvazaŭ kun ŝi en la hospitalan ĉambron eniris la printempo kun aromo de floroj kaj freŝa varmeta vento.

-Kiel vi fartas hodiaŭ, sinjorino Apostolova? – demandis afable Vesela.

Maria alrigardis ŝin kaj denove diris al si mem: “Vere Vesela estas la plej bona kaj la plej bela flegistino.”

La vizaĝo de la juna flegistino estis glata, la okuloj molaj kiel veluro, la brovoj etaj, teneraj, la palpebroj densaj, la lipoj – kiel sukplenaj framboj. Vesela surhavis blankan pantalonon, blankan bluzon, blankan ĉapeleton kaj similis al feino, kiu venis el fabelo.

-Mi bone fartas – diris Maria – kaj vi? Hodiaŭ vi denove ridetas kaj certe vi ne havas zorgojn.

-Ankaŭ mi, kiel ĉiuj homoj, havas zorgojn – mallaŭte diris Vesela, - sed mi ne deziras montri tion.

-Mi ne kredas, ke vi havas zorgojn. Vi ĉiam estas trankvila, kara.

-Mi strebas, ke la ĝemalsanuloj ĉiam vidu min trankvila, ĉar tio donas al ili fortojn kaj esperon, ke ili rapide resaniĝos.

-Kiajn problemojn havas juna, bela virino kiel vi? – demandis Maria, kiu deziris iom paroli kun Vesela kaj ekscii ion pli pri ŝi kaj ŝia vivo.

-La plej granda mia problemo estas, ke nun mi ne havas loĝejon – respondis triste Vesela. – Ĝis nun mi kaj mia kolegino loĝis kune en luita loĝejo, sed mia kolegino edziniĝis. Mi restis en la loĝejo, tamen mi ne povas lupagi ĝin, ĉar la lupago estas tre alta por mi. Mi komencis serĉi alian loĝejon, sed mi ne trovis. La lupagoj ĉie estas tre altaj.

Maria aŭskultis ŝin atente. Ja, la salajroj de la flegistinoj ne estas grandaj kaj la luprezoj de la loĝejoj en la ĉefurbo estas altaj.

-De kie vi devenas? – demandis Maria.

-Mi naskiĝis kaj loĝis en urbo Pirgo – respondis Vesela.

Maria sciis, ke la urbo Pirgo estas malgranda, ie en la montaro.

-Miaj gepatroj estas pensiuloj, ili ne povas monhelpi min – daŭrigis Vesela. – Mi devas helpi ilin kaj tial mi venis labori en la ĉefurbon.

Maria rigardis la nigrajn okulojn de Vesela, kiuj nun ne ridetis. Ŝia rigardo estis trista kaj en tiu ĉi momento Vesela

similis al eta senhelpa knabino, kiu perdiĝis en granda nekonata urbo.

Subita ideo lumigis Marian. Ŝi kaj ŝia edzo Andrej loĝis en duetaĝa domo en la kvartalo, proksima al la monto. Ili loĝis duope, ne havis infanojn kaj Maria decidis proponi al Vesela loĝi ĉe ili.

-Nia domo estas granda – diris Maria – kaj vi povus loĝi ĉe ni. Mi kaj mia edzo bone salajras kaj la lupago ne estos alta.

-Dankon, mi tre dankas al vi – diris Vesela, sed ŝi ankoraŭ ne kredis, ke Maria proponis al ŝi loĝejon. – Vi estas tre kara. Por mi tio estas granda helpo – ekĝojis Vesela.

-Baldaŭ mi forlasos la hospitalon kaj vi venos vidi la domon. Se ĝi plaĉas al vi, vi ekloĝos ĉe ni.

-Dankon! Mi ne scias kiel danki al vi – ripetis Vesela kaj ŝia rideto denove lumigis ŝian mildan glatan vizaĝon.

Maria revenis hejmen kaj post kelkaj tagoj Vesela venis vidi la domon kaj decidi ĉu ŝi ekloĝos en ĝi. Maria renkontis ŝin ĝoje. La ĉambro, kiun Maria montris al Vesela, troviĝis sur la unua etaĝo. Modeste meblita, en ĝi estis lito, vestoŝranko, tablo, libroŝranko, komodo. La fenestro rigardis al la ĝardeno. Tie videblis granda pomarbo, kiu nun en la printempo, floris kaj estis kiel fianĉino en neĝblanka robo. En la koridoro, ĉe la ĉambro, estis pordoj al la manĝejo kaj la banejo.

-Vi povus uzi la manĝejon – diris Maria. – En ĝi estas du fridujoj kaj unu el ili estos por vi.

-Dankon, koran dankon – diris Vesela.

Post semajno Vesela alportis siajn aĵojn kaj ekloĝis en la domo de Maria.

La tagoj pasis nerimarkeble. Maria ne ofte vidis Veselan, kies deĵoroj en la hospitalo estis aŭ tage, aŭ nokte. Tamen kiam Vesela estis hejme, Maria kaj ŝi kune pasigis la liberan tempon. Ili ambaŭ iris en la vendejon aĉetadi aŭ

promenis en la monto. Vesela rakontis al Maria pri siaj gepatroj, pri sia infaneco, pri la laboro en la hospitalo. Maria rakontis al ŝi pri si mem. Maria estis instruistino, ŝi instruis en baza lernejo kaj tre ŝatis la infanojn. Fojfoje Vesela rimarkis, ke Maria tristas, ja ŝi ne havis idon, sed Maria neniam menciis ion pri tio. Andrej, la edzo de Maria, estis konstruĝeniero, ne ĉiam li estis hejme, ĉar ofte oficvojaĝis. Kiam Andrej ne estis hejme, Maria ĝojis, ke Vesela loĝas ĉe ili kaj tial Maria ne timiĝis, ke ŝi estas sola.

Kiam en la vivo ne estas grandaj eventoj, oni preskaŭ ne rimarkas kiel rapide pasas la tagoj kaj kiel ili malaperas unu post la alia kiel nuboj, pelitaj de vento. Post la varma somero venis la aŭtuno, la folioj de la arboj iĝis oraj, flavaj, ruĝaj, brunaj. La pomoj en la ĝardeno maturiĝis kaj Maria rimarkis, ke Vesela tre ŝatas ilin. Ŝi ofte kolektis pomojn el la granda pomarbo, kiu estis ĉe la fenestro de ŝia ĉambro. Pro la mola aŭtuna suno la ruĝaj pomoj brilis kaj tre bongustis.

En oktobro komencis plui. Pezaj grizaj nuboj kiel tendotolo kovris la domojn, la ĝardenojn. La grandaj pluvgutoj tamburis sur la fenestraj vitroj kaj sugestis nekompreneblan triston. Poste venis la vintro, ekneĝis kaj ĉio iĝis blanka. Regis profunda silento kaj aŭdeblis eĉ la plej malpezaj paŝoj sur la neĝkovrita pado en la korto.

Pasis jaro de kiam Vesela loĝis en la domo de Maria kaj en la komenco de la somero Maria rimarkis, ke Vesela estas graveda. Maria tamen nenion demandis. Ŝi atendis, ke Vesela mem rakontu al ŝi pri sia amiko, eble pri la baldaŭa edziĝfesto kaj pri siaj estontaj vivoplanoj. Vesela silentis, nenion ŝi diris kaj ŝi aspektis enpenŝiĝinta. Maria rilatis al Vesela kiel al sia filino kaj ŝi certis, ke Vesela ĝoje rakontos pri la edzo, pri la nasko.

Iun tagon, tute neatendite, Vesela diris al Maria, ke forlasos la loĝejon.

-Verŝajne vi ekloĝos kun via estonta edzo, la patro de la bebo? – demandis Maria. – Mi tutkore deziras al vi multe da feliĉo. Vi nepre telefonu al mi, kiam naskiĝos la bebo. Mi venos vidi ĝin kaj mi alportos donacon.

Vesela nenion diris, nur rapide ŝi alrigardis Marian kaj eniris la taksion, kiu venis por ŝi.

Post tri semajnoj Maria telefonis kaj demandis Veselan ĉu ŝi jam naskis. Vesela respondis, ke ŝi naskis knabon. Tiu ĉi novaĵo ege ĝojigis Marian, kvazaŭ ŝi mem naskis.

-Bonege. Mi kore salutas vin. Plej gravas, ke vi kaj la bebo estu sanaj. Kiam vi decidis, telefonu al mi. Mi venos vidi vin kaj la knabon kaj se vi deziras, mi estos baptopatrino de la knabo.

Pasis monato, sed Vesela ne telefonis kaj Maria komencis maltrankviliĝi, ke io malbona okazis al ŝi kaj al la knabo.

Iun vesperon, kiam Maria kaj Andrej vespermanĝis, Maria rimarkis, ke Andrej estas maltrankvila. Eble li havis laborproblemojn, supozis Maria. La laboro de Andrej estis malfacila. Li konstruis pontojn. La laboristoj ne estis tre spertaj kaj povis okazi akcidento de iu novkonstruita ponto. Andrej hezitis ekparoli. En liaj okuloj videblis peza ombro. Lia rigardo estis stranga, li evitis la rigardon de Maria. Andrej sidis ĉe la tablo kaj kvazaŭ ne povis decidi ĉu li daŭrigu manĝi aŭ ne. Li aŭ prenis la kuleron, aŭ lasis ĝin. Finfine Andrej malrapide ekparolis:

-Vi scias, ke Vesela naskis knabon – diris li.

-Jes, mi telefonis al ŝi. Iun tagon ni gastu al ŝi. Mi aĉetos por la knabo ian belan donacon.

-Pli malpli frue ĉio estos klara – diris Andrej. – Pli bone vi eksciu de mi kio okazis.

Maria ekstremis kaj timigite alrigardis lin.

-Ĉu akcidento?

-Mi estas la patro de la knabo de Vesela – diris malrapide Andrej.

Maria ŝanceliĝis sur la seĝo. Kurteno falis antaŭ ŝiaj okuloj. Ŝi kvazaŭ dronis ie. Peza lavango kovris ŝin kaj ĉio iĝis koŝmare blanka.

LA MONAĤEJO “SANKTA ILIA”

Ĉi-matene Simeon vekiĝis frue. Li tiris la kurtenon kaj la suno kiel akvofalo eniris la hotelan ĉambron. Antaŭ la vasta fenestro videblis la alta montaro, simila al soldato je posteno, surhavanta verdan soldatmantelon. Simeon banis sin, razis sin, vestiĝis kaj iris en la kafejon de la hotelo por matenmanĝi. Li, belstatura, kvardekjara viro kun brunkolora hararo kaj okuloj kiel maronoj, jam de kelkaj monatoj loĝis ĉi tie, en hotelo “Pino”.

Kiel ĉiutage Iskra, la juna kelnerino, kiam vidis lin eniri, tuj iris al li.

-Bonan matenon, sinjoro Topuzakov – ŝi lin salutis afable.

Kun tenera korpo, surhavanta blankan kelneran robon, Iskra similis al printempa galanto. Ŝiaj bluaj okuloj brilis kaj sur ŝiaj sukplenaĵoj lipoj ludis petola rideto.

-Ĉu vi mendos la kutiman matenmanĝon? – demandis Iskra.

-Jes. Bonvolu servi al mi du bulketojn, kafon, oranĝan sukcon, kuiritan ovon kaj bananon.

Tio estis la kutima matenmanĝo de Simeon. Ĉiam li deziris, ke nepre estu kaj banano, kaj ovo.

Preskaŭ ĉiuj en Verdograd konis Simeonon. Antaŭ unu jaro li venis en la urbon kaj aĉetis la plej belan domon, kiun antaŭe posedis la instruisto Ivan Nokov. En la vasta korto de la domo Simeon komencis konstrui grandan hotelon, malgraŭ ke en Verdograd jam estis hotelo - “Pino”. Simeon planis organizi ekskursojn kaj venigi en Verdograd multajn eksterlandanojn.

-Ĉi tie – ofte diris li – la naturo estas belega. Alta montaro, granda lago. Somere la eksterlandanoj promenos en la montaro, ili fiŝkaptados en “Serena Lago”, kies akvo estas malvarma kaj pura kiel kristalo. Vintre ili skios.

Laŭ la konstruplanoj, en la hotelo de Simeon estos moderna restoracio, luksa kafejo, danctrinkejo. La homoj en

Verdograd demandis sin de kie Simeon havas tiom da mono. Neniu sciis kiu li estas, de kie li venis. Iuj diris, ke Simeon estas inĝeniero, kiu studis en Germanio, aliaj supozis, ke li nenion studis, sed li heredis grandan propraĵon. Tamen pli gravis, ke Simeon rapide amikiĝis kun multaj homoj en Verdograd: kun la urbestro, kun la instruistoj, kun la anoj de la urba administracio, kun la vendistoj en la vendejoj...

Kiam li venis en la urbon, li tuj donis monon por renovigo de la monumento de la periintaj en la militoj soldatoj, kiu estis sur la ĉefa urba placo. Li donis monon ankaŭ al la gimnazio por aĉeto de komputiloj. Simeon tre ŝatis la urbon, malgraŭ ke li ne naskiĝis kaj antaŭe ne loĝis ĉi tie.

Post la matenmanĝo Simeon iris vidi kiel progresas la konstruado de la hotelo. Estis monato junio kaj li deziris inaŭguri la hotelon je la fino de la monato septembro. Tiam Simeon planis grandan feston. Li invitos multajn gastojn, estos bankedo kaj agrabla amuziĝo. Simeon jam decidis, ke la nomo de la hotelo estos "Oriono".

Malrapide Simeon iris sur la strato. Estis suna junia mateno. De malproksime la konstruaĵo de la estonta hotelo similis al blanka cigno. Nun la laboristoj starigis la fenestrojn kaj la pordojn. La elektroteknikistoj instalas la kondukilojn por la kurento.

Simeon trarigardis la ĉambrojn. Sur la dua etaĝo estis Sjarov, la ĉefo de la laboristoj. Sjarov, kvindekjara viro, malalta, sed forta kun nigraj lipharoj kaj ŝtalkingoloraj okuloj, diris al Simeon kio ankoraŭ necesas por la laboro. Simeon detale trarigardis ĉion. La hotelo devos esti luksa kaj tre moderna. En la ĉambroj devos esti belegaj pejzaĝoj, pentritaj de famaj pentristoj.

Kontenta kaj en bona humoro Simeon iris el la hotelo kaj decidis iom promenadi en la montaro. Ja, la tago estis tre agrabla.

"Ĉiam mi veturas per aŭto kaj mi dikiĝis – meditis Simeon. – Mi devas pli multe piediri." Spirante la freŝan

matenan aeron li ekiris al la montaro. Post duonhoro nerimarkeble li eniris la arbaron. Ne tre rapide li pli kaj pli eniris la densan kaj malluman arbaron. Ĉe dika kverko li haltis por iom ripozi. Li levis kapon al la ĉielo kaj vidis grizajn nubojn. La vento iĝis pli forta. Eble baldaŭ ekpluvos, supozis Simeon. Ja, ordinare en la montaro la vetero rapide ŝanĝiĝas. Estas suno kaj poste subita pluvo.

La nuboj rapide iĝis pli kaj pli densaj. La arbaro dronis en mallumo. Simeon surhavis maldikan someran jakon kaj tuj li ekiris reen. Subite torente ekpluvis. Blindiga fulmo tranĉis la nubojn kaj forta tondro skuis la arbaron. Simeon ektemis. Tion li ne atendis. Li rapidigis la paŝojn, sed maltrafis la padon al la urbo. Li haltis, ĉirkaŭrigardis. Pluvis torente. La altaj arboj staris ĉirkaŭ li kiel timigaj monstroj. La fulmoj pikis la ĉielon kiel akraj glavoj, la tondroj surdigis lin. Simeon ekmarŝis pli rapide, sed al kiu direkto – li ne sciis. Li ne povis diveni ĉu Verdograd estas norde aŭ oriente. En la malluma densa arbaro li ne orientiĝis. Neniam antaŭe Simeon vagis sola en arbaro. Foje li aŭdis, ke musko estas je la norda flanko de la arboj, sed nun li ne povis detale trarigardi la arbojn. Obsedis lin teruro. La timo kiel vila besteto komencis rampi en lia stomako. La pluvo malsekigis lin de la kapo ĝis la piedoj. Malsekaj estis la jako, la pantalono, la ŝuoj, eĉ la ŝtrumpoj. La vento iĝis pli kaj pli forta. Simeon tremis, sed li ne certis ĉu pro malvarmo aŭ pro timo. Li elprenis la poŝtelefonon kaj telefonis al Sjarov.

-Sjarov – diris li. – Mi promenadis en la arbaro, sed maltrafis la vojon al la urbo. Bonvolu veni serĉi min. Mi ne scias kie ĝuste mi estas.

Sjarov promesis, ke tuj li kaj kelkaj aliaj viroj ekiros serĉi lin.

“Tamen ĉu ili trovos min? – meditis maltrankvile Simeon. – Ja, mi ne povas diri al ili kie ĝuste mi troviĝas.”

Neniam Simeon estis en simila terura situacio. Pli bone, ke mi daŭrigu marŝi – decidis li. Se mi staros, certe mi malvarmumos. Li ĉirkaŭrigardis kaj denove rapide ekmarŝis tra

arbustoj, veproj, descendis sur ŝtonaj krutaĵoj. Li laciĝis, ne havis plu fortojn. Ege kolera li estis al si mem. Kial mi ekiris sola promeni en la arbaro? La pluvo daŭris kaj ĝi vipis lin kvazaŭ per knutoj.

La poŝtelefono eksonoris. Sjarov diris, ke li kun kelkaj ĉasistoj el la urbo ekiris serĉi lin. Simeon dankis al li, tamen la telefon Alvoko de Sjarov ne trankviligis lin. Li marŝis plu, stumblis, falis, ekstaris. Subite li rimarkis padon. Tio estis la savo. Tio estis vera Dia helpo. Certe la pado gvidas al homloko. Post nelonge li iris el la arbaro sur vastan herbejon. Tie Simeon vidis konstruaĵon kaj ĝoje li ekkuris al ĝi. Rapide li trapasis la herbejon kaj ekstaris antaŭ granda ligna pordo. Estis monaĥejo. Kiel frenezulo Simeon komencis frapi per mano je la monaĥeja pordo. Post iom da tempo aŭdiĝis paŝoj. Monaĥo malfermis la pordon.

-Mi perdiĝis en la arbaro – diris Simeon. – Dank’ al Dio mi trafis la monaĥejon.

-Bonan venon – salutis lin la monaĥo. – Bonvolu.

Simeon eniris la korton de la monaĥejo.

-Mi estas monaĥo Vikentij.

-Simeon. Kiu estas la nomo de la monaĥejo?

-Sankta Ilia – respondis Vikentij.

La monaĥo kaj Simeon eniris vastan ejon, verŝajne la monaĥejan manĝejon.

-Sidiĝu – diris Vikentij – varmigu vin. Mi portos vestojn. Viaj estas tute malsekaj.

-Dankon. Ĉu Verdograd estas proksime?

-Se oni irus tra la arbaro, post unu horo oni estos en Verdograd. Tamen laŭ la ŝoseo ĝis tie estas dekkvin kilometroj.

Simeon elprenis la poŝtelefonon kaj telefonis al Sjarov.

-Sjarov, mi estas en monaĥejo Sankta Ilia. Bonvolu veni per aŭto veturigi min en la urbon.

-Mi tuj ekveturos – respondis Sjarov.

Vikentij portis al Simeon pantalonon, ĉemizon, veŝton. Simeon komencis transvesti sin. Vikentij verŝis brandon en glaseton kaj donis ĝin al Simeon.

-La brando iom varmigis vin – diris Vikentij.

Simeon tuj fortrinkis ĝin. En la manĝejo, longa, sed mallarĝa, estis ligna tablo, kelkaj malnovaj seĝoj, en la angulo – fajrujo, sur la dekstra muro – breto, sur kiu estis kaseroloj, teleroj, tasetoj...

-Kiom da monaĥoj estas en la monaĥejo? – demandis Simeon.

-Kvin – respondis Vikentij. – Nun nur mi kaj avo Angelarij, la monaĥestro, estas ĉi tie. Avo Angelarij malsanas kaj kuŝas en sia ĉelo. Aliaj monaĥoj iris en la urbon aĉeti produktojn.

Simeon rigardis Vikentij-on, kiu verŝajne estis kvardekjara. Tre maldika, Vikentij havis kaviĝintajn okulojn kaj pro la granda nigra barbo li aspektis pli maljuna. Lia nigra sutano estis malnova kun flikaĵoj kaj elfrotitaj manikoj. La monaĥo surhavis ne ŝuojn, sed galoŝojn.

-Tre mizere vi vivas ĉi tie – rimarkis Simeon. – Ne estas facile loĝi en monaĥejo. Ja, ĉi tie eĉ kurento ne estas.

-Ne estas kurento. Ni uzas kandelojn – diris Vikentij.

-Kiel eblas loĝi ĉi tie! – miris Simeon. – Kion vi bezonas? Mi deziras fari donacon al la monaĥejo.

-Ni bezonas nenion - diris Vikentij.

-Ĉu nenion? – ne komprenis Simeon.

-Ni estas provizore ĉi tie – diris Vikentij.

-Provizore? – Simeon rigardis lin mire.

-Jes, ni ĉiuj estas provizore sur Tero – klarigis Vikentij.

“Provizore sur Tero – ripetis al si mem Simeon. – Verŝajne la monaĥo pravis. Antaŭ unu horo Simeon ne sciis ĉu li mortos aŭ savos sin. Jes. Ĉiuj homoj estas provizore sur Tero. Kial mi bezonis hotelon, restoracion, danctrinkejon... - demandis sin Simeon.”

Li apogis la brakojn sur la malnova ligna tablo kaj rigardis tra la eta fenestro de la manĝejo. Ekstere jam ne pluvis. La vento forpelis la grizajn nubojn kiel lupo forpelanta ŝafan gregon. La suno denove ekbrilis kaj ĉio: arboj, arbustoj, herebejo estis lavitaj de la pluvo.

LA ENIGMA SILUETO

La duetaĝa konstruaĵo de la frenezulejo staris sub altaj multjaraj ulmoj. Tie estis eta parko kun floroj kaj benkoj. Malantaŭ la konstruaĵo troviĝis la monaĥejo “Sankta Johano”, pri kiu oni rakontis plurajn mirindajn legendojn. En la korto de la monaĥejo tage kaj nokte susuris fonto, kies akvo estas kuraca. Proksime al la frenezulejo kaj la monaĥejo fluis la granda rivero Istar. Ĉi tie, en la rondvalo, la rivero estis larĝa, fluis kviete, kvazaŭ ĝi ripozis antaŭ ekflui en la intermonton, kie estis riverkurbiĝoj kaj altaj krutaj rokoj.

En la frenezulejo ne estis multaj frenezuloj. Tage ili sidis sur la benkoj en la parko aŭ promenadis ĉe la bordo de la rivero. Inter ili mezaĝa viro konstante asertis, ke li estas tie pro politikaj kialoj, ke oni daŭre persekutas lin. Alia frenezulo rakontis, ke li havis gravan ŝtatan mision eksterlande, kie oni provis murdi lin kaj por savi lin, la ŝtataj gravuloj decidis kaŝi lin ĉi tie, en la frenezulejo. Iu frenezulo klarigis, ke li estas eminenta sciencisto, sed oni ŝtelis lian sciencan inventon kaj ĵetis lin kiel ĉifonon ĉi tie.

En la frenezulejo estis kaj viroj, kaj virinoj. La virinoj ŝajnis pli silentemaj, sed Reĝino Margo, ĉirkaŭ kvindekjara virino, senlace rakontis, ke ŝi estas la plej dezirata virino en la mondo. Sennombraj viroj amis ŝin. Strange la historioj, kiujn ŝi rakontis, neniam ripetiĝis.

Tamen la plej enigma frenezulino estis Sisi. Neniu sciis ŝian veran nomon. Male al Reĝino Margo, Sisi tute ne parolis. Dudekjara, neordinare bela, Sisi havis blondan hararon, similan al pezaj maraj ondoj, profundajn violkolorajn okulojn kaj glatan beduinan vizaĝon. De matene ĝis vespere Sisi sidis senmova, rigardanta la blankan muron de la ĉambro. Kiam la vetero estis bela, ŝi estis en la parko, kontempladis la ĉielon kaj ŝi similis al marmora statuo.

La kuracistoj kaj la flegistinoj tre atente zorgis pri Sisi. Verŝajne ŝiaj parencoj multe pagis al la frenezulejo, ĉar Sisi

ĉiam surhavis puran blankan robon kaj ĉiuj ŝiaj vestoj estis novaj kaj modaj. Nokte oni ŝlosis ŝin sola en ĉambro, por ke neniu el la frenezuloj perfortu ŝin.

Tamen iun nokton en la frenezulejo okazis paniko. Estis trankvila nokto. La konstruaĵo, la korto, la monaĥejo dronis en silento. La luno kiel arĝenta disko pendis super la altaj ulmoj kaj ĝia lumo estis pala kaj enigma. Nur de tempo al tempo ie subite ekkriegis strigo. Poste denove ĉio silentiĝis. De la rivero alflugis monotona susuro.

La deĵoranta doktoro Penkov sidis ĉe la skribotablo en la kabineto kaj legis ĵurnalon. Sur seĝo ĉe li sidis flegistino Nejkova, kiu legis ian romanon. Subite iu komencis terure krii. Doktoro Penkov kaj Nejkova tuj ekkuris al la malluma koridoro. Rapidege ili iris sur la duan etaĝon, kie je la fino de la koridoro kuŝis Stanoj, iu el la frenezuloj. Tremanta pro timo li kriegis. Ili demandis lin kio okazis, sed Stanoj nenion respondis. Li nur fingre montris al alia flanko de la koridoro. Tie Penkov kaj Nejkova vidis blankan silueton, kiu kvazaŭ ne paŝis, sed ŝvebis en la aero. Nur post sekundo la silueto malaperis kaj ambaŭ ne komprenis ĉu ĝi eniris iun ĉambron aŭ vaporigis kiel matena nebulo. Penkov kaj Nejkova atente trarigardis la koridoron, ili eniris en la ĉambrojn, sed nenie ili trovis inon aŭ viron en blanka pelerino.

Ili revenis al Stanoj por helpi lin, sed en tiu ĉi momento aŭdiĝis alia terura krio, kiu venis el la korto de la frenezulejo. Penkov kaj Nejkova ekkuris eksteren. Tie onjo Kina, la purigistino en la frenezulejo, kriis, rigardanta la tegmenton de la konstruaĵo. La doktoro kaj la flegistino levis la kapojn supren. Sur la tegmentviziero promenis Sisi, malrapide kaj trankvile. Kial ŝi estis sur la tegmento? Doktoro Penkov kaj Nejkova staris senmovaj kaj rigardis ŝin. Post nelonge Sisi malaperis. La doktoro kaj la flegistino ne komprenis kiel Sisi iris sur la tegmenton. Ĉio estis tre stranga. Kvazaŭ mirakla forto levis ŝin alten.

La sekvan tagon okazis io tute neatendita – Sisi ekparolis. Verŝajne ekparoli ne estas preciza esprimo, ĉar Sisi diris nur unu frazon, kiun ŝi prononcis tre strange, kvazaŭ ŝi ripetis magivorton:

-Baldaŭ ĉiuj ni estos liberaj, senlime liberaj –diris Sisi levante brakojn al la ĉielo, kvazaŭ preta ekflugi.

La frenezuloj tamen tute ne interesiĝis pri la vortoj de Sisi, sed doktoro Penkov atente rigardis ŝin. Ŝajnis al li, ke en la grandaj violkoloraj okuloj de Sisi videblas neordinara lumo. La doktoro demandis sin: “Kiel eblas, ke tiu ĉi bela junulino kun anĝela vizaĝo estas freneza? Vere ni tre malmulte scias pri la homa animo kaj homa cerbo.”

La doktoro sincere deziris helpi al Sisi, sed tio ne eblis.

Iun nokton, en la mezo de junio, ekpluvis. Pluvis longe kaj pli kaj pli forte. Tri tagojn ne ĉesis pluvi. La rivero inundis la frenezulejon. Ĉio dronis en akvo: la korto, la parko, la aleoj. La konstruaĵo similis al ŝipo en maro. Oni komencis translokigi la frenezulojn de la unua al la dua etaĝo. Doktoro Penkov telefonis kaj petis helpon, ĉar baldaŭ en la frenezulejo ne estos nutraĵo, trinkakvo, kuraciloj...Timigitaj la frenezuloj rigardis tra la fenestroj la pluvon.

Venis soldatoj per armeaj veturiloj. Ili eligis la frenezulojn el la inundita konstruaĵo kaj savis ilin. Subite Nejkova diris:

-Ni forgesis Sision. Ŝi estas sola en ĉambro sur la dua etaĝo.

Oni tuj iris venigi Sision, tamen ŝi ne estis en la ĉambro. Doktoro Penkov serĉis ŝin, sed nenie li trovis ŝin. Li rigardis tra unu el la fenestroj, de kie videblis la rivero, grandega, rapidega, minaca, kaj doktoro Penkov vidis, ke en la rivero, sur la akvo, trankvile paŝas Sisi. Li miris kaj ne kredis, ke Sisi promenas sur la rivero. Doktoro Penkov rememoris ŝiajn vortojn: “Baldaŭ ĉiuj ni estos liberaj, senlime liberaj.”

Sisi jam estis libera.

“LA NOBLA KAVALIRO”

Vasil staris antaŭ la spegulo senlime feliĉa. La pordista uniformo plaĉis al li. La pantalono estis grizkolora, larĝa, la ĉemizo kaj la jako same estis grizkoloraj. La jako estis kun flavaj butonoj, la ĉapelo – kun viziero. Ankoraŭ kelkajn minutojn Vasil rigardis sin en la spegulo kaj poste ekiris al la restoracio, kie li devis esti pordisto.

La restoracio troviĝis proksime kaj Vasil piediris. Nun li ne havis monon, sed vespere, post la laboro, li havos. La posedanto de la restoracio pagos al li kaj revenante Vasil aĉetos panon, kolbason, fromaĝon kaj eĉ botelon da biero. La penso pri la biero igis lin ekrideti.

Sur la strato la homoj scivole rigardis Vasil. Verŝajne lia pordista uniformo aspektis stranga. Iuj el la homoj ridetis, aliaj – miris. Tamen Vasil ŝajnis, ke li ne rimarkas ilin. Hodiaŭ por li plej gravis, ke li komencos labori kaj vespere li havos monon.

Longe Vasil atendis tiun ĉi momenton. Antaŭ kelkaj jaroj lia vivo katastrofis, sed nun li ne deziris rememori la pasintecon. En la hodiaŭa suna tago li staros antaŭ la restoracio, klinos sin al la homoj, kiuj preterpasos kaj invitos ilin eniri la restoracion “La nobla kavaliro” por bonguste manĝi kaj trinki bonegan vinon aŭ bieron.

Por hodiaŭ, lia unua labortago, Vasil kelkfoje rigardis sin en la spegulo kaj kiel bona aktoro ripetadis la vortojn, per kiuj li invitos la homojn eniri la restoracion. Li eĉ parkerigis kelkajn proverbojn pri bongustaj manĝaĵoj kaj bonegaj vinoj kaj bieroj. Vasil plurfoje voĉe diris la proverbojn, por ne forgesi ilin. Lia mieno estis serioza kaj lia prononco klara. Li certis, ke li estos la plej bona pordisto en la urbo. Ja, ĝis nun Vasil ĉion faris diligente kaj serioze. Preskaŭ dudek jarojn li estis arkivisto en komerca interpreno, sed subite oni maldungis lin. La ĉefo opiniis, ke oni ne plu bezonas arkiviston. Ĝuste tiam Darina, la edzino de Vasil, decidis divorci. Jes, ilia familio

ne havis sufiĉe da mono kaj Darina konstante ripetis, ke aliaj viroj havas grandajn salajrojn kaj la salajro de Vasil estas mizera. Finfine ili divorcis. Darina kaj Rosi, la filino, ekveturis provincen kaj duope ekloĝis ĉe la patrino de Darina.

Vasil ne koleriĝis al Darina. Ja, ĉiu rajtas serĉi sian feliĉon. Vere Vasil tristis. Tiam okazis alia malagrablaĵo. La patrino de Vasil malsaniĝis. Necesis mono por kuraciloj de la patrino. Ŝia pensio estis malalta kaj tute ne sufiĉis. Vasil serĉis laboron, sed malsukcese. La patrino pli kaj pli malbone fartis. Verŝajne Darina pravis, ke Vasil ne kapablas vivteni familion. Vasil amis la patrinon, helpis ŝin. Li rememoris, ke kiam li estis lernanto, la patrino tre multe laboris. Ŝi estis kontistino kaj ofte ŝi laboris hejme ĝis noktomezo. Tiam Vasil helpis ŝin pri la kalkulado. Nun lia patrino estis tre malsana kaj Vasil ne certis ĉu ŝi rekonas lin aŭ ne.

Kiam la patrino komencis ĵeti tra la fenestro de la domo kulerojn, forkojn, tranĉilojn, Vasil komprenis, ke ŝi jam estas tre tre malsana. La patrino devis esti en psikiatria hospitalo. Vasil ofte vizitis ŝin tie. Foje la ĉefkuracisto invitis lin en sian kabineton kaj diris:

-Sinjoro Dragojnov, ni faras ĉion eblan por kuraci vian patrinon, sed vi bone komprenas, ke necesas mono.

Tamen Vasil ne laboris kaj ne havis monon. La patrino mortis en iu novembra malvarma pluva tago.

Vasil daŭre serĉis laboron. Kaj antaŭ du tagoj sur la strato li vidis sian iaman amikon.

-Salution, Vasil, - diris la amiko. – Delonge mi ne vidis vin.

Vasil alrigardis lin embarasita.

-Kiel vi fartas?

Vasil diris, ke delonge li ne laboras.

-Kiam ni estis samlernantoj – rememoris la amiko – vi ludis en teatraĵo. Vi estis Sanĉo Panzo en la teatraĵo “Don Kihoto”.

-Jes – tramurmuris Vasil

-Tamen nun vi tre similas al Don Kihoto. Vi estas alta, magra kun barbo. Antaŭ nelonge mi aĉetis la restoracion “La nobla kavaliro” kaj mi bezonas pordiston. Vi estos bonega pordisto. Ĉu vi deziras esti pordisto en mia restoracio? Mi pagos al vi bonan salajron.

Vasil rigardis lin mire.

-Venu morgaŭ kaj vi tuj komencos labori.

“Finfine mi havos bonan laboron, diris al si mem Vasil.” La pordista uniformo estis bela, nova kaj li ĝojis.

Vasil ekstaris antaŭ la pordo de la restoracio. Estis la kvina kaj duona posttagmeze. La plej bona tempo. La homoj eliris el la laborejoj. Sur la trotuaro, antaŭ la restoracio, pasis junuloj kaj maljunuloj. Vasil staris kaj vigle ripetis:

-Estimataj gesinjoroj, bonvolu eniri la restoracion “La bona kavaliro”. Ĉi tie vi manĝos bongustajn manĝaĵojn kaj trinkos bonegajn vinojn kaj bierojn.

La homoj pasis kaj ili tute ne rigardis Vasilon. Iuj el ili primokis lin, aliaj rigardis lin tedite. Iuj eble opiniis, ke li estas freneza.

Tamen Vasil daŭre ripetis la frazon kaj invitis la preterpasantojn en la restoracion.

-Bonvolu, bonvolu eniri.

Subite antaŭ li ekstaris knabino. Vasil alrigardis ŝin. Estis Rosi, la filino.

-Paĉjo – diris ŝi – Kial vi humiliĝas? Ja, oni primokas vin.

La rideto de Vasil malaperis. Li konfuziĝis. Nevole li demetis la pordistan ĉapelon kaj mallaŭte diris:

-Rosi.

Tamen la filino rapide forkuris.

LA BOATO

Velin vidis la boaton, kiu flosis sur la rivero. Ĝi kvazaŭ elnaĝis el la nebulo. La fluo turniĝis kaj direktis ĝin al la bordo. Velin tuj ekvadis en la riveron kaj tiris la boaton sur la bordon. Atente kaj detale li trarigardis ĝin. De malproksime ŝajnis al li, ke la boato estas malnova, sed nun li vidis, ke ĝi estas preskaŭ nova. En la boato estis unu remilo kaj fiŝkaptista ĵet-reto. “Kio okazis? – demandis sin Velin. – Ĉu la posedanto de la boato falis en la riveron kaj la fluo portis la boaton ĉi tien? Antaŭ kelkaj tagoj la vetero estis tre malbona. Torente pluvis. Estis forta vento kaj certe okazis akcidento.”

Delonge Velin deziris havi boaton kaj nun la sorto donacis al li preskaŭ novan boaton, per kiu li denove povos fiŝkaptadi. Li kaŝis la boaton en la arbustoj sur la bordo kaj decidis, ke se iu lia amiko demandus de kie li havas tiun ĉi belan boaton, Velin diros, ke Pavel, lia filo, donacis ĝin al li. Ĉiuj sciis, ke Pavel loĝas en la urbo, li estas riĉa komercisto kaj havas multe da mono.

Velin plurfoje petis Pavelon, ke li aĉetu boaton, sed Pavel ĉiam diris:

-Vi estas maljuna. Vi ne bezonas boaton kaj vi ne devas plu fiŝkaptadi. Krom tio vi ne estas tute sana kaj vi devas pli multe ripozi.

Tamen malgraŭ sepdekjara, Velin bone fartis kaj deziris fiŝkaptadi. Tutan vivon li estis fiŝkaptisto, sed por la fiŝkaptado li bezonis boaton kaj jen, la boato sola venis al li. Antaŭ kelkaj jaroj Velin havis boaton, sed ĝi delonge malboniĝis kaj jam ne taŭgis por fiŝkaptado.

Nun pro ĝojo la sango de Velin iĝis varma kaj li decidis, ke unue li farbos tiun ĉi boaton, por ke neniu rekonu ĝin.

Velin revenis hejmen, tuj transvestis sin, ĉar lia pantalono estis malseka pro la vadado en la rivero, kiam li tiris la boaton sur la bordon, kaj li kuiris teon por varmigi sin.

Kiam la teo estis preta, Velin sidis ĉe la tablo kaj komencis malrapide trinki ĝin. Trinkante li daŭre meditis pri la boato. Bela boato ĝi estis kaj li tre kontentis. Antaŭ jaroj Velin estis la plej bona fiŝkaptisto en la vilaĝo. Por li la fiŝkaptado ne estis laboro, sed arto. Sperta li estis kaj grandajn fiŝojn li kaptis – moruojn, silurojn.

Velin ne estis parolema, sed nun li sentis bezonon diri al iu, ke li jam havas belan boaton. Tial li iris el la domo kaj ekiris al la trinkejo, kie kutime li renkontiĝis kun siaj amikoj.

La trinkejo sur la vilaĝa placo estis vasta ejo kun ĉirkaŭ dudek tabloj. Ĉi tie ĉiam estis viroj, kiuj trinkis, konversaciis. Velin sidis ĉe unu el la tabloj, ĉe kiu estis liaj amikoj Bone kaj Mile. Ili parolis pri fiŝoj kaj fiŝkaptado. Ja, ĉi tie, en vilaĝo Makreŝ, la ĉefa vivrimedo estis la fiŝkaptado.

La pordo de la trinkejo malfermiĝis kaj eniris viro kaj virino. Tuj videblis, ke ili ne estas el Makreŝ. La viro estis maljuna, la virino – juna. Verŝajne patro kaj filino. Ili sidis ĉe tablo, najbara al la tablo, ĉe kiu estis Velin kun siaj amikoj. La maljuna viro vokis la kelnerinon, Neli, kaj mendis tagmanĝon. Post dudek minutoj Neli portis al ili fiŝsupojn kaj rostitan karpon kun frititaj terpomoj. Antaŭ ekmanĝi la viro demandis Nelin, kie en la vilaĝo estas la vilaĝdomo.

-Ĉu vi deziras aĉeti domon ĉi tie? – demandis Neli.

-Ne – respondis la viro. – Ni venis, ĉar ni havas grandan ĉagrenon.

Neli alrigardis la viron.

-Tio estas mia filino Jonka – diris li malrapide. – Ni estas el vilaĝo Delevo, kiu troviĝas je dek kilometroj de ĉi tie. Antaŭ semajno mia bofilo, Nejko, la edzo de mia filino, iris per la boato fiŝkaptadi, sed li ne revenis. Tutan semajnon ni ne scias kio okazis. Ni anoncis al la polico pri lia malapero, sed jam tiom da tagoj la polico nenion informas nin. La policanoj nur diras, ke ili serĉas lin. Mia filino ne ĉesas plori. Tial ni ekiris duope serĉi Nejkon. Verŝajne li falis en la riveron. Povas esti, ke la rivero portis lin al bordo. Eble iu vidis lin aŭ vidis

lian boaton. Ni iras de vilaĝo al vilaĝo, ni demandas homojn pri li kaj pri la boato, sed ĝis nun neniu vidis lin, nek la boaton. Jonka ankoraŭ esperas, ke Nejko estas viva kaj eble li estas en iu malsanulejo.

La viro eksilentis kaj komencis forte tusi. La tusado estis profunda kaj tondra. Liaj manoj estis grandaj, kalkovritaj, lia vizaĝo - sulkigita kiel sekigita pruno kaj liaj okuloj similis al glataj riveraj ŝtonetoj. Verŝajne li estis sesdekkvinjara kaj Velin supozis, ke ankaŭ li estis fiŝkaptisto. Lia filino eble estis tridekjara. Bela virino, sed pro la ĉagreno ŝia vizaĝo estis pala kaj ĉirkaŭ ŝiaj nigraj kiel olivoj okuloj videblis malhelaj ombroj, certe pro la daŭra plorado. Same nun ŝi ploris kaj la patro diris al ŝi:

-Ne ploru, Jonke. Se ĉi tie la homoj eksciis ion, ili certe diros al ni.

La viro turnis sin al la tablo, ĉe kiu sidis Bone, Mile kaj Velin, kaj diris:

-Sinjoroj, mi petas vin, se hazarde vi eksciis ion pri viro, kiu dronis en la rivero, bonvolu diri al la polico en via vilaĝo.

Li denove rigardis sian filinon kaj denove provis trankviligi ŝin.

-Ne ploru, Jonke, ne ploru.

Tamen la junulino kvazaŭ ne aŭdis lin. Ŝi ploris silente kaj ŝiaj varmaj larmoj fluis kiel riveretoj el ŝiaj belaj olivsimilaj okuloj. Post nelonge la patro kaj la filino pagis la tagmanĝon, ekstaris, diris "ĝis revido" kaj foriris.

Velin rigardis post ili kaj ŝajnis al li, ke ankoraŭ li vidas la okulojn de la junulino, plenplenajn je larmoj. "Kio okazis?" – demandis sin Velin. – "Certe la viro dronis en la rivero. Ja, li ne plu bezonas la boaton."

Post unu horo Velin revenis hejmen. Li provis ion fari, prepari la ĵet-reton por la venontaga fiŝkaptado, sed li ne havis

emon daŭrigi la preparon. Antaŭ li konstante estis la plorantaj okuloj de la junulino.

Nokte Velin tre malbone dormis. Kelkfoje li vekigis, poste denove li ekdormis, tamen la dormado estis streĉa kaj koŝmara. Li sonĝis inkuban sonĝon. Velin vidis sin sur la riverbordo. Li iris al la arbusto, kie li kaŝis la boaton. Tamen tie li ne trovis la boaton, sed subite li vidis kadavron de juna viro. La viro kuŝis senmova sur la tero kaj liaj vitrecaj okuloj estis larĝe malfermitaj. La rivero surverŝis lian korpon. Velin vekigis ŝvita kaj tremanta.

Ĝis la mateno li ne dormis. Kiam la suno aperis, li tuj ekstaris de la lito, rapide li matenmanĝis, surmetis sian ledan jakon kaj foriris. “Mi ne bezonas aliies boaton – diris al si mem Velin. – Mi diros al la kompatindaj homoj, ke mi trovis la boaton.”

Velin iris al vilaĝo Delevo. Li rapidis tien por diri, ke li trovis la boaton.

DU DOLĈVOĈAJ SONORILOJ

Kelkajn tagojn malrapide neĝis. La altaj pinarboj ekhavis blankajn kapuĉojn.

Jam tutan semajnon mi gastas al oĉjo Stamat en la montodomo “Tulipo”. Ĉi tie en la ĉambro estas varme, la forno bumadas kiel lokomotivo, odoras je rezino kaj je kuracherba teo. Oĉjo Stamat kaj mi sidas ĉe la tablo kaj konversacias. Niaj konversacioj estas senfinaj. Ekstere malvarmas, la vento hurlas kiel malsata ŝakalo kaj la neĝo kovras vojojn kaj padojn.

Oĉjo Stamat estas vidvo. Lia edzino, onjo Dona, forpasis antaŭ du jaroj. Sesdekjara oĉjo Stamat havas larĝan vizaĝon, blankan kiel lakton hararon kaj helverdajn serenajn okulojn. Tre alloge li rakontas. Bone li konas la montaron, plurfoje li travagis ĝin kaj somere, kaj vintre. Oĉjo Stamat estis forstisto kaj poste li fariĝis dommastro de montodomo “Tulipo”.

-Kiam mi venis ĉi tien, la montodomo estis preskaŭ detruita. Mi komencis rekonstrui ĝin – rakontis oĉjo Stamat. – Iom post iom la laboro progresis. Mi aĉetis kaj portis ĉi tien fenestrojn, pordojn. Mi farbis la murojn kaj jen, nun la montodomo estas bela kaj similas al junedzino. Sur la balkono mi metis florpotojn kun pelargonioj, kiuj ruĝas kiel fajreroj. Antaŭ la montodomo mi faris florbetojn.

La rekonstruo ankoraŭ ne estis finita kaj iun matenon en la montodomon venis virino. Mi estis ekstere ĉe la florbetoj. La virino silente ekstaris antaŭ mi. Mi rigardis ŝin, sed ŝi silentis, nenion ŝi diris. Mi demandis ŝin:

-Ĉu vi ekskursas en la monto, sinjorino?

Kaj ŝi respondis:

-Ne. Mi fuĝas.

-De kio vi fuĝas?

-De mia edzo – diris ŝi. – Se vi permesus al mi resti ĉi tie, mi estus tre dankema al vi.

Mi rigardis ŝin kaj mi ne sciis kion diri al ŝi. Bela virino. Verŝajne tridekjara kun blonda hararo kiel oro, kun okuloj – mielkoloraj kaj ŝia vizaĝo – blanka kiel neĝo.

Mi invitis ŝin en la montodomon.

-Bonvolu – diris mi. – Ni trinkos teon.

Ŝi eniris, malvestis sian mantelon, sidis ĉe la tablo kaj komencis rakonti. Ŝi diris, ke estas el vilaĝo Kalojanovo. Ŝia nomo estis Dona. Tre juna ŝi edziniĝis. Ŝia edzo estas la plej riĉa homo en Kalojanovo, sed ili ne havas infanojn. Pasis kvin jaroj, dek jaroj de la edziĝfestoj kaj ŝia edzo komencis multe drinki kaj turmenti ŝin. Ofte li diris al ŝi: “Vi malbonigis mian vivon. La tuta vilaĝo primokas min, ĉar ni ne havas infanon.” Finfine ŝi decidis forlasi lin.

-Mi helpos vin, mi kuiras, mi zorgos pri la montodomo, purigos ĝin – diris la virino.

-Mi rigardis ŝin – daŭrigis la rakonton oĉjo Stamat - kaj mi kompatis ŝin. Bela ŝi estis, tre bela. Kiel eblas turmenti tian belan virinon. Ja, tio estas peko. Mi tamen ne estis trankvila. Mi supozis, ke ŝia edzo venos kaj kulpigos min, ke mi allogis lian edzinon ĉi tien. Tio kompreneble estos granda problemo.

La virino kaj mi sidis ĉe la tablo kaj mi iĝis pli kaj pli maltrankvila. Ŝajnis al mi, ke iu proksimiĝas al la montodomo, sed ekstere en la arbaro regis silento. Vesperiĝis kaj mi ne povis decidi kiel agi, ĉu mi forpeli ŝin. Ne eblis forpeli ŝin, nek lasi ŝin en la montodomo. Mi cerbumis kaj mia kapo fajris kiel tiu ĉi forno nun. Ekstere pli kaj pli vesperiĝis.

-Ĉu vi estas malsata? – demandis mi la virinon.

Ŝi diris, ke ŝi ne estas malsata, tamen mi varmigis la fazeolan supon. Mi verŝis ĝin en du telerojn, unu por ŝi, unu por mi. Mi donis al ŝi panon kaj ni komencis vespermanĝi. Ŝi diris, ke ŝi ne estas malsata, sed ŝi aspektis kvazaŭ tutan semajnon ŝi manĝis nenion. Mi rigardis ŝin. Ŝiaj mielkoloraj okuloj ebruiĝis min, mi dronis en ili kiel en mirakla lago. Kiam ni finis la vespermanĝon, mi diris al ŝi:

-Vi dormos en la ĉambro kaj mi dormos ĉi tie, en la manĝejo. Matene ni decidis kiel agi.

Ŝi eniris en la ĉambron kaj mi restis en la manĝejo. Tutan nokton mi ne ekdormis. Ŝajnis al mi, ke iu venas, ke iu deziras perforte malfermi la pordon de la montodomo. Kelkfoje mi iris al la pordo por kontroli ĉu ĝi estas bone ŝlosita. Mi eĉ prenis mian ĉasfusilon kaj metis ĝin ĉe mi. Silente mi eniris la ĉambron, kie ŝi dormis. Ŝi dormis kiel narkotita. Ja, ŝi estis tre laca. Mi ne sciis kiom da tagoj ŝi vagis en la arbaro. La luna lumo, kiu enŝteliĝis tra la fenestro, lumigis ŝian vizaĝon kaj dormanta ŝi estis pli bela. Ŝia vizaĝo blankis kiel porcelano. Ŝia hararo sur la kusenon similis al ora rivero. Ŝi dormis kiel senkulpa, ĉasta infano.

Matene ŝi vekigis, ordigis la ĉambron, balais antaŭ la montodomo. Mi diris al ŝi, ke mi devas iri al vilaĝo Slavjanovo kaj mi ekiris. Tamen mi ne iris al Slavjanovo, sed al vilaĝo Kalojanovo. Mi deziris ekscii kiu ŝi estas. Ĉu ŝia nomo estas Dona kaj ĉu ŝia edzo turmentis ŝin. En Kalojanovo mi havas bonan amikon, Jordanon, eksoficiron. Li faras kuprajn sonorilojn, kiuj estas tre famaj en la tuta regiono. Liaj sonoriloj ne sonoras, sed kantas. Jordan faras ne nur sonorilojn, sed same kuprajn pokalojn por vino.

Iris mi al la domo de Jordan kaj jam de la pordo li komencis riproĉi min, ke tiom da tempo mi ne gastis al li.

-Tie, en la montaro, en la montodomo sola vi iĝos sovaĝulo. Ursoj kaj lupoj manĝos vin kaj poste eĉ viajn ostojn ni ne trovos.

Mi aŭskultis lin kaj al mi mem mi diris: "Vi ne scias kiu venis al mi. Ne urso, sed kapreolino. Bela kapreolino. Se vi vidus ŝin, ŝia beleco sorĉos vin."

Jordan kaj mi komencis konversacii. Li regalis min per bonega vino, kiu flamigis min. Mi demandis lin pri miaj konatoj en Kalojanovo kaj poste mi menciis la nomon de familio Kitovi. Jordan alrigardis min.

-Harizan Kitov tre multe drinkas kaj ofte li estas ebria – diris Jordan. - Lia edzino Dona iris ien. Neniu scias kien ŝi iris.

Mi adiaŭis Jordanon kaj ekiris al la montodomo. Mi supozis, ke kiam mi revenos en la montodomon, Dona ne estos tie. Tamen ŝi ne foriris, ŝi kuiris tagmanĝon. Ni sidis ĉe la tablo tagmanĝi kaj Dona demandis min:

-Ĉu vi sukcesis ĉion aranĝi en vilaĝo Slavjanovo?

-Jes – respondis mi.

Mi komencis rakonti, ke en Slavjanovo mi estis en la vilaĝdomo, mi parolis kun la vilaĝestro, kiu promesis al mi doni monon, por ke mi finu la rekonstruon de la montodomo, tamen mi vidis, ke Dona rigardas min strange kaj subite ŝi demandis min:

-Ĉu vi eksciis ĉion pri mi? Ĉu vi konvinkiĝis, ke mi ne mensogis vin?

Pro miro kaj honto mi vorton ne povis diri. Ja, Dona konjektis, ke mi ne estis en Slavjanovo, sed en vilaĝo Kalojanovo.

-Jes – konfesis mi - Mi estis en Kalojanovo. Mi ne komprenas kial dum tiom da jaroj vi vivis kun via edzo?

Dona ekploris.

-Kiam oni edziniĝas, oni esperas, ke la familia vivo estos feliĉa, sed ... - diris ŝi.

Post tiu ĉi konversacio, mi kaj Dona ekloĝis kune. Nia unua nokto estis kiel nuptonokto. La korpo de Dona estis la plej tenera korpo, kiun mi povis imagi. Ŝia hararo odoris je kuracherboj, ŝiaj brakoj ĉirkaŭprenis min karese, ŝiaj mamoj similis al du maturaj cidonioj. Matene, kiam la suno aperis kaj lumigis nin, ni jam sciis, ke ni loĝos kune. Dona trairis longan vojon por trovi min.

Post semajno ni iris al la regiona urbo por aranĝi ŝian divorcon. Ĉio pasis rapide. Harizan Kitov konsentis divorci. Mia amiko Jordan kaj lia edzino, Pena, estis atestantoj de nia

geedziĝo. La edziĝfesto okazis ĉi tie, en la montodomo. Venis niaj parencoj kaj amikoj. Ni bakis du ŝafidojn. Jordan alportis bareleton da vino. Li donacis al ni du grandajn kuprajn sonorilojn kaj li diris:

-Unu sonorilo sola ne kantas. Mi donacas al vi du sonorilojn, por ke ili kantu kune. Ne estas pli bela, pli dolĉona kanto ol la kanto de la kupraj sonoriloj. Ilia kanto fluas kiel torento. Se hazarde unu el la sonoriloj silentiĝas, la alia sonorilo daŭrigas kanti.

-Jen, ĉi tie estas du kupraj sonoriloj – kaj oĉjo Stamat montris la sonorilojn, kiuj pendis sur la muro, sub la foto de onjo Dona. – Se mi eĉ iomete tuŝus ilin, ili ekkantus.

Oĉjo Stamat tuŝis mane la sonorilojn kaj en la ĉambro eksonis ilia dolĉa kanto kaj mi kvazaŭ vidis vastajn herbejojn, ŝafejojn kun ŝafoj, similaj al blankaj nubetoj.

-Dona kantis bonege – diris oĉjo Stamat. – Multajn kantojn ŝi sciis. Ofte ŝi staris sur la balkono de la montodomo kaj kantis. Ŝia voĉo kiel aro da alaŭdoj flugis alte en la ĉielo super la arboj kaj la pintoj.

Oĉjo Stamat rigardis al la fenestro. Ekstere jam ne neĝis. La ĉambro dronis en fabela silento.

-Ni surprenu la skiojn kaj ni iru al vilaĝo Kalojanovo – diris oĉjo Stamat. – Mi devas aĉeti nutraĵproduktojn por la montodomo.

Ni rapide vestiĝis, surmetis la skiojn kaj ekiris al Kalojanovo. La neĝkovrita vojo pasis preter altaj pinarboj, kiuj staris kiel verdaj standardoj. Ĉio estis blanka, kvazaŭ la mondo ĵus naskiĝis kaj estis vindita en granda blanka vindotuko.

Post unu horo ni estis en Kalojanovo. Oĉjo Stamat aĉetis nutraĵproduktojn kaj mi helpis lin plenigi la dorsosakon.

-Se ni jam estas ĉi tie – diris oĉjo Stamat – ni vizitu Jordanon, mian nuptopatron.

Ni ekiris al la rivero, ĉe kies bordo estis la domo de Jordan. Li ĝoje renkontis nin. Onjo Pena, lia edzino, tuj invitis nin tagmanĝi.

-Vi estas lacaj, malsataj, kaj vi devas unue tagmanĝi – diris ŝi.

Jordan diris al mi:

-Ĝis nun vi ne gastis al mi kaj vi ne konas mian metion. Venu, mi montros al vi kion mi faras.

Ni iris en grandan ĉambron sur la unua etaĝo de la domo. Mi rigardis mire. Sur la muroj pendis multaj sonoriloj, pli grandaj kaj pli malgrandaj. Ili brilis kvazaŭ estis oraj. Mi rigardis Jordanon. Liaj okuloj same brilis. Li proksimiĝis kaj tuŝis unu el la sonoriloj. Aŭdiĝis melodia sono.

-Unu sonorilo sola ne kantas – diris Jordan.

Li iris kaj komencis tuŝi sonorilon post sonorilo. Melodio kiel najtingala kanto eksonis en la granda ĉambro. La sonoriloj kantis per diversaj voĉoj. Iuj el ili estis teneraj, aliaj – basaj. Iom post iom la sonorila kanto iĝis pli forta, simila al vasta ondo. Mi dronis en tiu ĉi kanto kaj mi sentis min kvazaŭ malpeza. Mi ekflugis super la monto. Sub mi estis la domoj, la kortoj, la zorgoj. Jordan daŭre karesis mane la sonorilojn kaj ripetis:

-Se iu sonorilo silentiĝos, alia komencas kanti kaj la kanto sonorplenigas la tutan monton.

Mi rigardis liajn ĝojajn okulojn, aŭskultis lian voĉon kaj mi rememoris la du sonorilojn, kiujn Jordan donacis al oĉjo Stamat kaj al onjo Dona. Onjo Dona forpasis, sed ŝia sonorilo restis kaj du sonoriloj per siaj dolĉaj voĉoj kantas ĉiam en la montodomo “Tulipo”.

LA SOLDATO - SAVANTO

Kutime sabate posttagmeze Helena, Dara kaj Galina iris en kafejon “Pino”. Al ili plaĉis tiu ĉi kafejo. Ĝi estis ekster la urbo, proksime fluis rivero kaj estis malgranda lago. Printempe kaj somere la tabloj de la kafejo staris ekstere sub la altaj pinarboj.

Ĉi-sabate la tri amikinoj venis ĉi tien buse. En la kafejo ne estis multaj homoj. La tabloj jam estis ekstere kaj la knabinoj sidis ĉe tablo, proksime al la lageto. La radioj de la posttagmeza suno karesis iliajn vizaĝojn. Helena, Dara kaj Galina lernis en la urba altlernejo kaj preskaŭ ĉiam ili estis kune. Helena loĝis kun siaj gepatroj. Dara kaj Galina, kiuj estis el aliaj urboj, loĝis en la komuna loĝejo de la altlernejo.

Bela, alloga knabino, Helena havis brunan hararon kaj okulojn, kiuj kvazaŭ respegulis la verdecon de la arbofolioj. Dara estis blondharara, bluokula, Galina – malalta kun nigraj okuloj kaj longaj palpebroj, kiuj igis ŝin tre ĉarma.

Kiel kutime la knabinoj mendis kafon kun lakto kaj bulketojn, kiuj estis tre bongustaj. En la kafejo ĉe la tabloj sidis kelkaj familioj, kies infanoj ludis ĉe la lageto. Ivan, la juna kelnero, rapide pasis de tablo al tablo kaj servis la menditajn trinkaĵojn kaj dolĉaĵojn. Li surhavis nigran pantalonon, blankan ĉemizon kaj satenan veŝton. Helena, Dara kaj Galina estis enamiĝintaj en Ivan. Alta kun nigra densa hararo, bronzkolora vizaĝo kaj malhelaj brilaj okuloj li similis al hindo kaj verŝajne tial li plaĉis al la virinoj. Ivan ankaŭ estis studento, sed printempe, somere kaj aŭtune li laboris kiel kelnero en la kafejo.

Dum la maja tago sunis, varmetis, Helena, Dara kaj Galina gaje babilis pri siaj geinstruistoj, pri filmoj, kiujn ili spektis, pri siaj geamikoj.

Subite en la kafejo, ĉe la lageto, ekstaris soldato, kiu komencis plenvoĉe krei:

-Forkuru! Tuj forkuru! La muro de la baraĵlago falis kaj baldaŭ la akvo inundos ĉion.

En la unua momento la homoj en la kafejo opiniis, ke la juna soldato estas freneza aŭ ebria kaj ili eĉ ne rigardis lin. Tamen li pli forte kriis:

-Forkuru! La akvo venas.

Tie, supre en la monto, estis granda baraĵlago, ĉe kiu estis elektrocentralo, kiu produktis kurenton kaj eble la muro de la baraĵlago falis. La soldato denove kriis. Li estis sen ĉapelo, ŝvitis, lia vizaĝo ruĝis kiel tomato kaj lia rigardo estis febra. Li peze spiris. Eble li kuris al la kafejo por averti la homojn en ĝi.

Nun, ĉiuj ekstaris kaj ekkuris. Ekestis paniko. La virinoj komencis kriegi. Tablo falis. Vitraj glasoj rompiĝis. Infanoj ekploris. La patroj prenis la infanojn kaj kuris. Helena, Dara kaj Galina kelkajn sekundojn restis senmovaj.

-Kuru alen, al la deklivo – kriis al ili la soldato.

La tri knabinoj ekkuris al la deklivo. Helena ne deziris kredi, ke la muro de la granda baraĵlago falis. Se tio okazis, baldaŭ la akvo inundos ne nur la kafejon, sed la tutan ĉirkaŭaĵon. Kafejo “Pino” troviĝis en intermonto. Inter ŝoseo kaj rivero. La intermonto similis al longa mallarĝa koridoro kaj la akvo venos kiel grandega ondo. Terurigita Helena rampis sur la deklivon.

Ĉu tio devis okazi en la belega maja posttagmezo? Kie estas Dara kaj Galina? Ili kune ekkuris al la deklivo, sed nun Helena estis sola. Ŝi provis kuraĝigi sin mem, sed ŝiaj fortoj rapide elĉerpiĝis kaj ŝia korpo pezis kiel grandega ŝtono. Helena stumblis, falis, glitiĝis sur la deklivo. Ŝi frapis sian brakon kontraŭ ŝtono kaj eksentis akran doloron. Jam ne estis espero. Baldaŭ la akvo venos kaj ŝi dronos en ĝi. En tiu ĉi momento forta mano kaptis ŝian manon kaj helpis ŝin ekstari.

-Rapide! – aŭdis Helena.

Ŝi malfermis okulojn kaj vidis la soldaton. Li tiris ŝin supren.

-Mi ne povas iri – ekploris Helena.

-Ankoraŭ iomete – kriis la soldato. – Iru ankoraŭ iomete!

La dekstra ŝuo de Helena falis. Dorna arbusto ŝiris ŝian robon. La soldato forte tenis ŝian manon kaj tiris ŝin kiel trentraktoro. Helena peze spiris. La timo paralizis ŝin. Ŝi ne certis kio pli timigas ŝin: ĉu la nekonata soldato, kiu forte tiras ŝin, aŭ la akva ondo, kiu baldaŭ inundos ĉion.

-Ankoraŭ iomete – denove diris la soldato.

Li same peze spiris kaj liaj febraj okuloj similis al bluaj globetoj. Tre pene ambaŭ iris ankoraŭ kelkajn metrojn kaj falis ĉe alta pinarbo.

-Bone – diris la soldato. – Ni jam estas sufiĉe malproksime.

Helena ne kuraĝis alrigardi lin. Ŝi mem aspektis terure. Ŝia robo estis disŝirita. Ŝia dekstra ŝuo mankis. Tie, malsupre, aŭdiĝis terura tondro. La akvo fluegis. Grandega ondo forigis ĉion. La riverego trenis arbojn, aŭtojn kaj eble homojn. Ĝis nun Helena ne vidis tian teruraĵon. Ŝi preskaŭ svenis. Instinkte ŝi premis la manon de la soldato. Li kaj ŝi konsternite rigardis la akvan inferon, kiu frakasis ĉion malsupre.

Pasis eble du horoj. La ondo iĝis pli malgranda. Ĝi fluis al la urbo, sed kio okazis tie? De malproksime aŭdiĝis krioj kaj ploroj. Helena ne povis imagi la teruraĵon, la panikon tie.

Vesperiĝis. Helena kaj la soldato ekiris al la urbo. Helena maltrankvile meditis pri siaj gepatroj kaj pri la fratino. Ĉu ili travivis la inundon? La domo de Helena troviĝis en la centro de la urbo. Ĉu la akvo damaĝis la domon?

Helena deprenis, ĵetis la alian ŝuon kaj paŝis nudpieda. Akraj ŝtonetoj vundis ŝiajn piedojn. Ŝia brako doloris. La ŝoseo estis kovrita per koto. Ĉie videblis ŝtonoj, falintaj arboj, renversitaj aŭtoj. Estis terure. Helena kaj la soldato proksimiĝis al la domo de Helena. De la strato ŝi vidis, ke en la ĉambro lumas kaj tio iom trankviligis ŝin. Helena haltis antaŭ la pordo de la korto.

-Mi loĝas ĉi tie – diris ŝi.

Helena ĉirkaŭprenis la soldaton kaj kisis lin.

-Dankon – diris ŝi.

-Ĝis revido – diris la soldato.

Helena malfermis la pordon kaj eniris la korton.

Pasis semajno post la terura inundo. Multaj homoj el la urbo mortis. Tiuj, kiuj loĝis en la malsupra kvartalo, plej multe suferis. Inter la mortintoj estis gemaljunuloj kaj infanoj. Daŭre aŭdiĝis ploroj kaj lamentoj en la kvartalo, kiu troviĝis proksime al kafejo “Pino”. Galina kaj Ivan, la juna kelnero, dronis. Ili ne sukcesis forkuri. Ja, Ivan estis tre forta, sed iu menciis, ke li provis helpi maljunan virinon.

La tagoj pasis. Venis la somero. Oni purigis la ŝoseon. Kafejo “Pino” denove ekfunkciis. Nun la tabloj kaj la seĝoj estis novaj. La kafejo aspektis tute alia kaj en ĝi ne plu estis la romantika atmosfero kiel antaŭe. Pli malmultaj homoj venis ĉi tien.

Jam de kelkaj monatoj Helena serĉis la soldaton, kiu savis ŝin, sed ŝi nenie trovis lin. Helena esperis, ke foje subite ŝi vidos lin sur iu strato. Lia vizaĝo, lia figuro kvazaŭ estis sigelitaj en la memoro de Helena. Nokte ŝi songis lin. Estis koŝmaraj songoj. Granda terura rivero. Helena estas en la rivero. Malproksime de ŝi sur la rivera bordo staras la soldato. Helena krias, etendas brakojn, sed la soldato ne aŭdas kaj ne vidas ŝin. La rivero fluas freneze, bruas, tondras. Helena vekigis ŝvita, timigita. Ja, ŝi estas en la lito, ŝi ne povas plu dormi. Ŝi kvazaŭ denove vidas la soldaton, liajn blujajn okulojn, lian vizaĝon, ruĝan kiel tomaton. Helena jam ne esperas, ke iam ŝi renkontos lin.

Pasis ses jaroj. Foje en somera posttagmezo Helena, ŝia edzo kaj ŝia kvinjara filino venis en kafejon “Pino”. Ili sidis ĉe tablo, mendis kafon kun lakto, sed ĉi tie oni jam ne bakas la bongustajn bulkojn. Vera, la filino de Helena, ludis ĉe la

lageto. Proksime al la pado al la kafejo estas pinarbeto. Helena scias, ke Dara, ŝia amikino, plantis ĝin memore je Ivan. Dara jam estas infaninstruistino kaj antaŭ du jaroj ŝi estis ĉi tie kun la lernantoj kaj plantis la pinarbeton. Dara amis Ivanon, diris al si mem Helena.

Sur la deklivo ĉe la kafejo nun kreskas multaj arbustoj. Helena denove rememoras la soldaton. Ŝi ne scias lian nomon. Tiam ŝi ne demandis lin kio estas lia nomo. Helena neniam menciis al sia edzo pri la soldato. Tiam, kiam estis la inundo, la edzo de Helena ne loĝis en la urbo. De tempo al tempo Helena demandas sin: kie nun estas la soldato kaj kio okazis al li?

ONKLINO DORA

Ĉiuj en la loĝkvartalo konis onklinon Dora. Ŝi loĝis en malgranda unuetaĝa domo, flavfarbita, kiu de malproksime similis al granda helianto. Onklino Dora ŝatis florojn kaj en la korto de ŝia domo abundis la rozoj, tulipoj, hiacintoj, diantoj...

La najbarinoj ofte gastis al ŝi. Ja, ŝi estis kara kaj helpema. Printempe, somere kaj aŭtune en ŝia korto kolektiĝis aro da najbarinoj. Ili sidis ĉe la malnova ligna tablo sub la vitlaŭbo, babilis kaj trinkis kafon. Onklino Dora havis neordinaran talenton. Ŝi divenis la figurojn en la kaftasoj kaj laŭ ili ŝi aŭguris la estontaĵon de la homoj.

Multaj junulinoj venis al ŝi kaj petis ŝin aŭguri ilian estontaĵon. Onklino Dora renkontis ilin afable, ŝi kuiris aroman kafon, ili trinkis ĝin kaj poste onklino Dora aŭguris kio okazos en ilia estonta vivo.

Kara kaj ĉarma, onklino Dora havis blankan hararon kaj okulojn kiel varmajn kaŝtanojn. Ŝi similis al nobla sorĉistino, alveninta el iu konata fabelo. Rigardante la kaftasojn ŝi mallaŭte diris kio okazos kaj kia estos la sorto de la junulinoj. Ili aŭskultis ŝin atente kaj poste ĝoje ili diris, ke onklino Dora aŭguris ĉion, kio al ili okazis.

Foje venis ploranta juna virino, bela kun longa brunkolora hararo kaj okuloj kiel ĉerizoj. Onklino Dora tuj kuiris kafon kaj ambaŭ sidis ĉe la tablo por trinki ĝin. Poste onklino Dora prenis la kaftason kaj komencis paroli. Kiam la juna virino ekstaris por foriri, ŝi jam ne ploris kaj aspektis pli trankvila.

Post du semajnoj la virino denove venis. Nun ŝi portis grandan bukedon de rozoj, kiun ŝi donacis al onklino Dora. La okuloj de la virino ĝoje kaj feliĉe brilis.

-Onjo Dora – ŝi diris. – Ĉio okazis tiel kiel vi aŭguris. Mia edzo revenis kaj nun ni denove estas kune.

-Estu sanaj kaj tutan vivon estu kune – diris onklino Dora.

Kiam la juna virino foriris, mi demandis onklinon Dora kiel ŝi antaŭvidis, ke la edzo de la virino revenos.

Onklino Dora respondis:

-Nenion mi antaŭvidis. Mi nur donis al ŝi esperon. Ja ne eblas vivi sen espero.

PRI LA AŬTORO

Julian Modest naskiĝis en Sofio. Bulgario. En 1977 li finis bulgaran filologion en Sofia Universitato “Sankta Kliment Ohridski”, kie en 1973 li komencis lerni Esperanton. Jam en la universitato li aperigis Esperantajn artikolojn kaj poemojn en revuo “Bulgara Esperantisto”.

De 1977 ĝis 1985 li loĝis en Budapeŝto, kie li edziĝis al hungara esperantistino. Tie aperis liaj unuaj Esperantaj noveloj. En Budapeŝto Julian Modest aktive kontribuis al diversaj Esperanto-revuoj per noveloj, recenzoj kaj artikoloj. Tie li estis membro de la Asocio de Junaj Hungaraj Verkistoj. De 1986 ĝis 1992 Julian Modest estis lektoro pri Esperanto en Sofia Universitato “Sankta Kliment Ohridski”, kie li instruis la lingvon, originalan Esperanto-literaturon kaj historion de Esperanto-movado. De 1985 ĝis 1988 li estis ĉefredaktoro de la eldonejo de Bulgara Esperantista Asocio. En 1992-1993 li estis prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio.

Julian Modest estas aŭtoro de jenaj esperantaj verkoj:

1. ”Ni vivos!” – dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1983.
2. ”La Ora Pozidono” – romano. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984.
3. ”Maja pluvo” – romano. Eld.: “Fonto”, Chapeco, Brazilo, 1984.
4. ”D-ro Braun vivas en ni”. Enhavas la dramon “D-ro Braun vivas en ni” kaj la komedion “La kripto”. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1987.
5. ”Mistera lumo” – novelaro. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1987.
6. ”Beletraj eseoj” – esearo. Eld.: Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1987.

7. "Ni vivos! – dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof - grandformata gramofondisko. Eld.: "Balkanton", Sofio, 1987
8. "Songe vagi" – novelaro. Eld.: Bulgara Esperanto-Asocio, Sofio, 1992.
9. "Invento de l' jarcento" – enhavas la komediojn "Invento de l' jarcento" kaj "Eŭropa firmao" kaj la dramojn "Pluvvespero", "Enŝteliĝi en la koron" kaj "Stela melodio". Eld.: Bulgara Esperanto-Asocio, Sofio, 1993.
10. "Literaturaj konfesoj" – esearo pri originala kaj tradukita Esperanto-literaturo. Eld.: Esperanto-societo "Radio", Pazarĝik, 2000.
11. "La fermata konkoo" – novelaro. Eld.: Al-fab-et-o, Skovde, Svedio, 2001.
12. "Bela songo" – novelaro, dulingva Esperanta kaj korea. Eld.: "Deoksu" Seulo, Suda Koreujo, 2007.
13. "Mara Stelo" – novelaro. Eld.: "Impeto" – Moskvo, 2013
14. "La viro el la pasinteco" – novelaro, esperantlingva. Eldonejo DEC, Kroatio, 2016, dua eldono 2018.
15. "Dancanta kun ŝarkoj" - originala novelaro, eld.: Dokumenta Esperanto-Centro, Kroatio, redaktoro: Josip Pleadin, 2018
16. "La Enigma trezoro" - originala romano por adoleskuloj, eld.: Dokumenta Esperanto-Centro, Kroatio, redaktoro: Josip Pleadin, 2018
17. "Averto pri murdo" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Espero", Peter Balaz, Slovakio, 2018
18. "Murdo en la parko" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Libera", Lode Van de Velde, Belgio, 2018
19. "Serenaj matenoj" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Libera", Lode Van de Velde, Belgio, 2018
20. "Amo kaj malamo" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Libera", Lode Van de Velde, Belgio, 2019

Julian Modest ofte prelegas pri la originala Esperanto-literaturo. Li estas aŭtoro de pluraj recenzoj kaj studoj pri Esperanto-libroj kaj Esperanto-verkistoj.

Pluraj noveloj de Julian Modest el Esperanto kaj el bulgara lingvo oni tradukis en diversajn lingvojn, albanan, anglan, hungaran, japanan, korean, kroatan, makedonan, rusan, ukrainan k. a.

Nuntempe li estas unu el la plej famaj bulgarlingvaj verkistoj. Liaj noveloj aperas en diversaj bulgarlingvaj revuoj kaj ĵurnaloj. Pluraj liaj noveloj bulgaraj kaj esperantaj estas en interreto.

Liaj rakontoj, eseoj kaj artikoloj aperis en diversaj revuoj “Hungara Vivo”, “Budapeŝta Informilo”, “Literatura Foiro”, “Fonto”, “Monato”, “Beletra Almanako”, “La Ondo de Esperanto”, “Zagreba Esperantisto” kaj aliaj

Nun Julian Modest estas ĉefredaktoro de revuo “Bulgara Esperantisto”. Oni ofte intervjuas lin en bulgaraj ĵurnaloj kaj en diversaj radiaj kaj televiziaj stacioj, en kiuj li parolas pri originala kaj tradukita Esperanta literaturo. Li redaktis plurajn Esperantajn kaj bulgarlingvajn librojn. Julian Modest estas membro de Bulgara Verkista Asocio kaj Esperanta PEN-klubo.

ENHAVO

	Antaŭparolo	5
1.	Kio estas la rakonto – eseo	7
2.	Fideleco	9
3.	La letero	12
4.	La lupino	15
5.	La libro-savanto	21
6.	Dancanta anĝelo	23
7.	La mantelo	29
8.	La pentraĵo de Ruslan	32
9.	Ĉasisto de songoj	35
10.	La trezoro	38
11.	Neordinara propono	41
12.	Sinjoro Dukov kaj la pupo	46
13.	La violonisto	50
14.	La incendio	53
15.	Envio	56
16.	La plej bela rememoro	58
17.	La nova lernejo	60
18.	La ponto de la amo	62
19.	La renkontiĝo	65
20.	La blanka koŝmaro	70
21.	La monaĥejo “Sankta Ilia”	76
22.	Enigma silueto	82
23.	“La nobla kavaliro”	85
24.	La boato	88
25.	Du dolĉvoĉaj sonoriloj	92
26.	La soldato – savanto	98
27.	Onklino Dora	103
	Pri la aŭtoro	105